



LITERATURA VIVO



Numero 015

Settembre 2026

www.literaturavivo.com

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada

Enhavlisto

Alklakante la koncernan bluan titolon, oni povas salti al ĝia responda paĝo.

Titolo	Ĝenro	Aŭtoro / Tradukinto	Paĝoj
Kovrilo		Numero 015 / Literatura Vivo	1
Vortoj por niaj legantoj	redakcia	Erika Godó / John Huang	5-6
Septembro	poemo	Erika Godó	7
Intervjuo kun Elena Popova	intervjuo	Erika Godó / Elena Popova	8-10
Konfeso: Al la virino en mia vivo	eseo	Elena Popova	11
La trista hundo	eseo	Elena Popova	12
Leteroj el la Kosmo (4)	romano	Elena Popova	13-14
Festi la 90-an naskiĝtagon de Elena Popova!	gratuloj	Julian Modest kaj aliaj	15-17
Sidu kun ni	poemo	Erika Godó	18
Intervjuo al Larysa Osadchuk	intervjuo	Erika Godó / Larysa Osadchuk	19-25
La magia papero de Larysa	rakonto	Erika Godó	26-27
Virina Literatura Kafejo en Graz – renkontiĝo plena de literaturo kaj ĝojo	raporto	Olga Bauer	28
Fantaziaĵo	eseo	Lenke Szász	29-30
Vintra birdkanto	kanto	Lenke Szász / Luiza Carol	31
La Sagao de la Eterna Spiralo: La Legendo de Tanu III	romano	Lázaro Noel Coto	32-37
Mesaĝo el Parizo	rakonto	Laimundas Abromas	38-39
Letero al poetinoj	poemo	Mirič Jadranka	40
Muso blanka feliĉon profetas	rakonto	Mirič Jadranka	41-43
La lasta rigardo al Miskolc - Tapolca	eseo	Erika Godó	44-45
Du resumaj kanzonoj	eseo	Roland Platteau	46-47
La perdita mondo de kurtonda radio	eseo	Roland Platteau	48
Ĉu mi povas?	poemo	Ismay Lezcano García	49
Morala instruo de avĉjo Tiko	rakonto	Violeta V. Jovič / Mirič Jadranka	50
Longa vojo antaŭen	eseo	Paŭlo Sergio Viana	51
Kampo nulo-punkto	poemo	Paulo P. Nascentes	52
Forfuĝa brilo	poemo	Paulo P. Nascentes	53
Mi koleras	poemo	Angel Arquillos Lopez	54
Septembro	poemo	Rudina Muharremi Beja / Bardhyl Adem Selimi	55-56
Pejzaĝo	poemo	Maria Nazaré Laroca	57
La ikono	novelo	Julian Modest	58-63

Titolo	Ĝenro	Aŭtoro / Tradukinto	Paĝoj
Verko de nekonata forfuĝintino el Libio	poemo premiita	Carmel Mallia	64
La kverko en seka ĉifono	poemo premiita	CHOE Taesok	65
Helikoptero super la urbo	poemo premiita	Miklós Cseszneky	66
Zumada valso	poemo	Manel Sales	67
La spuroj de mia animo – libro naskita el la koro	pri libro	Erika Godó	68
Hungara premiito en la Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay	novaĵo	Trad.: Erika Godó	69-70
Nova ĵuriano en la konkurso de Kálmán Kalocsay	novaĵo	Erika Godó	71
La burĝonaĵo de fraŭlino Johana Brodi (8)	romano	Muriel Spark / Detlef Karthaus	72-79
Vento orienta - Vento okcidenta (15)	romano	Pearl S. Buck / Detlef Karthaus	80-85
Jaga (15)	fantasta romano	Maksim Bočkarev / Sergei Isakov	86-91
Aperis la plej nova libro de Elena Popova	pri libro	Erika Godó	92
Ŝia obstino, mia vivo	novelo	Arko Gong	93-95
Bagatelo influas la rezulton	eseo	Yin Jiaxin	96-97
Azeno kaj Hundo	rakonto	Yin Jiaxin	98-99
Ŝi estas akvo	poemo	Adrian Michael / John Huang	100
Sokolsky arbaro	kanto	Kang Li / John Huang	101
Senvorta Fino	kanto	Kasi / John Huang	102
Papertondado montras varmecon en la mondo	artikolo	Fenestro de la Ĉefurbo / Sheng Min	103-104
Ole-ŝpiciĵoj Nudeloj	novelo	Viktoria	105-107
Ĉi-vespere ni restu kune	kanto	Jia Mi / Batalanto	108
Ĉarma rozeto bela	kanto	Wang Luobin / Batalanto	109
Sub la Montoj, Paco Revenis	rakonto	Ĉiamĝoja	110-112
La Magio de la Mondo	poemo	Ĉiamĝoja	113
Lastnokte vento hurlis kun pluveto	poemo	Luna Li (Li Qingzhao) / Gajo	114
Sonĝesko	poemo	Luna Li (Li Qingzhao) / Gajo	115
Mezaŭtuna Festo	poemo	Luo Shuigen	116
La Numero 1 Zoroastra-Esperantista Detektiv-Agentejo	romano	Anand Manikutty	117-120
La sekreto de la baobabo	eseo	Ngalamulume Christopher / Honoré Sebuhero	121
Solidareco de Orienta Timoro al Kongo	poemo	Matias Araújo	122
Muziko	poemo	Héritier Barasebanya	123
Dankesprimu el Kongo al la mondo de literaturo	eseo	Jeroubbaal Banyanga	124
Kiam la jaro endormiĝas	poemo	Jeroubbaal Banyanga	125
Ĝi fariĝos real'	poemo	Nasandratra Patrick	126
Eta poemo por maljunuloj	poemo	Muhammad Naeem Javaid	127

Titolo	Ĝenro	Aŭtoro / Tradukinto	Paĝoj
La misteraj Kalaŝoj	eseo	Muhammad Naeem Javaid	128-131
Taglibro de Pipi	taglibra prozo	Pipi	132-135
Karikatur: Georgo kaj Dodo	karikatur	John Huang	136
Karikatur: Muso 2	karikatur	Erika Godó	137
Fotografia rubriko	fotografio	John Huang	138-141
Internacia Literatura Esperanta Konkurso "Hristo Gorov-Hrima" 2026	anonco	Julian Modest	142
Esperanto – Alvoko por poetoj kaj pasiuloj	anonco	Tiberio Madonna	143
10-a Tradukkonkurso "Lucija Borčić"	anonco	Kroata Esperantista Unuiĝo	144
Alvoko: Virina Aŭtoro de la Jaro	anonco	Literatura Vivo	145
Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay	anonco	Literatura Vivo	146-147

Ĉiuj ilustraĵoj en ĉi tiu numero, kiuj ne estas kreitaj de la originaj aŭtoroj, estis generitaj de John Huang per AI-arta kreado.



Deklaro pri aŭtorrajtoj por ĉiuj kontribuantoj

Ĉiu persono, kiu sendas al *Literatura Vivo* originalan verkon, tradukon, recenzon, eseon, bildon aŭ alian materialon por eventuala publikigo aŭ por partopreno en konkurso, estas konsiderata kiel konfirmanta, ke la sendita materialo estas lia aŭ ŝia propra verko, aŭ ke li aŭ ŝi laŭleĝe disponas pri ĉiuj necesaj rajtoj por ĝin sendi, traduki, publikigi kaj disvastigi; se temas pri traduko, la kontribuanto garantias, ke la originala verko jam apartenas al la publika havaĵo aŭ ke li aŭ ŝi ricevis la necesan permeson de la rajtoposedanto, kaj la redakcio rajtas peti pruvon pri tia permeso; se la kontribuo enhavas fotojn, ilustraĵojn, bildojn, tekstojn, tabelojn, kantotekstojn aŭ aliajn materialojn devenantajn de triaj personoj, la kontribuanto garantias, ke li aŭ ŝi akiris la necesajn permesojn por ilia uzo; la kontribuanto mem respondecas pri ĉiuj juraj sekvoj rezultantaj el malobservo de aŭtoraj rajtoj, tradukrajtoj, portretrajtoj, privatecaj aŭ aliaj rilataj rajtoj, kaj *Literatura Vivo* kaj ĝia redakcio ne respondecas pri malveraj aŭ nekompletaj deklaroj faritaj de la kontribuanto; la redakcio rezervas al si la rajton peti pliajn informojn, pruvmaterialojn aŭ permesojn, kaj laŭbezzone rifuzi, prokrasti, forigi aŭ retiri materialon, se aperas dubo aŭ disputo pri la rajta stato de la kontribuo; la samaj reguloj validas ankaŭ por kontribuoj senditaj al konkursoj organizataj aŭ kunorganizataj de *Literatura Vivo*, kaj se kontribuo montriĝas rajte problema, la organizantoj rajtas nuligi ĝian akcepton, forigi ĝin el la konkurso aŭ, se necese, nuligi premion; per sendo de materialo al *Literatura Vivo*, la kontribuanto estas konsiderata kiel plene leginta, kompreninta kaj akceptinta ĉi tiun deklaron.

Redakcio de Literatura Vivo

Vortoj por niaj legantoj

Erika Godó kaj John Huang



Karaj legantoj de Literatura Vivo,

Kun granda ĝojo kaj fiero, ni – Erika Godó kaj John Huang – bonvenigas vin al la dek-kvina numero de nia revuo, eldonita en la milda septembro de 2026. Kiel la aŭtuna vento kunportas novajn esperojn, tiel ĉi tiu numero kunigas la plej belajn literaturaĵojn el ĉiuj anguloj de nia tutmonda Esperanto-familio, kreante ponton de arto, paco kaj homa varmo.

Ĉi tiu numero estas speciale signifa, ĉar ni oficiale anoncas la rezultojn de la **Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay 2026**:

- **Poezio**: 1-a premio Carmel Mallia ("*Verko de nekonata forfuĝintino el Libio*"), 2-a CHOE Taesok ("*La kverko en seka ĉifono*"), 3-a Miklós Cseszneky ("*Helikoptero super la urbo*").
- **Prozo**: 1-a premio Jorge Rafael Nogueras ("*Aŭroren*"), 2-a Miklós Cseszneky.
- **Tradukado**: 1-a premio Kirilo Brosch, 2-a Batalanto, 3-a Igor Sokolov.
- **Juna talento**: Jeroubbaal Banyanga el Kongo pro "*Kiam la jaro endormiĝas*". Ni kore bonvenigas Julian Modest kiel novan ĵurion kaj jam oficiale malfermas la alvokon por la Kalocsay-Konkurso 2027!

Ni solene festas la **90-an naskiĝtagon de la talenta bulgara aŭtorino Elena Popova** per korŝira intervjuo, ŝiaj novaj verkoj ("*Konfeso*", "*La trista hundo*", "*Leteroj el la Kosmo 4*"), recenzo pri "*Resonoj de la tempo*" kaj varmaj gratuloj el la tuta mondo. Krome, nia dua intervjuo kun **Larysa Osadchuk** malkaŝas la magion de Esperanto kaj origamio (EsperOri) antaŭ la 1-a EsperOri-Kongreso en Montpeliero (oktobro 2026), akompanata de la poemo de Erika Godó "*La magia papero de Larysa*". Ni ankaŭ retrorigardas al la sukcesa Virina Literatura Kafejo en Graz, gvidata de **Olga Bauer**, kiu kunigis pli ol 50 partoprenantojn el 10 landoj en varma kaj inspira etoso de literaturo, poezio kaj internacia amikeco.

En la proza kaj eseistika sekcioj, vi trovos profundajn Pensojn kaj vivajn bildojn: **Yin Jiaxin** meditas pri karaktero en "*Bagatelo influas la rezulton*" kaj donacas la kamparan rakonton "*Azeno kaj Hundo*"; **Arko Gong** kortuŝas per patrino amo en "*Ŝia obstino, mia vivo*"; **Julian Modest** enkondukas nin en la balkanajn legendojn de "*La ikono*"; **Viktoria** amuzas per "*Ole-ŝpicitaj Nudeloj*"; **Miriĉ Jadranka** alportas "*Muso blanka feliĉon*"

profetas" kaj tradukas Violeta V. Joviĉ; **Laimundas Abromas** resendas romantikan *"Mesaĝo el Parizo"*; dum **Roland Platteau**, **Paŭlo Sergio Viana**, **Lenke Szász**, **Anand Manikutty**, **Ĉiamĝoja**, **Muhammad Naeem Javaid** kaj **Pipi** pliriĉigas nian enhavon per historiaj, sociaj kaj filozofiaj verkoj.

Niaj felietonoj daŭrigas la klasikajn kaj fantastajn vojaĝojn tradukitajn de Detlef Karthaus (*"Johana Brodi"*, *"Vento orienta - Vento okcidenta"*) kaj Sergei Isakov (*"Jaga"*). En tradukado, **Gajo** interpretas la poezion de Li Qingzhao, **Batalanto** tradukas kazahan kaj noktan romantikajn kantojn, **John Huang** alportas modernajn ĉinajn kantojn, kaj **Sheng Min** kondukas nin al la pekina papertondad-arto de Su Jiadi.

Nia tutmonda poezia ĝardeno floregas per verkoj de Erika Godó (*"Septembro"*, *"Sidu kun ni"*, *"Miskolc-Tapolca"*), Luo Shuigen, Paulo P. Nascentes, Ismary Lezcano García, Ángel Arquillos, Maria Nazaré Laroca, Rudina Muharremi Beja, kaj afrikaj poetoj kiel Jeroubbaal Banyanga, Honoré Sebuhero, Matias Araújo, Héritier Barasebanya kaj Nasandratra Patrick.

Fine, nia **Fotografia Rubriko** de John Huang konservas du historiajn momentojn el la 111-a UK en Graz (*"La Pac-himno en Graz"* kaj *"La flago transiras al Melbourne"*), kune kun belaj fotoj de Huangcheng, gajaj karikaturaj de John Huang kaj Erika Godó, kaj AI-ilustraĵoj kreitaj de John Huang.

Ni deziras al vi trankvilan legadon kaj profundan inspiron en ĉi tiu ora aŭtuno!

Viaj redaktoroj,

Erika Godó *John Huang*
Erika Godó kaj John Huang



Setembro

Erika Godó



La somer' foriras en ora vespero,
folioj dormetas ĝis la lasta somero;
En vento aŭdiĝas milda suspiro,
kaj aŭtuno alvenas kun silenta sopiro.

La suno pli frue kaŝiĝas en vualo,
la ĉielo ruĝiĝas en milda opalo.
Post la adiaŭo, post ĉiu foriro,
ekbrilas en koro espero kaj miro.

La folioj ekflugas tra aŭtuna vojo,
kaj ĉiu el ili kunportas sian ĝojon.
Ĉiu finiĝo, kvankam ĝi doloras,
novan pordon antaŭ la koro malfermas.

Setembro alvenu kun freŝa espero,
kaj fermu kun amo la pordon de l' somero.
Sed post ĉiu fino, en silenta mateno,
denove ĉiam ekfloru la ĝojo de vivo.



INTERVJUO kun Elena Popova

Erika Godó



1, Kiam vi verkis vian unuan poemon aŭ rakonton?

- Dum la jaroj en la gimnazio.

2, Vi verkas poemojn, hajkojn, prozon kaj porinfanan literaturon. Kiun ĝenron vi sentas plej proksima al via koro?

- Kiam venas la Muzo, Ŝi diktas. Sed mi preferas prozon.

3, Kial vi elektis tiel ofte verki hajkojn?

- Mi ne povas respondi. Mia unua libro kun hajkoj - La sezonoj de la animo aperis 2016. Sekvis Koro sur manplato, 2017, en kiu estis parto, dediĉita al la Japana katastrofo dum 2011, laŭ eseoj de Hori Jasuo kaj lia traduko en japana. Serĉantaj animoj aperis dum 2018 kaj en tio estis parto, tradukita de Hirotaka Masaaki / Vastalto/, kiu donacis al mi sian libron „Kiel verki hajkon en Esperanto“. La lasta estis Inspiro, 2019, ankaŭ kun konsilo de Vastalto, Japanio.

La aliaj konsilantoj estis Vasil Kadifeli, Turkio, Rob Meerbeek, Nederlando, Venelin Mitev kaj Dimitrinka Kateva el Bulgario.

4. De kie venas la ideoj por viaj poemoj kaj rakontoj?

- De io vidata, de la bildoj kaj fotoj, de la Naturo.

5. Ĉu vi antaŭe planas viajn verkojn, aŭ ĉu la ideoj evoluas dum la verkado?

- Ne, mi ne planas, la ideoj venas solaj kaj mi verkas, poste mi komplektigas ilin en libro.

6. Kiom gravas por vi, ke viaj verkoj estu legeblaj kaj en la bulgara kaj en Esperanto?

- Grave estas! Per Esperanto mi havas ne nur legantojn en diversaj landoj, sed kaj novajn geamikojn.

7. Kion vi deziras transdoni al la leganto per mallonga poemo?

- Bonon kaj amon.

8. Kio estas la fonto de via inspiro por verki poezion kaj rakontojn?

- Mi jam respondis – la Muzoj parolas kaj helpas al mi.

9. Kion signifas literaturo por vi?

- Kiu ne lernas, ne legas, ne serĉas, ne aŭskultas muzikon, li neniam ekkonos la mondon. La verkistoj, la pentristoj, la komponistoj donacas al la homoj spiritan riĉecon.

10. Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

-Ne!

11. Kiel vi sentis vin, kiam vi gajnis premion en la konkurso Kálmán Kalocsay?

- Dankema.

12. Ĉu estis iu persono, kiu aparte influis vin kiel verkistino?

- Neniu. Mi legis, mi skribis, eraris, verkis kaj timis pri tio, kion mi verkis. Poste, kiam mi aŭdis la vortojn „Bone estas!“ de kelke da verkistoj, mi ne volis kredi, ke tio estas vero. Eĉ nun mi ofte dubas...

13. Kiam vi sentis, ke verkado fariĝis grava parto de via vivo?

- Tre malfrue...

14. Vi verkis plurajn librojn por infanoj. Kial estas grave por vi verki por infanoj?

- Mi ne havas respondon. Ĉi jare aperis diskon / bulgarlingve/ kun libreto „Gaja rivereto“ laŭ miaj tekstoj kaj muziko de Aleksandar kaj Sneĵina Stoyĉevi / instruistoj kaj muzikistoj/. Mi ne nur ĝojas, mi kredas, ke la infanoj pli bone sentos mian poezion.

15. Kio estas malsama kiam oni verkas por infanoj kaj kiam oni verkas por plenkreskuloj?

- Laŭ mi la teksto devas tuŝi la koron de la leganto, infano aŭ plenkreskulo...

16. Kion vi deziras instrui aŭ montri al infanoj per viaj rakontoj?

- La nunaj infanoj ne ŝatas la instruojn. Mi estos kontenta, se ili lernas kaj pensas pri sia vojo, pri siaj revoj...

17. “Leteroj el la Kosmo” kaj ĝia daŭrigo “Novaj Leteroj el la Kosmo” sekvas la vojaĝojn de Niki tra diversaj imagaj mondoj. Kiel vi vidas la evoluon de Niki inter la unua kaj la dua libro? Ĉu ankaŭ viaj propraj pensoj kaj via mondrigardo ŝanĝiĝis dum la verkado de la daŭrigo?

- Interesa demando. Kiam mi finis la unuan parton de la libro, mi ne pensis daŭri. Pro tio mi petis Vejdo -n pri traduko en ĉina. Li helpis kaj en 2020 aperis la unua libro en Esperanto kaj la ĉina, tradukita de Zhuang Qixiong. Pasis tempo kaj mi denove komencis verki la historiojn. Niki gvidis min kaj mi devis lin helpi, ni kune rapidis trovi ion novan. Mi sentis min feliĉa vojaĝi en nekonata Kosmo. La du partoj aperis en Esperanto dum 2024 kun Vejdo, kiel lingva konsilanto. Mi pensas, ke dum la verkado, kiel dum la legado, ĉiu demandas sin „ĉu mi povas fari tion? Ĉu mi povas iri tie, helpi, trovi, malkovri...?“ La teksto gvidas kaj lernigas, edukas, pro tio estas grave kion li trovos en li, ĉu ideo pri bono aŭ celas nur amuzo. La respondeco de la aŭtoro estas granda.

18, Laŭ via volo, Literatura Vivo Eldonejo preparas eldoni kune “Leteroj el la Kosmo” kaj “Novaj Leteroj el la Kosmo”. Se vi povus diri ion rekte al la estontaj legantoj de ĉi tiu nova eldono, kion vi plej dezirus, ke infanoj — kaj ankaŭ plenkreskuloj — kunportu el la kosmaj vojaĝoj de Niki post fermo de la libro?

- Kie iris Niki, li ĉie trovis amikecon, amon, bonajn renkontojn, bonajn estaĵojn. Ili volas, ke la homoj devas vivi en paco kaj amikeco.

19, En aĝo 90 jaroj, kio ankoraŭ inspiras vin kaj instigas vin krei?

- Mi ne havas planojn, kion Dio decidus. Kiam venas ideo, se mi havus eblecon, mi verkos... Mi pensas, ke Homo devas vivi, ne atendi la morton kaj se li/ ŝi povas ĝojigi iun, bone estos.

20, Kion la vivo instruis al vi pri homaj rilatoj kaj amikeco?

- Post ni devas resti nur la Bono kaj Amo, ne malamo...

21, Ĉu ekzistas verko, kiu estas aparte kara al via koro? Kial?

- La aŭtoro, kiel la patrino, devas ami ĉiun siajn idojn. La verkoj estas niaj infanoj, bonaj aŭ malbonaj, la leganto povus ŝati ilin aŭ ne. Mi ne scias kia estos la sorto de miaj libroj. La sorto donis al mi eblecon plenigi mian vivon kaj mi estas dankema al la Kreinto.

22, Se vi povus lasi nur unu mesaĝon al viaj legantoj, kia ĝi estus?

- Vivu en Paco kaj Amo en la koro!

23, Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?

- Mi ne havas planojn, kio devas iĝi, iĝos!...

24, Kion vi volus diri al legantoj de Literatura Vivo?

- Belega aldono, kiun mi legas kun intereso. Sukceson en via laboro kun nia helpo, kiel legantoj kaj aŭtoroj!

Dankon! ♦

K O N F E S O

Al la virino en mia vivo

— Elena Popova



Ĉu vi memoras tiun glatan rokon ĉe la mara bordo kaj niajn korpojn, absorbintajn la varmon, kiun la suno al ni donacis? Kaj la kvietan plaŭdon de la ondoj?

Vi estas la trankvila ondo, ĉirkaŭprenanta miajn lacigitajn piedojn, pro la longa vojo, dum mia serĉado.

Mi serĉis vin sur la blankaj rokoj. Ili malkaŝis al mi sian ardan nudecon.

Vi ne estis tie...

Mi fosis la sablon, por serĉi vin. Mi trovis nur konkojn – belajn, sed malplenajn. Mi lasis milojn da paŝoj sur la bordo, kvankam nedaŭrajn.

Vi ne estis tie...

Mi petis la larojn serĉu vin. Ili portis al mi aromajn girlandojn el algoj, sed al kiu mi donacu ilin?

Nun vi estas ĉe mi por ĉiam.

La ondoj de la memoro karesas miajn piedojn kaj mi komprenas ilian parolon. Estas trankvile kaj varme al mia animo.



Jen venas la nokto. La plena luno ludas en mia sango. Ĝi allogas min denove. Tiom da plenlunoj mi travivis, ĝis kiam mi vin trovis. Tiom da lunaj vojetoj min allogis eniri la maron. Estis nur imago. Mateniĝis kaj malaperis la miraĝo de la revo.

Vi estis lunarko, elrigardanta malantaŭ la blankaj rokoj, poste via vizaĝo pleniĝis per lumo. Vi promesis ion per via enigma rideto, kiam la mateniĝo kovris vian vizaĝon per la blanka punto de la malproksimeco. Mi sciis, ke vi venos por ĉiam.

Kaj vi venis.

Mi prenas vian varman manon kaj mi tenos ĝin dumvoje.

Ni havas tiom da lunlumigitaj vojetoj trairi kaj tiom da sunleviĝoj renkonti.

Ĉu la tempo sufiĉos al ni?

Mi plektos por vi la plej belan kronon el algoj kaj metos ĝin sur vian kapon. Ni promesos unu al alian tie, ĉe la lunlumigita vojeto, kun la beno de la luno kaj la atestantoj steloj. Kaj nia amo estos ĉiama, kiel ili. ♦

LA TRISTA HUNDO

Elena Popova



Hundo apud flav-oranĝa floro. Li rigardas ĝin penseme.

- Vi estas bela, vi aspektas kiel la suno, kiu brilas sur vin. Ĝi certe amas vin tre multe.

Kaj ĉu iu amas min denove?

- Floro, mi amis viron, mi fidis lin, sed li forlasis min kaj forgesis... Aŭ eble io okazis al li kaj li ne povas voki min por protekti lin, kiel antaŭe? Mi ne scias. Tial mi estas trista. Mi atendas...

Floro, vi donas al mi esperon, dankon!"


LETERO DE LAJKA

- Saluton iam trista hundo, nun feliĉa! Mia nomo estas Lajka, sed oni nomas min La ridetanta. Jes, mi ridetas al la gastoj de mia homa patrino, ĉar mi estas feliĉa. Mi havas domon kun ĝardeno, kie mi ludas libere. Oni min amas kaj mi amas...

Mi gardas en mia memoro, ke iam iu el nia familio flugis al la Kosmo. Vi povas vidi tion en la Muzeo. Grava paŝo! Ni, la hundoj, estas kuraĝuloj, ne forgesu tion!

Estu fieraj kaj fortaj kaj ĉiam gardu en vi la Amon!

Via nova postsekvantino Lajka.



LETERO AL LA FLAV-ORANĜA FLORO

- Saluton floro, dankon pro la espero, kiun vi donis al mi, sed anstataŭ atendi, kiel mi diris al vi tiam, mi decidis serĉi mian homan patron. Kaj mi promenis laŭ la stratoj, kie ni kutimis iri kune. Li ĉiam parolis al mi, diris al mi la nomojn de la lokoj, preter kiuj ni pasis, nu, mi ne komprenis ĉion, sed mi memoris. Kaj unu tagon mi alvenis al granda domo kun alta barilo kaj gardisto ĉe la enirejo. Mi vidis kelkajn grandajn aŭtojn kun ruĝa kruco sur ili enirantaj kaj elirantaj el ĝia korto. Io ekbrilis tra mia menso - jes, ĉi tio estis Hospitalo, kie malsanuloj kuŝas. Mi provis eniri, sed la gardisto haltigis min, li diris: "Ĉi tio estas por homoj, ne por bestoj!" Mi iris kun li al bestohospitalo kaj mi scias por kiu ĝi estas. Sed nun mi devis akcepti ĝin kaj atendi. Mi haltis apud la barilo kaj komencis sendi pensojn pri sano. Paĉjo kutimis diri, ke pensoj atingas ĉien, ĉar ili estas tre fortaj kaj ĉiam devas porti amon. Li sciis, ke mi amis lin pli ol eĉ min mem.

Do unu tagon okazis la miraklo, mi vidis lin eliri el la pordo de ĉi tiu granda domo kaj mi ĵetis min al li. Mi protektos lin multe pli nun!

- Floro, mi jam ne estas malĝoja, sed feliĉa, dankon denove! Daŭrigu brili tiel por ĝojo kaj espero por aliaj.

Via admiranto - La iama malĝoja hundo. ♦

LETEROJ EL LA KOSMO (4)

Daŭrigante la enhavon de numero 013

DANCOJ KUN LILI

Elena Popova



Amiko, ĉu vi memoras mian rakonton pri la planedo Florkrono? Mi revenis por gastigi tie ĉi denove, ĉar mia nova amikino Lili invitis min.

Ni flugis kun la bela Lili. Sub ni estis urbo, kiu aspektis, kiel floranta arbaro.

Tie, Lili indikis al mi la balĉambron.

Ĝi estis granda palaco kun malfermitaj haloj. Mi vidis homojn, spiritojn de floroj kaj arboj, kiuj dancis. Ŝajnis al mi, ke la domoj ĉirkaŭe kaj la palaco mem dancas... Kvazaŭ, ili estis faritaj el arbustoj kaj arboj, de kiuj floroj pendis. Iliaj koloroj estis de la plej helaj ĝis la apenaŭ rimarkeblaj nuancoj kaj dum la nokto ili brilis, kiel steletoj. Jes, mi certas, ke tiaj domoj ankaŭ dancis!...Ĉie odoris je floroj...

Kiam ni eniris la unuan halon, ni tuj estis ĉirkaŭitaj de ŝiaj geamikoj. Ili gratulis min kaj enigis min en la dancon. Mi demandis Lili-n kaj ŝi tuj respondis al mi:

—Ili scias, ke vi estas nia gasto. Estas nenio kaŝita sur la planedo. Sur la tero, kiam homoj el aliaj landoj gastas al vi, ĉu vi kaŝas ilin?

—Mi ne scias, ankoraŭ neniu venis en mian domon...— mi donis konfuzan respondon...

—Ĉu vi nenien vizitis?

—Ankoraŭ ne! ... Sed unue mi devas lerni fremdajn lingvojn, ĉar sur la Tero ni ne povas komuniki alimaniere, ĉar ĉiu nacio havas sian propran nacian lingvon. Ĉe vi estas facile, ĉar vi parolas unu kun la alia pense...

La muziko portis min, kiel birdan plumon, mi sentis min tiel malpeza.

Mi vidis min en unu el la grandaj speguloj. Ho, miraklo! Ĉi tie mi estis tre bela, radianta lumon, kiel ili. Mi ne povas klarigi ... Ĉi-foje iu Spirito turniĝis al mi: —Mi vin petas, kiam vi revenos al la Tero, lernu florkulturon! Vi estos sanaj kaj feliĉaj...

Mi havis la senton, ke mi amas onin kaj oni min amas, ke mi povas fari tiom da Bono... Mi pleniĝis je magia potenco... Eble ĉi tiu planedo kaj la loĝantoj estas magiistoj? Mi ne scias!

Kiam ni foriris, Lili diris al mi: —Miaj geamikoj kaj la Spiritoj de la floroj akceptis vin, ĉar vi estas bona homo.

Sed mi preskaŭ ne parolis kun ili, mi nur prenis ilian mesaĝon...

—Vi radias amon, kaj ni scias ĝian koloron...

Ŝi diris al mi nenion pli, kaj mi ne demandis. Mi ne povas priskribi per vortoj tion, kion mi vidis kaj sentis ĉi tie...

Via amiko Nikolao



LA HISTORIO DE FLORKRONO

En nia nova renkontiĝo, Lili rakontis al mi la historion de sia planedo.

—Niaj prapatroj iam loĝis sur planedo kun tre severaj kondiĉoj. La klimato estis seka somere — homoj kaj bestoj malfacile travivis soifon kaj malsaton. Ne estis sufiĉe da akvo. Vintre la malvarmo estis neeltenebla. La vivo de ĉiuj estis en konstanta danĝero. En la lukto por postvivado la plej malbelaj sentoj en homoj pliiĝis. Nenio helpis. Teknike, ĉi tiu civilizacio estis tre progresinta — ili havis kosmoŝipojn ..

La ideo elmigri al alia planedo jam maturiĝis en la menso de sciencistoj kaj regantoj. Kaj baldaŭ estis trovita la taŭga loko— nia nuna planedo. La dezirantoj subskribis kontraktojn. Al la fino, ili ĉiuj kolektiĝis en tri kosmoŝipojn. Kaj se mi dirus al vi, ke tre junaj homoj kaj la infanoj superregis, vi certe komprenas la kialon — la vojo de malbono devis esti trairita... La junuloj havis purajn korojn kaj animojn, neniajn memorojn pri la pasinteco...

Kiam ili alvenis kaj vidis la novan planedon, la geniulo kiu malkovris ĝin, kriis: “Ho, ĝi aspektas kiel florkrono!...”

—Ni do nomu ĝin “Florkrono”! — proponis iu poeto. Kaj tial ili donis la nomon, kiun ni uzas ĝis nun. Ĉiuj eklaboris, laŭ siaj fortoj kaj scioj...

Pri la unuaj konstruantoj estas konservitaj dokumentoj en la kreita arĥivejo.

La baza leĝo estas amo, kaj ĝi kondukas al ĉiuj aliaj bonaj pensoj kaj agoj.

Ni kreis internajn barojn kontraŭ la malbono kaj ni ne permesas al ĝi penetri de la ekstero. Sekve, ĉiuj, kiuj provas veni sur la planedon, estas unue kontrolataj, kun kiaj pensoj kaj sentoj ili venas, kun kiaj intencoj ...

Mi aŭskultis ŝin kaj pensis, ke ili lasis min veni tre facile, sen koni min, kaj mi ne komprenis la kialon. Ŝi, kiel ĉiam, legis mian penson:

—En la momento, kiam vi trovis nin kaj decidis veni al ni, la sekurecaj fakuloj legis vian spacan dosieron. Mi diris al vi, ke vi radias amon kaj ĉi tiu amo estas via pasporto.

—Ĉu vi scias ion pri la planedo, kiun vi forlasis?

—La loĝantoj de ĉiu planedo respondecas pri tio, kio okazas tie — ĉiu individue kaj ĉiuj kune. Ilia sorto dependas nur de ili ... Ni ĉiuj estas ligitaj, ĉi tio devas memori ĉiujn, negrave kie ili loĝas. Ĉar ne nur el la agoj restas spuroj, sed ankaŭ la vortoj kaj pensoj flugas en la spaco kaj helpas aŭ damaĝas ĉiujn.

Jen kion mi eksciis de mia lasta vizito.


Via amiko Nik ♦

daŭrigota



Festi la 90-an naskiĝtagon de Elena Popova!

Julian Modest, Rita Mkrtĉjan, Lilia Nikolova, Lode Van de Velde, Erika Godó, John Huang, Helga Plötner



KARA SINJORINO POPOVA,

Okaze de via jubileo mi kore deziras al vi sanon, energion kaj novajn Esperanto-librojn. Vi estas talenta bulgara kaj Esperanta verkistino. Viaj Esperantaj libroj estas legataj de multaj esperantistoj en diversaj landoj de la mondo. Viaj bulgarlingvaj libroj ĝojigas junajn kaj maljunajn legantojn, ĉar en ili vi esprimas vian profundan amon al la homoj, viajn noblajn ideojn, ke la homoj devas kompreni unu la alian, vivi harmonie, amike, pace. Viaj libroj por infanoj estas ekzemplo por edukado kaj instruado. En ili vi delikate aludas la eternajn homajn valorojn, kiuj montras al la infanoj kiel ili devas vivi kaj agi, kiel ilia vivo estos bona kaj utila.

Via plej grava misio estas verki. Vi daŭrigu la verkadon, kiu estas fonto de ĝojo kaj anima lumo.

Sincere via: Julian Modest

En nia vivo ni kutime sendas bondezirojn al niaj familianoj, geamikoj, gesamideanoj, okaze de iu festo, iu memorinda dato, okaze de iu sukcesa aŭ feliĉa evento. 90-jariĝo de iu homo ĝenerale estas ege bonega dato por ĉiuj, kiuj konas ĉi tiun personon.

Kaj mi tutkore kaj sincere deziras al Elena Popova bonajn tagojn en tiu ĉi jaro, deziras, ke dum venontaj kaj postaj jaroj ni ankaŭ sendu al ŝi bondezirojn.

Bondeziroj pri sano, pri daŭra verkado, pri bona ripozo en rondo de gefamilianoj, geamikoj, en rondo de gesamideanoj, en reala kaj virtuala mondo. Estis bona ideo kolekti ĉiujn bondezirojn en unu paĝaron de la revuo. Kvankam persona paĝo de ĉiu el la geamikoj, en unu tago de la jaro ankaŭ iĝas "tabulo" por bonaj vortoj, sed ĉi foje okazas pli festene.

Mi ekmemoris, ke en la tendaroj dum antaŭaj jaroj estis bona tradicio skribi siajn bondezirojn sur la ĉemizo de la "heroo de la festo". Estu por Elena Popova kolekto de niaj bondeziroj sama "ĉemizo" kun memorindaj belaj vortoj!

Kaj denove (oni diras, ke bonaj vortoj neniam havas limigitan kvanton) — sanon, bonan amikaron kaj longan vivon!

Rita Mkrtĉjan

Elena Popova

solene scipovas

verki por kaj pri infanoj,

Naturo, samideanoj.

Per ŝia plumo

ekparolas la luno,

beleco kaj bono

serĉas sinkronon.

Al la verkanta saĝulino

bonfarton, ĝuon subliman!

Al Elena Popova

benon al suproj novaj!

Lilia Nikolova

Kara Elena,

Malfacilas kredi, ke vi fariĝis 90-jara! Via pensmaniero ĉiam impresas junece vigla kaj klara, kaj samtempe sidas en vi spirito, kiun oni nomas 'maljuna', pro la saĝo, kiun ĝi entenas, kaj kiu videblas en viaj verkoj. Mi havis la honoron eldoni 2 viajn librojn, kaj mi povis mem sperti vian afablecon, respektemon kaj modestecon. Malavare vi laŭdas aliajn esperantistojn, tamen nun, la laŭdoj iru al vi, ĉar ankaŭ vi meritas.

Mi kore deziras al vi ĉion bonan, okaze de via naskiĝtago.

Sincere,

Lode Van de Velde

Kara Elena!

Okaze de via 90-jariĝo mi tutkore kaj plej varme gratulas vin kaj esprimas al vi mian profundan respekton!

Kiel kunĉefredaktoro de Literatura Vivo, mi havas la ĝojon ofte legi kaj redakti viajn kontribuojn senditajn al Erika. Per tio mi ĉiam pli bone konas kaj aprezas vian literaturan talenton, vian riĉan vivsperton kaj vian senĉesan kreemon.

Estas por mi ankaŭ granda ĝojo, ke mi prepariĝas helpi pri la eldono de viaj verkoj Leteroj el la Kosmo kaj ĝia daŭrigo Novaj Leteroj el la Kosmo. Mi esperas, ke per ilia eldono ankoraŭ pli da esperantistoj povos konatiĝi kun via literatura mondo kaj ĝui la fruktojn de via longjara verkado.

Naŭdek jaroj estas vere respektinda mejloŝtono de riĉa vivo. En ĉi tiu speciala tago mi deziras al vi antaŭ ĉio bonan sanon, serenon koron, daŭran kreemon kaj ĉian bonon. Mi esperas, ke vi plu verkos, kreos kaj ĝojigos niajn legantojn per viaj verkoj dum multaj venontaj jaroj.

Feliĉan 90-an naskiĝtagon, kara Elena!

Kun plej alta respekto kaj plej koraj bondeziroj,

John Huang

Kunĉefredaktoro de Literatura Vivo

Kara Elena!

Okaze de via 90-jariĝo mi sendas al vi miajn plej korajn gratulojn, kun granda respekto kaj dankemo.

En la vivo ni renkontas multajn homojn, sed nur kelkaj lasas en nia koro vere specialan spuron. Vi estas unu el tiuj homoj por mi.

Mi estas aparte dankema al vi pro tio, ke vi iam subtenis min, interesiĝis pri mia laboro kaj faris kun mi intervjuon. Estis por mi granda honoro, ke nia interparolo poste aperis en via libro. Por mi ĝi ne estis nur intervjuo, sed ankaŭ signo de via fido kaj de via intereso pri miaj pensoj, miaj verkoj kaj mia vojo en la mondo de literaturo kaj Esperanto.

Dankon pro via atento, via afableco kaj la subteno, kiun vi donis al mi. Mi konservas tiujn memorojn kun granda ĝojo kaj dankemo.

Naŭdek jaroj estas riĉa kaj longa vojaĝo, plena de spertoj, renkontoj kaj memoroj. Mi deziras al vi, ke ĉi tiu speciala naskiĝtago estu plena de amo, ĝojo, sereneco kaj belaj momentoj kun la homoj, kiuj amas kaj estimas vin.

Mi deziras, ke vi ĉiam sentu, ke ĉio, kion vi donis al aliaj dum via vivo, daŭre vivas en iliaj koroj.

Feliĉan 90-an naskiĝtagon, kara Elena!

Kun granda amo, respekto kaj dankemo,

Erika Godó

Ĉefredaktoro de Literatura Vivo

Kara Elena, bonega verkistino,

via amikino, via portretistino Helga gratulas tutkore okaze de via 90-a naskiĝtago kun tutkoraj bondeziroj por sano, forto kaj vivĝojo. Havu belegan naskiĝtagon!

Fartu bone!

Danke al mia unua ruĝkovrila libro "Esperanto por mi, 16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner" de eldonejo HORIZONTO vi estis inter tiuj 16 aktivuloj kaj ni tuj amikiĝis per sinceraj retleteroj.

Dankon al vi pro via fidela amikeco!

Sciu ke nun eldoniĝis tiu 11-a libro kaj iam baldaŭ eldoniĝos nia 12-a libro kaj iam nova interesa libro pri rakontoj pri mia biografio kun fotoj de eldonejo HORIZONTO, tiun nun redaktas nia genia japana amiko HORI Jasuo.

Antaŭĝoju pri la bela kovrilpaĝo, tiun jam kreadis amiko fotisto John HUANG.

Vi verkis kaj kreadis multon valoran!

Havu nian grandan dankon kaj gratulojn!!!

Sincere amike **Helga Plötner**

via HELLI KUN MANNI kaj filino JANI. ♦

Sidu kun ni

Erika Godó



Unu staras, du sidas sur benko,
ili ridetas en la suno kaj vento.
„Venu, amikino, ne iru for,
sidu kun ni, malfermu la kor’!”

La benko atendas, la loko estas libera,
la tago fariĝu iom pli bela.
Ĉu vi estas ĝoja aŭ iom malgaja,
ĉi tie vi trovos kompanion agrabla.

Tri virinoj gardas la urbon kun spaco,
Miskolc salutas per ĝia palaco.
Unu staras, du sidas kun paco,
kaj la benko invitas vin kun graco.

Ĉar ĉiu libera loko havas celon:
doni al homo ripozon kaj esperon.
Kaj se vi demandas: „Kial ili invitas min?”
La respondo estas simpla: „Nur sidu kun ni!”

*La poemo temas pri „Miskolcaj knabinoj” kiu estas unu el la konataj skulptaĵoj de urbo Miskolc en Hungario. Foto farita de John Huang.

Intervjuo al Larysa Osadchuk

Erika Godó



1. Kiam kaj kiel vi unuafoje ekinteresiĝis pri origamio?

Antaŭ pli ol 30 jaroj mi unuafoje ekinteresiĝis pri origamio, dank' al renkonto kun elstara origamiisto kaj matematikisto, universitata instruisto Miĥail Maksimoviĉ Litvinov. Tiam mi laboris en la Moskva infana teatra centro „Teatro sur la Bordo“. Miĥail Maksimoviĉ loĝis proksime kaj venis al nia centro por lasi kelkajn aĵojn por la teatro. Li rakontis pri origamio kaj montris malgrandan kolekton de modeloj. La temo montriĝis tiel alloga, ke post kelkaj tagoj mi venis al la Moskva origamia klubo, kiun li tiam gvidis.

Mia vivo pleniĝis per novaj koloroj, formoj kaj signifoj. Multajn jarojn poste, jam en Ukrainio, post kelkaj el niaj lecionoj, unu dekjara knabino ekkriis: „Kiel mi povis antaŭe vivi sen origamio?!“ Ion similan mi mem sentis post miaj unuaj vizitoj al la klubo.

2. Kio kondukis vin al Esperanto?

Tio estas jam alia historio, eĉ pli fascina kaj instrua. La unuan fojon mi aŭdis pri Esperanto ankoraŭ pli frue ol mi konatiĝis kun origamio. Pri ĝi rakontis al mi kun granda entuziasmo mirinda esperantisto el Maĥaĉkalao, talenta lingvisto kaj ĵurnalisto, Aĥman Junusov. Mi tiam aŭskultis lin kun intereso, sed pensis: „Sed ja tio estas mortinta lingvo, malantaŭ ĝi estas nenio — nek popolo, nek kulturo... Por kio ĝi utilis al mi?“ Tio estis klasika ekzemplo de psikologia rezisto kontraŭ internacia lingvo, priskribita de Claude Piron en artikolo kun la sama titolo.

Pasis ĉirkaŭ dek jaroj, kaj ni denove renkontiĝis kun Aĥman. Ankaŭ ĉi-foje io malhelpis min aliĝi al la Esperanto-movado. Kaj nur multe pli poste, en mia naskiĝurbo Kievo, mi hazarde eksciis, ke Esperanto-klubo troviĝas... nur du paŝojn de mia hejmo. Tio estis destino.

„La sorto kondukas la obeantojn, sed trenas la malobeantojn,“ diras proverbo.

Mi estis tiel surprizita, ke mi tuj ekstudis Esperanton.

3. Kiel renkontiĝis en via vivo origamio kaj Esperanto?

Ĉi tie la „malbonan rolon“ ludis mia pasinteco. Laŭ mia unua profesia edukado mi estas biologo (molekula genetiko). La kutimo kompari kaj analizi helpis min vidi, ke origamio kaj Esperanto havas multon komunan: ambaŭ memorigas pri konstru-ludo, ambaŭ baziĝas sur la principo de la necesa kaj sufiĉa, ambaŭ postulas logikon kaj precizecon, ambaŭ kunigas homojn kaj favoras komunikadon, kaj ambaŭ povas „plibonigi la mondon“. Tiu esprimo estas ofte uzata de esperantistoj, kiam ili difinas siajn celojn kaj taskojn.

Kunigante siajn fortojn en tiaj kampoj kiel edukado, agnosko de universalaj homaj valoroj, kultura interŝanĝo kaj aliaj, esperantistoj kaj origamiistoj povus plenumi tiun taskon duoble pli rapide.

4. Kion Esperanto donis al vi persone?

Tiu ĉi demando tuŝas plurajn aspektojn. Unuflanke, Esperanto estas por mi unika inventaĵo, kvazaŭ artaĵo en la kampo de lingvistiko. Ĝi estas komunikilo, kiu plej bone respondas al sia celo — esti rimedo por internacia komunikado. Ĝin elpensis Ludoviko Zamenhof, saĝa kaj bonkora homo, kiu volis, ke la internacia lingvo simulu al ludo, donu ĝojon kaj kunigu homojn — kaj li sukcesis. Tial Esperanto vekas en mi apartan estetikan senton, similan al tiu, kiun oni spertas admirante artverkon aŭ sciencan malkovron.

Aliflanke, dank’ al Esperanto, en mian vivon venis homoj, kies renkonton mi tre alte taksas. Kaj estas ankoraŭ unu tre grava afero: aperis en mi la sento esti parto de ia utila, bela kaj preskaŭ senespera entrepreno, kiun tamen oni volas helpi realigi.

5. Kion origamio donis al vi, kion vi ne povus trovi aliloke?

En origamio la belecon de la formoj difinas matematiko, pli precize geometrio, laŭ kies leĝoj estas konstruita nia mondo. Jen kio faras ĉi tiun arton unika: ĝi samtempe estas scienco kaj moderna teknologio.

Kaj krome origamio memorigas pri magiaĵo, pri konstru-ludo, en kiu la reguloj estas mirinde simplaj, dum la rezulto surprizas per sia perfekteco.

En origamio ekzistas ankaŭ elemento de antaŭdetermino. Iu sprita homo rimarkis, ke, praktikante origamion, oni estas kvazaŭ „kondamnita“ sukcesi. Se oni faldas precize, sekvante la instrukciojn, la pozitiva rezulto ĉiam estos atingita. Kaj tio ne povas ne ĝojigi.

Origamio proksimigas homojn, servante kiel nevorta lingvo de komunikado por introvertuloj kaj aŭtistoj. Ĝi estas sukcese uzata en pedagogio kaj artterapio. Ĉiuj ĉi tiuj temoj estas proksimaj al mi.

Kaj, kompreneble, min ankaŭ fascinas tio, ke en origamio la rezulto estas atingata per minimumo da rimedoj: funkcias nur du formokreaĵ faldoj — la „valo“ kaj la „monto“ — plus kelkaj simplaj reguloj, kies ŝlosilaj vortoj estas precizeco kaj simetrio.

6. Vi naskiĝis en Ukrainio kaj nun loĝas en Francio. Kiel tiu sperto influis vian laboron kaj vian mondrigardon?

En Ukrainio dum 14 jaroj mi gvidis la Kiev-an Origami-Klubon. Ni ĉiujare organizis internacian ekspozicion kun laborrenkontiĝoj kaj seminarioj por instruistoj el ĉiuj regionoj de Ukrainio, kun partopreno de elstaraj majstroj el Japanio, Rusio, Ukrainio kaj Moldavio.

En Francio mi daŭrigis la popularigadon de origamio kiel arto kaj scienco, fondinte malgrandan asocion «Animation Création Culture Origami». Krome, dum pluraj jaroj mi mem povis partopreni en internaciaj renkontiĝoj de origamistoj en Francio (MFPP kaj OORAA), kun prezentoj kaj laborrenkontiĝoj, kaj ankaŭ prezenti verkojn de elstaraj origamistoj el Ukrainio.

7. Ĉu via ukraina deveno influas vian rilaton al Esperanto kaj al la ideo de internacia paco?

Mi eklernis Esperanton fine de 2011. Tiutempe la situacio en mia lando estis relative trankvila, kaj la principo de paca internacia kunekzistado ŝajnis neŝancelebla. Post tri jaroj ĉio tragedie ŝanĝiĝis por Ukrainio, kaj ankoraŭ post ok jaroj komenciĝis la milito, kiu daŭras ĝis nun.

Nun, laŭ mia opinio, la disvastigado de Esperanto, kiu portas pacon, fariĝis eĉ pli aktuala.

8. Kiu estis la plej grava momento en via origamia kariero?

Estis multaj okazoj, kiuj montris al mi la evidentan utilon de origamio. Sed unu el ili aparte restis en mia memoro.

Mi instruis origamion en elementa eksperimenta lernejo, kie oni unue celis doni al la infano metodojn por lerni ĉiujn lernobjektojn, kaj nur poste la koncernan lernmaterialon. Ne ĉiuj infanoj tion facile akceptis kaj sentis sin tute komforte.

Kaj jen, dum origamia leciono, unu knabino inventis modelon de muŝo. La muŝo estis prezentita al la tuta klaso, kaj la infanoj ĝojis kaj gratulis la aŭtorinon.

Post la leciono tiu sesjara knabino alproksimiĝis al mi kaj diris: «Ĉu vi scias, en mia vivo mi neniam sukcesis pri io... kaj jen, nur origamio...»

Jen tio restis en mia memoro.

Origamio donas fidon al si mem kaj al siaj propraj kapabloj. Nun tiu knabino jam delonge estas plenkreska kaj fariĝis bona psikologo.

9. Kiu estas via plej ŝatata origamia verko kaj kial?

Estas grandega kvanto da belegaj origamiaj modeloj. Ilian nombron oni povus kompari kun la nombro de steloj en la Universo. Kaj ĉiutage aperas novaj.

Tial estas pli facile diri, kion mi ŝatas kaj aprezas en la verkoj de veraj majstroj de origamio: la originalecon de la ideo kaj de ĝia realigo, ekzemple ĉe origamistoj kiel Sébastien Limet aŭ Huang Xiaoxian; la senton de origamio en la kunteksto de historio kaj filozofio, kiel ĉe Kunihiro Kasahara kaj Joan Sallas; kaj la ludeman elementon en moveblaj modeloj — modelo-truko, modelo-spektaklo.

10. Kio estas por vi pli grava: la arta rezulto aŭ la procezo de faldado?

Mi havas ne multajn proprajn origamiajn verkojn. Mi estas pli ĝuste populariganto kaj instruisto de origamio ol dizajnisto.

Mi tre ŝatas la belecon de la logiko de faldado, kiam la principo de necesa kaj sufiĉa permesas ekvilibrigi la gradon de komplekseco kaj simpleco de la modelo. Tiam kaj la procezo kaj la rezulto havas apartan valoron.

11. Kion vi lernis pri homoj per instruado de origamio en diversaj landoj?

Estas interese rimarki, ke faldado de origamio, sendepende de la lando, en kiu ĝi okazas, forigas la limon inter plenkreskuloj kaj infanoj. Infanoj iomete «plenkreskiĝas», dum en plenkreskuloj vekigās la «interna infano». Tio, interalie, helpas solvi iujn psikologiajn problemojn, kreas atmosferon de fido kaj plibonigas komunikadon.

12. Kia estas via plej granda revo por la estonteco de EsperOri?

Mi ŝatus, ke, kunlaborante, esperantistoj kaj origamistoj povu trovi konvinkajn argumentojn por enkonduki origamion kaj Esperanton en lernejojn de ĉiuj niveloj, de infanĝardeno ĝis universitato. Tio povus multmaniere plibonigi la kvaliton de edukado, ĉar ambaŭ tiuj fakoj funkcias kiel akceliloj de lernprocezoj.

Estus bonege, se Esperanto fariĝus helpa «amika» lingvo dum internaciaj renkontiĝoj de origamistoj, kaj poste ankaŭ de aliaj homoj. Ja temas pri lingvo, en kiu oni povas facile kaj ĝoje komuniki «samnivele», sen devi zorgi pri la komplikaĵoj de tradukado al la angla, kiu postulas multe pli da peno.

Ekzistas iom da pozitiva sperto pri instruado de Esperanto per origamio. Mi verkis pri ĝi en la artikolo «Origamio facila kaj motiviga interaktiva ilo por instrui Esperanton», kiun mi verkis por la konkurso Mauro La Torre pri metodoj de instruado de Esperanto en 2024.

Eble tiu metodo ŝajnos al iu perspektiva — kaj pri tio mi estus tre ĝoja.

13. Kion signifas por vi la vorto “paco”?

Tiu demando estas samtempe simpla kaj malfacila. Ĉiuj scias, kio estas paco. Sed kiel ĝin atingi?

Ĉu per rekta malpermeso de militoj fare de potenca internacia organizaĵo de la estonteco, kiu kontrolus la aperon de konfliktaj lokoj? Ĉu per speciala eduka sistemo, kiu igus eĉ la penson pri milito neakceptebla?

En la dua kazo, la ideo de Esperanto ricevas brilan realigon. Kiu scias, ĉu iam sukcesos mallongiĝi la homa avideco kaj krueleco? Ĉu estos interesita pri paco Artefarita Inteligenteco, kiu ŝajne iom post iom anstataŭas la homaron?

14. Origamio devenas el Japanio, dum papertranĉado havas longan tradicion en Ĉinio. Ambaŭ transformas simplan paperfolion en riĉajn artajn formojn. Laŭ vi, kiajn artajn principojn kaj komunajn trajtojn ili havas?

Origamio devenas el Japanio, dum papertranĉado havas longan tradicion en Ĉinio. Ambaŭ transformas simplan paperfolion en riĉajn artajn formojn. Laŭ vi, kiajn artajn principojn kaj komunajn trajtojn ili havas?

Se mi ne eraras, origamio unue aperis en Ĉinio kaj nur poste fariĝis tradicia japana arto pro certaj filozofiaj kaj religiaj kialoj.

En klasika origamio ekzistas malpermeso tranĉi la paperon. Tio devenas de antikvaj imagoj pri tio, ke la mondo estas unu tuto, same kiel kvadrata paperfolio, kaj ke en ĝi, en kaŝita formo, ĉeestas ĉiuj eblaj formoj.

Origamio estas kvazaŭ funkcia modelo de tiuj imagoj. Tial oni ne rajtas tranĉi la kvadraton, por ne rompi la integrecon de la mondo.

15. Origamio kaj la hungardevena Rubik-kubo ambaŭ postulas spacan imagopovon, logikan pensadon, paciencon kaj kreemon. Laŭ vi, kion ili havas komunan en la disvolvado de inteligento kaj spaca pensado?

Ili ambaŭ egale engaĝas ambaŭ manojn. Tia praktikado kontribuas al harmonia disvolviĝo de la maldekstra kaj dekstra cerbaj hemisferoj kaj plibonigas kaj logikan kaj imagan pensadon.

Origamio ĝenerale disvolvas emon serĉi la optimuman solvon de ĉia problemo. Verŝajne ankaŭ ekzercoj per la Rubik-kubo faras saman.

16. Kiel oni povas transformi literaturan verkon en origamian artaĵon?

Nu, ekzemple, oni povas presi tekston sur kvadratan, rektangulan, triangulan aŭ rondan paperfolion kaj poste faldi el ĝi origamion. Aŭ uzi "senfinan" folion kaj faldi teselacion kun teksto...

17. Ĉu origamio povas esti nova formo de literatura esprimo?

Kial ne? Se oni skribas hajkon sur paperfolio kaj poste faldante faras el ĝi modelon iel ligitan kun la enhavo aŭ kun iu asocio de la hajko, povas naskiĝi verko kun novaj, aldonaj signifoj.

18. Kio estas komuna inter poemo kaj origamio: vortoj kaj faldoj kiel manieroj esprimi emocion?

En origamio kaj en poezio ekzistas ritmo. Ĝi povas esti mezurita kaj ripetiĝanta, aŭ ĵetata, dinamika. Tion oni povas transdoni per la faldoj de konkreta aŭ abstrakta modelo.

En origamio oni povas krei tutan komponaĵon, eĉ el unu duflanka folio, kaj ĝi povas vekti tiun aŭ alian emocion. En origamio, same kiel en poezio, povas kaŝiĝi io nedirita...

Estas ankaŭ alia aspekto: poeziaj ritmoj kaj faldado de modulaj origamiaj modeloj estas sukcese uzataj en artterapio.

19. Ĉu origamio povas rakonti historion sen vortoj, kaj ĉu literaturo povas inspiri la formon de origamia verko?

Jes. Iuj modeloj aŭ origamiaj komponaĵoj povas krei certan etoson aŭ humoron kaj doni komencon al rakonto, kiun oni povas elpensi rigardante ilin.

Sed ekzistas ankaŭ origamiaj fabeloj, kiam dum la faldado oni rakontas historion, kio faras la meman faldadon pli alloga kaj pli facile memorebla.

Literaturo, siavice, povas inspiri la kreadon de origamia modelo, komponaĵo aŭ eĉ spektaklo en origamia tekniko.

Mi, ekzemple, sukcesis trovi origamian solvon por pup teatraĵo bazita sur la muzika fabelo «Petro kaj la Lupo» de Sergej Prokofjev. La projekto estis realigita en kelkaj lernejoj, kaj kiel teatraĵo, kaj kiel mallonga animacia filmo en la haltmoviĝa tekniko.

La videon oni povas trovi en YouTube.

20. Kial vi decidis kunigi Esperanton kaj origamion en unu internacia kongreso?

La ideo kunigi origamion kaj Esperanton estis esprimita jam en 2018 dum la Universala Kongreso en Lisbono. Tiam formiĝis la grupo EsperOri, kaj fine de 2019 ni komencis okazigi ĉiudimanĉajn retajn kunvenojn kun la subteno de la Irana Esperanto-Asocio (IrEA).

Dum tiuj internaciaj retaj kunvenoj ni prezentis iun sciencpopularan temon kaj poste faldis origamian modelon ligitan al tiu temo. La kunvenoj okazas en Esperanto, kun traduko al aliaj lingvoj, se necese.

Estas interese rimarki, ke tiuj renkontiĝoj kunigas esperantistojn kaj neesperantistajn origamistojn — origamiinstruistojn el diversaj landoj, kiuj tiel pasive lernis Esperanton. Iuj el ili kun la tempo eĉ gvidis siajn atelierojn pri faldado de modeloj, kun komentoj en Esperanto.

Nun venis la tempo renkontiĝi ankaŭ persone: por interparoli, interŝanĝi spertojn, pripensi manierojn enkonduki origamion kaj Esperanton en lernejojn kaj universitatojn, kaj ankaŭ prezenti tiujn du utilajn aktivaĵojn al pli vasta publiko.

21. Kiel origamio povas helpi en la instruado kaj lernado de Esperanto?

Origamio kaj Esperanto laŭ sia funkciado iom similas al ludo-konstruilo. Tio ebligas uzi multajn origamiajn modelojn por vide kaj konkrete demonstri gramatikon kaj vortfaradon en Esperanto.

Faldado de simplaj modeloj povas helpi al aŭskultokompreno kaj al memoro de vortoj ligitaj al direktoj kaj movoj, al la uzo de la prefikso «mal-» kaj tiel plu.

Krome, simplaj origamiaj modeloj, facile fareblaj por ĉiuj, povas esti utila vida subteno kaj konkreta lernilo por studi kolorojn, formojn, gradojn de komparo, verbotempojn kaj multajn aliajn temojn.

Tiu metodo engaĝas plurkanalan perceptadon, utiligas ĉiujn pedagogiajn avantaĝojn de origamio kaj kontribuas al pli efika lernado. Pri ĉio ĉi eblas legi en la artikolo por la konkurso M. La Torre, kiun mi menciis supre.

22. Kiaj estas la plej interesaj spertoj de la sesjaraj retkunsidoj „EsperOri“?

Dum tiu tempo ni sukcesis ellabori tian aliron, kiu interesas kaj esperantistojn kaj neesperantistajn origamistojn. Post la prezento, la esperantistoj povas interŝanĝi opiniojn pri la proponita temo, dum la origamistoj samtempe pasive lernas Esperanton.

En la lastaj jaroj ni provas komence de ĉiu prezento mallonge klarigi la bazajn regulojn de Esperanto, kaj kelkaj aparte lertaj origamistoj kaptas ilin tuj. Iuj jam gvidis siajn proprajn atelierojn en Esperanto.

La grupo estas malfermita al ĉiuj. Oni povas ekscii la temon kaj aliĝi per la dimanĉaj anoncoj en Eventa Servo, je la 20-a horo, sub la titolo «Origamio kaj Esperanto. Ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro?»

23. Ĉu vi opinias, ke origamio povas esti utila ankaŭ en artterapio? Kiel?

Jes. Origamio estas uzata en artterapio jam de pli ol tridek jaroj. En 1991 aperis la unua kolekto de sciencaj artikoloj de la Unua Internacia Konferenco «Origamio en pedagogio kaj artterapio», en kiu kuracistoj kaj psikologoj dividis sian praktikan sperton pri la aplikado de origamio en artterapio. Ili eĉ proponis nomon por tiu pozitiva sperto: «Origamia vivmaniero», tiel impresaj estis la rezultoj.

En 2006, dum internacia konferenco en Kievo, organizita de la Asocio de Artterapiistoj de Ukrainio, mi en mia prelego unuafoje atentigis pri tio, ke origamio ebligas samtempe uzi multajn diversajn metodojn, kiujn artterapiistoj kutime aplikas aparte: terapion per koloro, formo kaj ritmo, rakontadon de fabeloj, teatron, pupterapion, laboron kun maskoj kaj tiel plu.

Ĉio ĉi ebligas konsideri origamion kiel integran metodon en artterapio.

24. Kiel vi imagas la kunlaboron inter esperantistoj kaj origamiistoj post EsperOri-2026?

Mi ankoraŭ ne scias precize. Ideoj povas aperi dum la Kongreso.

Unu el la eblaj komunaj projektoj povus esti propono al lernejoj pri integra programo, kiu kunigus origamion, Esperanton kaj kelkajn aliajn utilajn aktivaĵojn, ekzemple sorobanon kaj jogon. Ili, kiel kataliziloj, povus kontribui al pli rapida akiro de scioj, fari la lernejan edukadon pli efika kaj pli ekologia.

25. Kian konkretan rezulton vi plej ŝatus atingi per la unua EsperOri-kongreso?

Mi tre ŝatus interesi origamistojn pri Esperanto. Plejparte ili estas scivolemaj, komunikemaj kaj kreemaj homoj. Ili povus havi grandan influon sur la disvastigo de Esperanto en la mondo.

Mi esperas, ke ni povos daŭrigi niajn retajn kunvenojn kaj unufoje jare kunvenigi Kongreson. Mi ŝatus kredi, ke tia formato fariĝos efika maniero konigi origamion kaj Esperanton al instruistoj kaj studentoj de diversaj fakultatoj, kaj ankaŭ al lernejaj instruistoj, kaj fariĝos utila ilo en ilia laboro.

Al esperantistoj estas proksima tiu iom stranga ideo «plibonigi la mondon». Se origamistoj ĝin kaptos kaj aplikos en pedagogio, eble la celon oni povos atingi duoble pli rapide.

Kompreneble, tio estas ŝerco. Sed kiu scias...

Erika Godó



Bilda fono: <https://www.midilibre.fr/2025/12/09/animation-creation-culture-origami-propose-une-fete-du-piage-13099203.php>

La magia papero de Larysa



Erika Godó

Blanka papero kuŝas en silent',
sen formo ankoraŭ, sen ornamanto kaj event'.
Sed kiam ĝin tuŝas la mano kun arta fervoro,
ĝi ekflugas en mondon de revo kaj oro.

Faldu unu fojon – ekestas birdeto,
faldu denove – aperas fiŝeto.
El simpla papero, per amo kaj pac',
naskiĝas miraklo, beleco kaj grac'.

La faldoj rakontas pri revoj sekretaj,
pri mondoj kaŝitaj, mirinde kompletaj.
Ĉiu malgrandaĵo ricevas animon,
kaj papero montras sian propran vojon.

Origami – arto de pacienca mano,
ĝi kunigas la koron kun lerta cerbano.
Kaj kiam la papero fariĝas flugil',
la homa imago ekiras al bril'.



I-a ESPERORI KONGRESO 2026

Montpeliero - Francio

23. - 30. 10. 2026

Origamio kaj Esperanto. Ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro?

Esplori novajn manierojn enkonduki esperanton kaj origamion en edukadon.

<https://sites.google.com/view/esperori-kongreso-2026>

esperori.montpellier2026@gmail.com

🌿 Internacia renkontiĝo de esperantistoj kaj origamistoj en Montpeliero

📅 La 23-a ĝis la 30-a de oktobro 2026

Post sep jaroj da virtualaj renkontiĝoj ĉiun dimanĉon, ni tre deziras finfine renkontiĝi persone en Montpeliero!

Tiu renkontiĝo estos bonega okazo por kunhavigi nian pasion por Esperanto kaj origamio, konatiĝi kun novaj homoj kaj pasigi kune varman, kreivan kaj ĝojigan semajnon.

🌟 En la programo

prelegoj, prezentoj, kursoj kaj atelieroj pri origamio kaj Esperanto;

interŝanĝo de spertoj pri la uzado de Esperanto kaj origamio en lernejoj kaj universitatoj;

malkovro de iliaj ebloj en artterapio;

ludoj, konkursoj kaj aliaj amuzaj kunaj aktivaĵoj;

ekspozicio dediĉita al origamio kaj Esperanto.

🌐 Kaj kompreneble, ankaŭ kultura programo!

Ni proponas al vi:

vizitojn kaj promenojn tra Montpeliero;

ekskurson al la maro;

viziton al la muzeo Fabre;

malkovron de unu el la plej malnovaj botanikaj

ĝardenoj de Eŭropo;

koncertojn kaj spektaklojn;

muzikajn vesperojn kaj agrablajn kunvenojn.

Venu kun ni! Atendas vin semajno plena de malkovroj, kreemo, amikeco kaj bona humoro!

📍 La loko de la renkontiĝo

La renkontiĝo okazos en la Domo de Internaciaj Rilatoj, situanta en malgranda parko, nur du minutojn piede de la centra placo de Montpeliero kaj du tramhaltejojn de la stacidomo.

🏠 Ne forgesu rezervi vian loĝlokon anticipe!

En la lasta semajno de oktobro Montpeliero gastigas multajn kulturajn eventojn kaj aranĝojn. Tial ni rekomendas rezervi vian loĝlokon sufiĉe frue, prefere en hotelo situanta proksime al la urbocentro aŭ al la stacidomo.

Ni ĝoje akceptos vin en Montpeliero por tiu bela renkontiĝo! 🌿



Virina Literatura Kafejo en Graz – renkontiĝo plena de literaturo kaj ĝojo



Olga Bauer



La Virina Literatura Kafejo en Graz, gvidata de Olga Bauer, okazis en varma, amika kaj inspira etoso kaj fariĝis vere sukcesa literatura renkontiĝo. La evento kunigis literaturŝatantojn, kiuj havis la okazon ĝui poezion, literaturon kaj interesajn interparolojn.

La speciala etoso kreis liberan spacon por dividi pensojn, spertojn kaj emociojn. La renkontiĝo denove montris, kiom forte literaturo povas kunigi homojn trans lingvaj kaj landaj limoj.

La evento estis aparte internacia: pli ol 50 partoprenantoj el 10 landoj ĉeestis kaj kontribuis al ĝia sukceso. Ilia ĉeesto, atento kaj aktiva partopreno faris la renkontiĝon ankoraŭ pli riĉa, interesa kaj memorinda.

La internacia spirito de la Virina Literatura Kafejo estis videbla ankaŭ en speciala videomesaĝo. Filmetojn sendis Julianna Vas-Szeged el Vjetnamio, Erika Godó el Hungario, Ismary Lezcano García el Kubo, Navalona Lahatry Ny Aina el Madagaskaro, Yevgeniya Zvereva Amis el Kanado kaj Nazaré Laroca el Brazilo. Iliaj kontribuoj alportis saluton kaj literaturan etoson el diversaj mondopartoj kaj montris, ke Esperanto povas kunigi virinojn kaj literaturŝatantojn tra la tuta mondo.

Grandan dankon kaj gratulon al Olga Bauer pro la bonega organizado kaj pro ŝia sindediĉa laboro por la Virina Literatura Kafejo. Dankon ankaŭ al ĉiuj partoprenantoj, kiuj aŭskultis, kontribuis kaj kune kreis tiun belan literaturan etoson.

La renkontiĝo en Graz denove pruvis, ke virina literaturo, poezio kaj Esperanto povas konstrui verajn pontojn inter homoj, lingvoj kaj kulturoj.

Ĝis la venonta Virina Literatura Kafejo! ♦



FANTAZIAJO

Lenke Szász



Pro mia aĝo ofte mi pripensas, antaŭ la endormiĝo: Kien iras la animo post la morto? Verŝajne pro tio mi havis la strangan sonĝon, kiun mi volas rakonti.

Mi estis ĉe vojforko. Antaŭ mi etendiĝis du vojoj, kun vojmontraj tabuloj: ĈIELO, INFERO.

Mi ekhaltis, ja devis pripensi, kiun vojon mi sekvu. Hm...

Estas vere, ke mi havas multajn pekojn, peketojn, sed tamen. Mi ne estis krimulo, rabisto, miaj pekoj fontis ĉefe el stulteco aŭ el manko de kuraĝo. Kie estas mia loko?

Ĉu meza vojo ne ekzistas por la homoj ne tre malbonaj kaj nek tre bonaj?

Fine mi elektis la vojon al la ĈIELO.

Mi paŝadis heziteme, preta por turniĝi, se iu severa anĝelo ekkrios: Kion vi serĉas ĉi tie? Mi iris, iradis, kaj post eble duonhora irado, mi ekvidis homamason. Ili vicstaris antaŭ pordego. Aŭtoritata barbulo staris ĉe la pordego. Mi supozis, ke li estas Sankta Petro. Aŭdiĝis kverelo. Sankta Petro ne lasis iun eniri, la rifuzito protestis, sed vane. Multaj homoj estis forturnigitaj, kaj ili estis tre malkontentaj. Iuj eĉ blasfemis duonvoĉe.

Do ne ĉiu, kiu kredas, ke meritas eniri en la ĉielon, eniras, mi pensis. Ĉu ankaŭ mi estos forpelita? La granda homamaso antaŭ la pordego malpliĝis.

Kiam fine mi estis antaŭ la barbulo, mi estis preta konfesi, ke mi scias, mi ne meritas eniri en la ĉielon. Sed li rigardis min indulgeme, kvazaŭ li aŭdis mian penson, kaj diris: - Eniru, mia filino!

Mi rigardis lin dankoplena, kaj li ridetis bonvoleme.

Ho, mi estas en la ĉielo!

Mi vidis arbojn kaj florojn, kaj belega muziko plenigis la tutan aeron.

Ĉirkaŭe promenadis severaj ĉefanĝeloj kaj modestaj anĝeletoj, kiuj ŝajne atendis ordonojn de la ĉefanĝeloj. Kion mi faru, kien mi iru? Ĉu mi havos propran ĉambron aŭ komunan dormejon, kiel en la tera studenta hejmo?

Mi ne sentis malsaton, sed nur lacecon, kaj sidiĝis sur rokegon rande de la vojeto. Mi rigardis la promenantajn anĝelojn, kaj atendis, ke iu ekhaltos kaj diros, kion mi faru, kien mi iru. Post iom da tempo ekhaltis antaŭ mi modesta anĝelineto. Ŝi demandis, kion mi deziras, kaj proponis loĝi kun ŝi, en ŝia ĉambro, se mi deziras. Mi jesis kun ĝojo, ja la anĝelino ŝajnis esti bonkora. En la tera vivo mi spertis, ke ne ĉiu homo estas bonkora, kiu ŝajnigas bonkorecon. Sed nun mi estas en la ĉielo, kien ne eniras malbonaj homoj, mi pensis. Mi ne plu dubis, kaj vere, ni bone komprenis unu la alian. Ni multe babiladis. Ŝi diris, ke en la tera vivo ŝi havis malbonan edzon, kiu batis ŝin ofte, kaj ŝi devis pene labori sur la kampo. Ĉi tie oni devas nur kanti laŭdajn kantojn por la bona Dio, kaj neniu faras malbonon. Mi trankviliĝis.

Kiam la devigaj horoj de kantado pasis, ni rajtis promenadi. Mi demandis mian amikino (ja nun mi povis nomi ŝin amikino), kie estas la aliaj animoj, kiuj forpasis multajn jarojn antaŭ mi. Ŝi demandis, kiun mi dezirus revidi, kaj mi respondis, ke mi deziras revidi miajn gepatrojn, mian fraton, miajn avinojn, miajn amikinojn kaj...

- Kaj kiun ankoraŭ? - ŝi demandis.

- Ankaŭ... mian lastan amaton. - mi respondis honteme. Se iu ĉefanĝelo ekscios tion, eble mi estos sendita en la inferon, mi pensis. La amika anĝelino indulgeme ridetis, ŝi komprenis mian nediritan penson.

- Ĉi tie oni ne punas la sinceran amon. Sankta Petro konas vian koron, kaj permesis al vi eniri, ĉu ne - ŝi diris.

- Ĉu vi deziras vidi Lin unue?

Mi pensis, ke unue decas renkonti la gepatrojn, kaj aliajn proksimajn gekarulojn. Lin mi lasos fine, kiel oni lasas la frandaĵon post la ĉefa manĝo.

Ĉu mi revidu Lin? Eble Li jam trovis alian amatinon, pli junan kaj belan, ja li amis la virinojn dum la tera vivo. Ĉu Li estas ĉi tie? Aŭ en la infero?

La anĝelino ridetis, ŝi komprenis miajn pensojn nediritajn.

- Mi interesiĝos, kaj se Li estas ĉi tie, mi aranĝos renkontiĝon. - ŝi diris.

Mi ne estis certa, ke mi elektis la ĝustan vojon ... se Li estas en la infero...

Kio okazis poste, mi ne scias, ĉar mi vekiĝis ĉi tie, sur la Tero. ♦



VINTRA BIRDKANTO

Vortoj: Lenke SZÁSZ
Melodio: Luiza CAROL

Proksimiĝis jam Kristnasko,
sed la neĝo mankis.
Pro la monda veterŝanĝo,
la aero varmis.

Kompatinda kolombeto
trompita de varmo
Kredis, ke jam estas tempo
de printempa amo.

Antaŭ la balkono mia
pina arbo altas.
Inter la branĉaro ĝia,
birdo-am ekkantas.

La vetero post du tagoj
jam fariĝis vintra,
Sed plu kantas en malvarmo
bird' enamiĝinta.

Vortoj: Lenke SZÁSZ

Melodio: Luiza CAROL

prok-si - mi - ĝis jam Krist-nas - kosed la ne - ĝo man - kispro la mon - da ve-terŝan - ĝo la a -

- e - ro var - mis an-taŭ la bal-ko - no mi-a pi - naar-bo al - tas in-ter la bran-ĉa - ro ĝi-a

bir-do-am'ek-kan-tas tri li li litri li li tri li li li li tri li li litri li li tri li li li li

kom-pa-tin-dako-lom-be - totrom-pi - ta de var-mokre-dis ke james-tastem-podeprin-tem-pa a - mo

la ve-te - ro post du ta - goj jam fa-ri-ĝisvin-tra sed plukan-tas en mal-var-mo

bird' e-na-mi-ĝin-ta tri li li litri li li tri li li li li tri li li litri li li tri li li li li

La Sagao de la Eterna Spiralo

La Legendo de Tanu III

Lázaro Noel Coto



Daŭrigota de numero 14

La tagoj post la detruo de la kapo de Kruk estis markitaj de nenormala silento en la Spiralo. La fornoj ardis sen voĉo, la psalmoj ripetigis kiel malsanaj anheloj, kaj Viskiu la II-a mem ne forlasis siajn subajn ĉambrojn ekde la eksplodo de lia kolero.

Oni diris inter la servantoj, ke io moviĝas malantaŭ la bronzaj muroj: gutado de ombroj, spiro nehomana. Viskiu ne dormis. Li pasigis horojn antaŭ la centra krisolo, rigardante la fajron kvazaŭ atendente respondon de dio. Sed la fajro silentis. La nomo de Markus Lecter resonis en lia menso kiel brulanta dorno.

"La vorto restas..."

Tiu frazo, gravurita sur la frunto de la kapo de Kruk, persekutis lin eĉ en la mallumo.

Unu nokton de nigra luno, dum la monaĥoj de la Spiralo preĝis en procesio, Viskiu aŭdis voĉon leviĝi el la fajro. Ĝi ne estis tiu de Tanu. Ĝi estis pli malvarma, sed pli antikva.

Voĉo: "Via flamo ne sufiĉas, Episkopo. La fajro purigas nur tion, kio ankoraŭ vivas. Sed li — la portanto de la vorto — transcendis la vivon."

Viskiu la II-a: "Kiu parolas en mia krisolo?"

Voĉo: "Ĝi... de io, kion vi forgesis forpeli."

La fajro malfermiĝis kvazaŭ spegulo, montrante dezerton el ŝtono kaj osto: sennomatan landon preter la Maro de Onikso.

Meze de la pejzaĝo, impona figuro avancis inter kolonoj de kranioj. Lia korpo estis amaso de cikatroj, lia vizaĝo kovrita per forĝita fera masko; de lia dorso pendis klingoj kiel rompitaĵoj flugiloj.

Voĉo: "Blaak la Degelisto. Naskita el eterna puno, ekzilita el la dia fajro. Li estas morto sen vorto, flamo sen senco. Donu al li nomon, kaj li servos vin."

La episkopo kliniĝis, fascinita.

Viskiu la II-a: "Demono... por mortigi profeton?"

Voĉo: "Ne profeto. Plago de la flamo. Blaak voras animojn kiuj ankoraŭ ardas. Iru kaj serĉu lin."

La vizio malaperis, lasante post si densan odoron de sango kaj fandita bronzo. Viskiu falis sur la genuojn, ridante inter larmoj.

La sekvan tagon li kunvokis la Sango-Konklavon: sian plej fidelan gvardion, pastrojn kaj forĝistajn militistojn. Li parolis al ili per tremanta, eŭforia voĉo:

Viskiu la II-a: "La homaj legioj malsukcesis. Kruk estis englutita de sia malforto. Nun la Fajro alvokas antikvan servanton: Blaak la Degelisto. Sendu mesaĝistojn al la nordo de la ruinoj de Nohr. Tie, inter nebuloj kaj fosaĵoj, dormas la degorganto. Ofere al li konsekritan karnon, fanditan oron, la langojn de sep nekredantoj... kaj mian promeson: la animon de Markus Lecter kiel tributo."

La konklavo tremis, sed neniu kuraĝis kontraŭi lin. En lia rigardo ardis luma frenezo, miksaĵo de fervoro kaj kondamno.

Tiun nokton, kolonoj de fajro leviĝis super Kaelu. La monaĥoj poste nomis ilin La Signoj de la Degelisto. Viskiu la II-a malfermis la vojon al la nepensebla: pakto inter dia fajro kaj abismo.

Kaj ie en tiu mortinta dezerto, inter ostoj kaj fajreroj, Blaak malfermis unu okulon.

La ĉielo de Kaelu ardis kun malsana tono kiam Viskiu la II-a komencis sian marŝon norden. Akompanis lin ses akolitoj de la Spirala Gvardio, portantaj oferkestojn — fanditan oron, konsekritajn brakojn, kraniojn de martiroj — kaj la nigrigitan standardon de la Episkopejo. Ili prenis la cindran vojon kiu eniris la frostajn dezertojn de la Maro de Onikso, kie la vento ululis per voĉoj de forgesitaj pentantoj.

Ĉiutage la templanoj fariĝis pli silentaj. La fornoj de iliaj torĉoj ne ardis: ili ŝajnis absorbi la lumon, ne elsendi ĝin. La ruinoj de Nohr, antikva sanktejo de herezaj forĝistoj, aperis en la sepa tago, enprofundigitaj en valo de nigraj ŝtonoj kaj eroditaj ostoj. Tie la torditaj kolonoj aspektis kiel fosilioj de gigantoj. Sur ili, la korvoj havis metalajn bekojn.

Viskiu descendis sola, ordonante al siaj akolitoj resti ĉe la rando de la abismo. Dum li avancis, la aero fariĝis pli densa;odoro de rustiĝinta fero plenigis liajn pulmojn. Li haltis antaŭ altaro kovrita de ŝtoniĝintaj langoj — vivanta restaĵo de la mutilita dio, kiun Nohr adoris antaŭ sia falo.

Viskiu la II-a (levante sian sceptron): "Blaak, servanto de la antikva fajro. Episkopo de la eterna silento. Mi alportis oferon, mi alportis mian fidon. Leviĝu antaŭ via pastro!"

La tero disŝiriĝis kun sono nek de tondro nek de spirado. El la fendoj leviĝis nigra vaporo, kaj inter ĝi aperis kolosa figuro: Blaak la Degelisto. Lia korpo estis amalgamo de cikatrata karno kaj organika kiraso, kiu spiris. La fera masko brilis kun karmezaj runoj, kaj de lia dorso pendis glavoj kiuj tintis laŭ la pulso de la aero.

Blaak (profunda, malseka voĉo): "La fajro min alvokas. Ĉu vi estas ĝia voĉo, eta pastro?"

Viskiu la II-a (kliniĝante, samtempe kolera kaj respektema): "Mi estas ĝia martelo. Vi, ĝia falinta pugno. Mi volas nomon forviŝotan: Markus Lecter. Mortigu lin kaj la fajro de Tanu estos via nutraĵo."

La demono kliniĝis, krakigante la fundamentojn de la valo. Arda okulo, enkonstruita en la fendo de lia masko, malfermiĝis.

Blaak: "La animo kostas pli ol oro. Kion vi donas kontraŭ tio?"

Viskiu la II-a: "Mi donas mian lumon. Mian dian fajreron. Ke miaj songoj estu viaj kiam mi dormas, ke mia voĉo vin alvoku sen voki vin."

Peza silento falis. La runoj en la masko de la demono ekbrilis; lango de ombro tuŝis la teron, envolvante la ardantan sceptron de la episkopo. La metalo ĝemis ĝis nigriĝi.

Blaak: "Mi akceptas. Kiam la fajro denove brulos en vi, vi scios ke mia ŝuldo komenciĝas."

Viskiu sentis sin konsumita de bruliga malvarmo. Lia mitro estingiĝis, lasante sur lia frunto karbonigitan spiralon. Tiu marko, kiu ŝajnis enhavi movon, neniam malaperis.

La demono retiriĝis en la mallumon, sed lia voĉo daŭre resonis en la vento:

"La Degelisto marŝas kie ekzistas fido. Preparu vin, pastro: purigo ne distingas nomojn."

Viskiu ridetis, kvankam lia vizaĝo sangis.

Li sigelis la pakton.

Tiun nokton, la akolitaj trovis lin staranta sur la ruinoj, envolvita en ombro. Li ne portis ekbruligitan fajron, sed la aero ĉirkaŭ li ardis. Revenante al Kaelu, la nordaj ventoj portis onidiron:

Blaak estis vekiginta.

La vento forportis la lastajn eĥojn de la apero de Blaak. Viskiu la II-a, ankoraŭ genuiganta sur la rompita ŝtono, spiris la metalan odoron de la abismo, kun siaj sekaj lipoj formante preĝojn, kiujn eĉ li mem ne komprenis. Sed la demono ne finis paroli. Pli profunda fendo malfermiĝis sub la altaro, kaj el ĝi eliris virinaj voĉoj, kvazaŭ la tero mem plorus. Inter tiuj lamentoj, la grandega ombro de la Degelisto prenis preskaŭ homan formon, marŝante al la episkopo per paŝoj kiuj diserigis la rokon.

Blaak:

“La oro fandiĝas. La sanktigita karno malvarmiĝas. Vi ofertis cindron, sed mi trinkas sangon. Se vi deziras ke mia klingo trapiku la homon de la Vorto, la prezo estos naskiĝanta vivo: dudek kvin junaj virinoj, sen ombro de kulpo... kaj la fruktoj de iliaj ventroj. Donu al mi ilian purecon kaj mi donos al vi ilian morton.”

Viskiu la II-a tremetis, sed ne pro hororo—pro ekstazo. Por li, tio ne estis abomeno, sed perfekta liturgio. La totala ofero: fajro kaj karno en komunio.

Viskiu la II-a:

“Ilia pureco? Iliaj infanoj? Jes! Ke la fajro de Tanu nutru sin per ili, se per iliaj animoj ĝi malfermas la vojon al la purigo!”

Je lia eldiro, la runoj de la planko ekbrulis, kaj la aero komencis turniĝi kun ruĝa polvo. La eĥoj de la demono miksiĝis kun la flustroj de la dia fajro, du kontraŭaj voĉoj resonantaj en unu sola noto, kiu ŝiris la menson.

Blaak:

“Alportu ilin al ĉi tiu valo antaŭ la plenluno. Ke iliaj larmoj miksitaj hardu mian glavon. Kiam la lasta spiro sian lastan spiron, mia klingo falos sur tiun, kiu defias vian flamon.”

La demono levis sian groteskan brakon; el lia antaŭbrako kreskis viva klingo, gutanta per malhela likvaĵo kiel fandita fero.

Blaak (daŭrigante):

“Ĝis tiam, pastro, via koro apartenas al mia fajro. Ĉiu tago, en kiu vi hezitos, vi sentos miajn fingrojn fermiĝi ĉirkaŭ via animo.”

La aero estingiĝis. La ardaĵoj de la altaro transformiĝis en nigran cindron, kaj nur la voĉo de la episkopo restis.

Viskiu la II-a:

“Tiel estu. La junulinoj estos oferataj. Neniu ofero estas tro granda por la flamo de Tanu.”

Per tiuj vortoj, li trinkis el la krisolo, permesante ke la varma sango de sia propra manplato miksiĝu kun la restaĵo de la fero.

La interkonsento estis kompleta.

Kiam li revenis al Kaelu, la temploj ricevis novan ordon: la Karmezina Konklavo devis kolekti la elektitajn “por la purigo de la Perfekta Fajro”.

La gongo-sonoriloj resonis dum la tuta nokto; dek du sacerdotinoj ploris sen scii kial. Tiu sama noktomezo, el la ruinoj de Nohr, respondis muĝo. La Degelisto jam havis malsaton.

La kolekto de la Karmezina Ofero

Kiam la turoj de la Spiralo sonoris dek tri fojojn, la civitanoj de Kaelu komprenis, ke io malluma estis dekretita. La ordonoj de la Karmezina Konklavo malsupreniris tra la stratoj kiel mandato de la dioj: ĉiu distrikto devis sendi “la junajn filinojn de la pura fajro kaj iliajn unuenaskitojn” por ceremonio de purigo. Neniu kuraĝis demandi pli.

Tra la avenuoj kovritaj de cindro marŝis la Gvardioj de la Spiralo, iliaj bronzaj maskoj reflektante la flamojn de la fornoj. Ili ne kriis, ne batis. Ili marŝis kaj montris, kaj la domoj malfermiĝis kvazaŭ floroj de timo. La elektitaj estis kondukitaj kun ruĝaj linaĵmanteloj, en silenta procesio, sub la preĝo de la sonoriloj kiuj tintis penton.

La popolo rigardis el la fenestroj dum la kolonoj avancis al la Templo de la Krisolo. La patrinoj faris la signon de la fajro sur siaj koroj, la malpli altaj pastroj mallevis la rigardon. Tuta Kaelu fariĝis unu sola retenita spirado. Neniu kuraĝis prononci “ofero”; oni diris nur purigo, renoviĝa ofero, tributo al Tanu.

Kiam la nokto falis, la torĉoj de la Spiralo leviĝis kiel ardaj nadloj. De sia ferbalkono, Viskiu la II-a observis la karavanon kun okuloj malfermitaj kaj sekaj. En lia dekstra mano brilis la malhela marko de la interkonsento, pulsante kun ĉiu paŝo de la junulinoj. Lin akompanis la Voĉoj de la Fero, ĉantante senvortajn litaniojn.

Viskiu la II-a (fluŝtrante al si mem):

“Dudek kvin flamoj por vigligi la militon... Blaak, vekiĝu en ilia spiro.”

Kiam la lasta torĉo eniris la vojon al la nordaj montoj, la gongo-sonoriloj silentis. Sekvis silento, densa kiel likva fero. Neniu en Kaelu parolis pri tiu nokto denove, sed la fornoj de la Spiralo brilis dum tri tagoj sen esti nutritaj.

Kaj super la valo de Nohr, malproksime de ĉia rigardo, leviĝis ruĝa brilo. La ombro de la Degelisto jam marŝis al la mondo de la homoj.

En la koro de la valo Nohr, kie la ŝtono ankoraŭ memoris la formon de la mortintaj dioj, staris la Abisma Krisolo, altaro tiel antikva, ke neniu homa lingvo povis nomi ĝin sen tremo. Tie la senditoj de la Spiralo alportis la oferojn, kiel ordonis Viskiu la II-a: dudek kvin vazoj de vivo, purigitaj laŭ la ritoj de la fajro. Ne estis krioj, nur kantadoj. Ĉiu vorto eldirita fariĝis cindro antaŭ ol atingi la aeron.

Kiam la lasta nomo estis oferita, la fajro de la altaro ne estingiĝis, sed ŝanĝis koloron. De la ardanta ruĝo ĝi transiris al profunda nigro, likva mallumo kiu ŝajnis sorbi la lumon. La pastroj retiriĝis, antaŭsentante la alvenon de io, kio ne apartenis al la mondo de homo nek de dio.

La Krisolo tremis. La tero fendiĝis, kaj el ĝia vundo elfluis densa vaporo. En ĝi formiĝis giganta konturo, unue neklara, poste perfekte difinita: figuro el fero kaj karno. La masko de la Degelisto malrapide leviĝis, elfluante la brilon de demonaj signoj.

La ĉielo deformiĝis. La luno, reflektiĝante super Nohr, estis tinkturita per karmezina brilo. La rompita kolono kliniĝis al la centro de la altaro, kvazaŭ la tuta valo kliniĝus. El la fendeto sub la krisolo aperis metalaj sonoj: klingoj trenataj, voĉoj kunfandiĝantaj en inversan preĝon.

Blaak parolis.

Lia voĉo estis retenita lavango, seka bato kiu fendigis la aeron.

“Fajro de la necerta dio, flamo de la ambicia homo... viaj oferoj estas akceptitaj. Nun mia malsato estas via dekreto.”

Viskiu la Il-a—kiu observis de malproksima altaĵo—falas sur siajn genuojn. En lia brusto la nigra spiralo interne ardis, kvazaŭ fera koro vekigis sinkrone kun la monstro.

Blaak daŭrigis:

“Donu al mi direkton. Donu al mi nomon.”

La episkopo, kun voĉo rompita inter sindediĉo kaj deliro, prononcis la nomon:

“Markus Lecter, filo de Aruhen. Li rompas la fajron per vorto. Li devas bruli.”

La demono malfermis siajn brakojn. El la interno de lia korpo eliris fragmentoj de viva ŝtalo kaj malsana fajro. Ĉiu fragmento prenis formon de armilo: glavoj, lancoj, segiloj, ĉiuj flosantaj en rondo ĉirkaŭ li.

“Tiam la fajro marŝas kun mi.”

Lia silueto dissolviĝis en la aeron, kvazaŭ ĝin estus englutinta ĝia propra ombro. La valo silentis. Tamen, kiam la torĉoj de la Spiralo revenis al Kaelu, la flamoj de ĉiuj fornoj flagris samtempe, kliniĝante al la nordo. La monaĥoj tion sentis antaŭ ol kompreni ĝin.

La Degelisto marŝis.

Kaj ĉiu lia paŝo mallumigis la horizonton.

La nokto de la deka luno, Junha ne povis dormi. La aero de Aruhen pezis kiel cindro en la gorĝo, kaj la fornoj de la temploj brulis sen videbla fajro. Ŝi jam de tagoj sentis antaŭsignojn: ombrojn kiuj transiris la murojn, spegulojn kiuj montris fremdajn vizaĝojn, la murmuron de lingvo, kiun neniu kreaĵo el karno devus aŭdi.

Dum la vento vipis la turon de la ĉefa templo, Junha genuiĝis antaŭ la Signo de la Flamo de la Du Dioj, kiu ankoraŭ milde turniĝis super la altaro. Ŝi preĝis silente, petante klarecon. Tiam la fajro de la simbolo ŝanĝiĝis: la bluo kaj la ruĝo disiĝis, kaj el la centro eliris ora brilo, kiu blindigis la ĉambron.

La planko malaperis sub ŝiaj genuoj. Ŝi troviĝis suspendita en maro de stela polvo, envolvita en imensa varmo. Antaŭ ŝi malfermiĝis la vizio: ebenaĵo de senfina ombro, kronita per ardaĵoj. Tie koloso el fero marŝis—Blaak la Degelisto—kun glavo kiu spiras kaj mil animoj rondantaj ĉirkaŭ li. Ĉe ĉiu paŝo, lia korpo elspiris vivan cindron; lia masko brilis per la signoj de Tanu profanitaj.

Junha volis fuĝi de tiu hororo, sed la voĉo de la fajro ĉirkaŭis ŝin. Ĝi sonis profunda, kompatema kaj terura samtempe, kiel muĝo de stelo.

Tanu:

“Ne timu, filino de la vorto. Mi vidis la ombron, kiun la homo de mia flamo levis en sia fiero.”

Junha tremis, rekonante en tiu voĉo la ĉeeston de la dio, kiun Kaelu kredis posedi, sed kiu nun manifestiĝis en pureco.

Junha:



“Sinjoro de la eternaj forĝejoj... ĉu tiu monstro estas via verko?”

Tanu:

“Verko de mia reflektio. La fajro, kiu forgesis ardi pro amo kaj elektis konsumi. Viskiu min alvokis sen aŭdi min; lia fido estas mia malliberejo. Blaak estas lia eĥo.”

La vicaria klinis la kapon.

Junha:

“Tiam ni estas perditaj. Kiel la vorto batalos kontraŭ la fajro, kiu mem englutas la vorton?”

La brilo de Tanu kreskis ĝis plenigi la horizonton. En ĝi leviĝis bildoj: Kaelu en ruinoj, la Spiralo disfalanta, kaj du flamoj interplektitaj kiuj ne brulis, sed donis lumon.

Tanu:

“En la fina horo, kiam la Degelisto leviĝos super sango kaj ŝtalo, mi malsuprenvenos. Ne kiel dio de temploj, sed kiel pura flamo. Vi, la filoj de Aruhen, estas mia forĝejo. Via fido kaj la koro de Markus estas mia glavo.”

Junha tiam sentis absolutan pacon. La aero ardis per aromo de rezino kaj vento.

Tanu (fluŝtrante):

“La herezo mortos pro sia propra malsato, kaj la fajro konos sian limon. Ne timu la demonon, sed la silenton. Ĉar fine, nur la vorto restos ŝaltita.”

La brilo komencis malaperi. Junha laste vidis la figuron de Tanu kovranta la horizonton kiel suno kaj, antaŭ li, la ombro de la Degelisto, etendanta sian armilon al la tagiĝo.

Kiam ŝi vekiĝis, la simbolo de la altaro brilis per triobla flamo: ruĝa, blua kaj ora. Ŝi tiam sciis, ke la fina milito estis anoncita kaj ke Tanu mem elektis flankon. ♦

Mesaĝo el Parizo

Laimundas Abromas



„Bonĵur’! Naus som a Pari!“ (Saluton! Ni jam en Parizo!) Plu france mi ne parolos, ĉar oni povas rompi langon. Plue mi preferas Esperanton. La ĉielo en Parizo nubigas, afrikanoj pli multas ol sufiĉas. Mi preskaŭ sentas min ĉirkaŭita (simple mi ne povis ne mencii tiun fajnan vorton) de ili. Tamen ĉi tie diable agrablas! Parizo ĉiufoje alias. Kaj mi ĝin tian – ĉian – alian ekamas denove

-Madam kaj mesje (sinjorinoj kaj sinjoroj), po unu glaseto! Ne, pli bone po pokalo da vino-ruĵ, silvuple’!(ruĝan, mi petas). Ni eltrinku por spontaneco. Kaj por amo,-ĉar ni estas en Parizo. Nu, vi eble ne, sed mi vere tieas.

Mi ne povas ĉesigi en mi tiun agrablan sperton, ke mi ankoraŭ sukcesas dum lastaj minutoj paki valizon kaj post unu horo kaŝi min trans la nuboj. Agrablas, ke estas homo, kiu scipovas tion proponi. Agrablas, ke mi ne scipovas rifuzi.

Ĉu mi sonĝas? Nu, iomete jes. Necesas iomete pinĉi sin kaj vekigi... Ho, jes! Mi vere estas en Parizo! „Bonvenon en la urbon de la amo“, - ĵus diris en fantastike fuŝita angla lingvo mesje’ el hotela registrejo. Ni ekloĝis en hotelo kun vidaĵo al kontraŭaj fenestroj. Nu, ne povas ĉiuj hotelfenestroj rigardi al monto Monmartro. Tamen ni ĉiam povas ligi kontakton kun tiuj, kiuj loĝas iom pli supre kaj vidas iom pli malproksimen. Aliokaze, ĉion ekvidi oni povas dum promenado. Sed en la ĉambro unue necesus malfermi valizon kaj elpaki ĝin.. Ho, Parizo, kiel mi bezonis vin!

La unua impresio: post mia unua restado en ĉefurbo de Francio, sufiĉe multiĝis alinacianoj, fremdlandanoj. Pro tio mi rapidas averti vin: se klariĝos, ke via promenado tro longedaŭris kaj ventmuelejo Mulen Ruĵ restis malproksime post vi, kaj antaŭ vi malmultas eŭropanaj vizaĝoj, mi rekomendus returni vin. Mi konfesas, tio min ĝenis: nekalkulebla multego da simboloj de araba kulturo, duono de Tunizio, triono de Maroko, pakistananoj, bengaloj kaj aliaj, kiuj min ne imponis, eble eĉ timigis, iliaj vizaĝoj ne aludis pri intelekto kaj interpopola amikeco.

Tamen la nigraj virinoj, sin ornamantaj per buntaj kaptukoj, impresaj togoj kaj abundo da ornamaĵoj estis nome tiuj, kiuj plej allogis por foti. Tamen mi klare komprenis – eligi el mansaketo fotilon aŭ monujon en tiaj malproksimaj urbopartoj egalus al memvola rezigno de sia havaĵo. Kvankam, prenu mil diabloj, ne multe malapudas tiuj urbopartoj! Mi volas kredi, ke pasio de praaj amuziĝoj en tiu urboparto ankoraŭ kaŝatendas en iu strateto. Tamen ni, ŝajne, tiun vojturniĝon preteratentis.

Kiel mi menciis, por pretiĝi al vojaĝo, mi havis nur duonhoron. Pro tio ne estas mirinde, ke mi ne aŭdis veterprogramon. Ombrelon mi ne kunprenis, sportŝuojn – ankaŭ. Mi dankas al jaketo kun kapuĉo. Ĝi savis min dum malseka horo. „Parizo mirindas eĉ pluvoza“, - sugeste mi diris. Sed iom poste mi devis trankviligi mian raviĝon. Tamen, ĝis oni ne verŝis sitele sur niajn kapojn nuban akvon, ni, interkroĉiĝintaj permane, malrapide paŝadis sur historiaj aleoj. En loka komerca centro ni aĉetis kontraŭ unu eŭromonero du etajn plastajn boteletojn da blanka malklara, varma vino. Romantikooo! Post la tria gluto timigita, ke acido de stomako tuj memorigos pri si mem, mia amikino sian boteleton enmanigis al mi. Sed eĉ kelkaj glutoj sufiĉis, ke mia kapo agrable ebriiĝu.



Eble ne pro vino, sed pro la neatendite el post la angulo aperinta Ejfela turo? Rivero Sejno plu preterfluas tiun feran giganton kiel antaŭe. Tamen kiam mi vizitis ĝin pasintfoje, rivero Sejno estis tre superakviĝinta. En tiu pigra rivero konstante navigas ŝipoj. Iliaj noktaj lampetoj interrompe brilas. Parizo, mi amas vin!... Sufiĉas! Ni revenu en hotelon!

Frumatene mi vekigis kaj tuj komencis rideti. „Bonan matenon, Parizo!“ Dum mia amikino ankoraŭ dolĉe dormis, mi per mia saĝa telefono sciigis miajn geamikojn: „Saluton! Bondeziroj el Parizo“. Mi tuj iris duŝi min, ĉar tago komenciĝas. Mankas tempo por atendi. En Parizo ni denove nur por semajnfino. Tamen Parizo tre grandas. Ni devas ankoraŭ multon ekvidi, ankaŭ manĝeti ni volas, tamen ĉio beste multekostas.

En Parizo mi volis ekvidi tiun bildon, pri kiu Dan Brown filmis „Kodon de Da Vinci“. Tamen tiaj kiel ni, ŝajnis esti milionoj. Ĉe Luvro serpentis longa vico. Mi suspektis, ke iuj en ĝi staris dum tuta nokto. Por ni Monna Lisa ridetis el la profundo de vitra piramido. Bedaŭrinde, ne originalo – nur ŝia afiŝa kopio. Apude mi ekvidis oficiston, interrompis lian oscedadon kaj malrapide demandis en fuŝita angla: „Bonvolu diri, ĉu tiu tuta vico atendas por ekvidi Monna-n Lisa-n?“ Franco respondis al mi per rideto kaj per mirinda vortmiksaĵo: „Oui, noo... Ĉi tie okazos koncerto. Klasikaĵo“. Fantazia frenezigo! Al klasikaĵo en Parizo- kilometrolonga vico?! Mi kliniĝis al orelo de franco, ĉar mi ne kuraĝis esti stulteta: „Ho, jeees... Bonvolu diri, kie estas tiu Roza linio, priskribita en la libro?“. Por granda mia ĉagreniĝo, franco ekuzis amason da francaj vortoj. Li bonkore gestadis permane kaj montris al palaco, tamen mi komprenis nur unu vorton: „Fermita“.

Kion ankoraŭ mi rakontu al vi pri Parizo? Oho, ĝi estas nepriskribebbla. Neforgeseblaj impresoj por vojaĝantoj memstare estas Mulen Ruĵ', Ejfelturo, Luvro-muzeo, noktaj ekskursoj, se vi havas volon kaj forton, Triumfa arko, Clichy bulvarado. Ne forgesu gustumi la frititajn kaŝtanojn. Ili bongustas ne nur sur placo Pigalo. Kiam vi gastas en Parizo, nepre vizitu almenaŭ unu fojon ventmuelejon Mulen Ruĵ', ĝi funkcias ekde 1889 jaro. Mirindas sinprezenta programo. Ĉio apudas ĉe monto Monmarto; kvartalo de Ruĝaj lanternoj, placoj Pigalo, Blanŝi, bulvarado Kliŝi. Tio estas simbolo de Franca ĉefurbo. Tamen ĉion tion oni devas sperti persone. Necesas nur kuraĝo, kaj eble spontaneco.

Au revoir! Ĝis revido! ♦

LETERO AL POETINOJ

Miriĉ Jadranka



Skribas mi leteron ĉi

Por esti almenaŭ tiele inter vi,

Por ĉeesti mi inter karaj poetinoj

En la graza kafej' por virinoj.

Kiel abeloj vi suĉas el poemfloroj mielon.

Tiel ni ame kuraĝigas homojn dialogi,

Unuiĝi, de malbono deteni, ne plu mensogi!

Al homo ni estu homo!!! Akceptu kore subtenan saluton!



Muso blanka feliĉon profetas

Miriĉ Jadranka



En la familio Markoviĉ estas kvar personoj: la gepatroj Petro kaj Vera kaj iliaj du gefiloj Darko kaj Jelena. La gepatroj Markoviĉ en malfruaj aĝoj fariĝis gepatroj, tiel iliaj filino Jelena kaj filo Darko iliaflanke estas tre zorgeme edukitaj, poste ili frue vizitis la varteon kaj nune ili vizitas la Elementan Lernejon. Ili ne estas ĝemeloj, kvankam al ĉiu vidante ilin tio estas la unua penso.

La familio Markoviĉ loĝas en la modesta domo kun malgranda florgardeno. Kie estas ĝardeno verŝajne troviĝas dometo por la dombesto. La fidela domgardanto /la hundo nomiĝas Žučko/ Flavulo. Divenu kial? Certe, pro lia flava felo. Tamen fidela Flavulo ne estas sola. Al li ofte venas najbara kato alnomata Mica, kiun tre admiras Jelena.

— Panjo, diras Darko al sia patrino, ĉu ni iros sabaton al la urba foiro? Ne forgesu ke vi tion promesis al ni, — aldonis li esperante la jesan respondon.

— Mi ne estas certa. Ja, vi aŭdis hieraŭ ke nia onklino morgaŭ estas venonta ĉe ni. Eble ŝi akompanos nin al la foiro. La panjo paŭzis iom aldonante:

— Ni devos demandi ŝin se ŝi ne estu multe laca pro la longa vojo.

Darko iomete kolere respondis:

— Ja, kial ŝi venas nun, neniŭ alvokis ŝin!

Jelena rigardis ĉu panjon ĉu patron eniranta la domon.

— Kiuj problemoj malgajigis miajn infanojn? — demandis li etendiĝante la manojn en kiuj enflugis Darko.

— Paĉjo, vi promesis al mi la foiro-viziton. Mi devas iri tien, tie mi antaŭkonsentis kun miaj klaskamaradoj.

— Estos kiel ni interkonsentos. Ne zorgu, filĉjo mia, — respondis li iom kurbiĝinte por ke li provu kisi la vangojn de Darko.

Maja tago plenas de sunradioj. Tamen tre ŝanĝiĝanta vetero enmiksiĝis en la planoj de la familio Markoviĉ. La alveno de onklino malfruis pro la ŝtormo kies hajlofalo tre timis homojn. Jam estis elsendita atentigo pro la ŝtormo pro la aŭtostirantaro...

Do, la onklino atingis ilian domon anstataŭ matene je la dek unua ŝi venis posttagmeze je la dek kvina horo. La maja ŝtormo jam pasis sed la nigraj nuboj surĉiele promesis la daŭran pluvon.

En la gasteĉambro sidis Petro kaj lia edzino Vera kun onklino babilante pri la ĵuse finita vojaĝo de onklino. La onklino Nena estas maljunulino certe iama belulino, nun tre laca sed bonspirita. Ŝi estis malalta sed ĉiuj vokis ŝin “tigrino” pro ŝia lerteco kaj rapidemo en aŭtostirado. Ŝi estis tute konscianta pri siaj kapablecoj do, ŝi ne volis aŭdi la aliajn proponojn aŭ oferojn kiuj malplaĉas al ŝi.

— Do, mi jam diris ke mi estos via aŭtostiranto. Do, neniŭ aliaj vortoj pli pri tiu foiro. Ni iros ĉiuj kun infanoj.

Kompreneble ke Darko kaj Jelena estis tre ĝojaj kaj senpacience atendis sabaton.

Intertempe la infanoj renkontiĝis kun siaj klaskamaradoj. Unu el kamaradoj surprizis ilin montrante al ili la dombesteton – la blankan muson. Muso kiel ĉiu muso timas de homoj. Vidinte la manojn de Darko ĝi kaŝis sin en la angulo de la drata kaĝo.

— Donu al li peceton de fromaĝo! — diris la klaskamarado al Darko.

— Ĝi tre ŝatas manĝi la fromaĝon. Mi tuj donos la fromaĝon.

Dirite tion li forkuris al lia domo.

Ankoraŭ de la dompordo Darko kriaĉis:

— Panji, tuj donu al mi la peceton de fromaĝo! Mi hastas. Jen, mia kamarado havas blankan muson. Mi volas nutri ĝin. Nu, rapidu, panjo. Ĝi atendas min.

La lastajn vortojn Darko balbutis en sian menton.

Reveninte al sia kamarado li ride montris la manplaton plena de fromaĝeroj:

— Jen, manĝu, mia favorateto.

La blanka muso kuris tien alien sed momente ĝi haltis kaj rapide formanĝis la donitan fromaĝon.

— Ĝi ne plu timos de vi. Vi vidos, — diris lia kamarado konvinkante Darkon. — Ĝi ne estas simpla muso. Ĝi estas muso profetanto!

— Pri kio vi parolas? — miris Darko. — Kia muso profetanto?

— Jes, vi vidos ĝin dum sabata foiro. Mia fratino kun ŝia avino laboras ĉe Fopiro. Tiu blanka muso tie estas la vera stelo. Ĝi profetas al homoj estontecon!

Darko estis scivolema kaj lia kamarado trarakontis al li mirajn rakontetojn rilate al tiu muso.

Sed neniu scias kion morgaŭo donos.

Ĵaŭda mateno multon promesas. Estis suna tago. La ĉielo lazure bluas nek unu nubeto sur ĝi troviĝis. Ekstera temperaturo tre alta +15 gradoj. Surstrate homoj haste iradis al sia oficejo post matenmanĝa paŭzo. Same faris niaj infanoj gaje kurante al la bakvendejo kiu troviĝas vid-al-vide de la urba Elementa Lernejo.

— Darko, ĉu vi konsentas ke mi venas ĉe vi post finitaj lernejaj horoj. Mi kunportos la blankan muson por ekkoni ĝin kun viaj familianoj, — demandis la kamarado Tomo preterpasante lin.

— Ne! Mi atendos vin! — respondis Darko forta voĉe.

Dirite farite.

Posttagmezo estas la tempo kiam la tuta familio Markoviĉ kolektiĝas. La gepatroj Petro kaj Jelena jam eltrinkis tason da nigra kafo dum lia gastino, la onklino Nena, malrapide gustumis sian tason da kapuĉino /cappuccino/. Kiam aŭdiĝis sonorilo de la dompordo ĉiuj eksaltis starigante el siaj foteloj por pli bone elproksime vidu la favorateton – la blankan muson.

Ĉiuj ridis kaj komentis la ĉarmon de la blanka muso. Ĝi estis malgranda kun longa blanka vosto.

— Vidu, kiel estas ĝiaj manetoj kaj kruretoj tre ĉarmaj! — kriaĉis Jelena provante superi la voĉbruadon de la familianoj.

La musa drata kaĝo iris el mano en alian manon, tiele nia blanka muso promenadis tra la tuta domo. Ĉiuj volis pasigi iom da tempo kun ĝi. Dum ĉiuj estis okupitaj kaj bone amuziĝis kun la blanka muso eksonoris la mobilon de Nena. Ŝi prenis mobilon elirante eksteren en la florgardeno.

— Ho, pardonu, sed malrapide vi ripetu kion vi diris... Nenion mi komprenis? — petis ŝi la vokanton.

— Ho, ne. Kiel tio okazis? Kie ŝi estas nun? Ĉu la dommastrino nun estis prizorgata? — post iom da paŭzo ŝi diris:

— Bone, mi certe revenos hejmen. Mi tuj ekiros.

Nena reeniris la domon de la familio Markoviĉ. Ĉi-foje lia vizaĝo malkovris al ĉiuj ke io malbona okazis.

— Aŭskultu min, karaj familianoj, ĵus mi estis informita ke mia dommastrino havis incidenton. Ŝi falis kaj rompis la kruron. Mi bedaŭras, sed mi devas tuj reveni hejmen. Mi devas tuj enpakiĝi!

Kompreneble ekestis kaoso. La gepatroj de Darko kaj Jelena estis malgajaj sed kompatemaj. Ili hastis enpakigi la donacojn por Nena dum Darko kaj lia fratino Jelena hastis saluti kaj adiaŭi sin kun la onklino.

En la okazinta kaoso ili tute forgesis pri la favorateto la blanka muso. Des pli ili forgesis pri la muso ju pli ĝi gajnis liberon simple ĝi eliris el la kaĝo kies serureto estis malŝlosigita.

Tiel ili adiaŭis la onklinon svingante per nazotuko.

Reenirante la domon la infanoj rimarkis ke la kaĝo de la blanka muso estis malfermita. De muso nek spuroj restis.

— Darko, kiel mi iros al patrino, kion mi diros al ŝi? — plorvoĉe Tomo turniĝis al Darko. — Kie malaperis mia blanka muso! Kiel mia panjo iros labori sen ĝi! — tre timema diris Tomo.

— Nu certe ni trovos ĝin. Ĝi ne povas nur tiel simple vaporigi! Ĝi kaŝis ĝin ie. Nu, estas pli bone ke ni kune tuj serĉu ĝin ĉi-tie en la domo, — respondis Darko zorgeme.

Denove ekestis kaosa situacio en la domo. Ĉiuj ĵetis sin al serĉado de la blanka muso. Ve, ĉio vanas. Nenio videblas nek ion similan kiel estis la kara blanka muso. Pasis horoj... Preskaŭ vesperiĝis. La suno subiris restinte oruĝajn spurojn surĉiele. Eĉ pala luno aperis ankoraŭ apenaŭ videbla.



En la familio de Markoviĉ regis silento. Ĉiuj laciĝis sed nenion trovis. En okuloj de Jelena kaj Darko aperis larmoj. Tomo foriris siahejmen ĉagrena kaj timema pro la perdo de la blanka muso. Subite eksonoris telefono rompinte la silenton.

— Mi prenos mobilon, — diris la patro Petro demandante:

— Jes, kun kiu mi parolas?

— Mi estas, ja mi estas... pardonu Nena estas tie. Diru “Feliĉon” kaj ŝia voĉo antaŭsignis ke io bona okazas. Ŝi ridis kaj ridis nenion parolante.

S-ro Petro estis embarasita kaj serĉis helpon rigardante la edzinon Vera, li pruntedonis la mobilon al ŝi dirante:

— Nu, vi prenu la mobilon. Mi nenion komprenas.

Mi ne volas al vi trarakonti la interparolon kun Nena kaj Vera, sed certe vi devenos ke Nena trovis la muson en sia aŭto en la kartona pakaĵo plena de fromaĝo! Tial ŝi ne povis haltigi ridon. Kaj la alia bona novaĵo estis ke ŝi tuj revenos al ili kaj revenu la muson por ke ĝi ne rezistu de sia profeta laboro sabaten dum la urba foiro.

Kaj la tria ĝoja novaĵo estis ke ŝi mem revenu la muson, ja, ŝi estis kvankam maljuna sed vera Fango en aŭtostirado, kiel maljunuloj diris iam ĉe ni.

— Do, ni vidos nin baldaŭ, kaj kiel mi promesis ni ĉiuj iros al la urba foiro sabaten. Mi volas esti la unua kiu estos aĉetonta la profetkarton de nia favorateto — la blanka muso. ♦

Verkis: Miriĉ Jadranka – Zajeĉar – Serbio Esperanto ligo.

La lasta rigardo al Miskolc - Tapolca



Erika Godó



Olga apogis sian frunton kontraŭ la fenestro de la buso. La veturilo malrapide forlasis Miskolc Tapolcon, dum la domoj de la urbo iom post iom malgrandiĝis en la ora posttagmeza lumo. La sunradioj oblikve penetris tra la vitro kaj pentris lumajn striojn sur la fenestro kaj sur la vizaĝoj de la pasaĝeroj.

Olga ankoraŭ longe ne deturnis sian rigardon de la pejzaĝo.

Stranga sento ekloĝis en ŝia koro — iom peza, sed samtempe trankviliga. Ŝi sciis, ke ŝi devas foriri, tamen ŝi sentis kvazaŭ ŝi postlasus ion gravan.

La tagoj tie pasigitaj tuŝis ŝin pli profunde ol ŝi atendis. Ili ne restis en ŝia memoro kiel simpla ekskurso. Ĝi fariĝis io pli profunda: la silento, la ombroj de la arboj, la kvieta surfaco de la lago, la sunradioj filtrantaj tra la folioj.

Kaj tiu stranga sento, ke tie, dum kelka tempo, la mondo ĉirkaŭ ŝi ĉesis kuri.

Ŝi rememoris unu posttagmezon, kiam ŝi sola promenis inter la maljunaj arboj de la parko. Iliaj branĉoj etendiĝis super la vojeto kvazaŭ ili dum jarcentoj gardus iun sekreton. Tra la folioj de tempo al tempo penetris sunradio, kiu pentris lumajn makulojn sur la vojo.

Olga iris malrapide.

Ŝi nenien rapidis.

Kiam ŝi atingis la lagon, ŝi haltis. Dum longaj minutoj ŝi simple rigardis la akvon. Sur ĝia surfaco la tremantaj sunlumoj dancis kvazaŭ la suno mem interparolus kun la lago.

En tiu momento ĉio ŝajnis simpla.

Ŝi ne pensis pri hieraŭ, nek pri morgaŭ. Ŝi simple staris tie, aŭskultis la silenton kaj sentis, ke io en ŝi malrapide liberiĝas.

Kvazaŭ la naturo redonus al ŝi ion, kion la vivo dum la lastaj jaroj forprenis.

Nova forto plenigis ŝin.

Kiam ŝi poste foriris, ŝi ankoraŭ longe rigardis malantaŭen.

Nun, sidante en la buso, tiuj memoroj revenis al ŝi. Ŝi vidis antaŭ si la akvon de la lago, la maljunajn arbojn, la vojetojn banitajn de sunlumo. Ŝi denove sentis la freŝan aeron kaj preskaŭ aŭdis tiun specialan, profundan silenton, en kiu estis tiel facile retrovi sin mem.

La buso tamen veturis plu kaj portis ŝin ĉiam pli malproksimen.

Olga fermis la okulojn.

Miskolc-tapolca jam estis malantaŭ ŝi.

Sed ŝi sciis, ke ekzistas lokoj, kiujn oni ne povas simple postlasi.

Ĉar parto de ili restas en ni.

Eble pro tio ŝi ridetis.

Miskolc-Tapolca malrapide malaperis malantaŭ la horizonto, sed la lumoj de la lago ankoraŭ longe brilis en ŝia animo.

Kaj Olga unuafoje sentis, ke ŝi ne nur foriras de iu loko.

Ŝi iom post iom ankaŭ revenas al si mem. ♦

Du resumaj kanzonoj

Roland Platteau



- Entuta epoko, plena konscio pri la vero (vero?)

La mensa vivo kaj nia socio per kultaj kanzonoj, kiuj ĉiu konsistas entutan simbolon:

Ne plu estas da "poste", fama kanzono de Juliette Greco (ŝi estis juna seksa simbolulino en la keloj ekzistadismaj de la pariza kvartalo Saint-Germain-des-Près en 1945; en 2019 ŝi plu vivis, en 2020 ne) <https://www.youtube.com/watch?v=4guL86vGM6w>

Tiu kanzono de Guy Béart, fakte de 1960, (en kiu diratas «ne plu estas da poste/en Saint-Germain-des-Près/ ... Nur estas hodiaŭ») estas la filozofa simbolo de la jaroj kvindekaj, la jaroj de la scienco (mi eĉ dirus SCIENCO!) kaj la malespero, tuta moderneco, de la ekzistadisma malespero, Nova Romano, Ionesco, Albert Camus, Samuel Beckett. (*Finalo de Partio* ĵus estas nun sperantigita kaj eldonita de LK-koop)

Tio povas esti taksata amare inteligenta kaj esence moderna, tia senespera klarvideco, eĉ eble ĝi estas mia, sed krom al la tombejo (nepre! laŭ difino!) aŭ al la memmortigo (ĉe tiuj, kiuj havas iom pli da kuraĝo) al kio tio kondukas?

Krom ĉe tiuj, kiuj forentirkestigis inteligenton kaj klarvidecon – tro suferiga, urĝe trankviligan pilolon! - intelekto, post la senelireja vojo kion ni faros? Tiu klarvideco el kio restas hodiaŭ nur la dogmo de la «ĉi-tie kaj nun» kaj la «buddhismo» de eŭtanaziismemuloj kaj de la psiĥologia ĝusteco laŭ la furora modo.

(Tiam estis la epoko, kiam mi estis infano kaj klarvidulo)

(Sed, mi bedaŭras diri: mi abomenas buddhismon. Mi tre preferas la «Filozofion de la Absurdo», kiu, almenaŭ, estas sento ribela, ne konsentema, kaj ne idealigas la morton, nek ties eternan kaj definitivan malplenon)

- DU epokoj! Jen same pri la 70aj

Do alia kanzono, fakte de 1981, kiu estas

tuta resumo de l'pasinta epoko, Tio estas:

«Li liberas, Maks'» de Hervé Christiani.

<https://www.youtube.com/watch?v=nBcJB4CqxEQ>

(«Magion li metas, en kion faras li

Li emas rideti, eĉ al stultuloj li.

Plene li ĝuas, ne falas per kapti'

Ne lasas sin logi per ĉiu reklamil'



Simple vivas li senzorge de l'mensoj
De l'kaptitaj fiŝoj ĉirkaŭ li en nasoj
Li liberigas Maks! li liberigas Maks!
Iu diris, ke flugi vidis lin»)

- (la tuto de la kanzono:)

«Magion li metas, en kion faras li
Li emas al ridet', eĉ al stultuloj li.
Plene li ĝuas, ne falas per kaptil'
Ne lasas sin logi per ĉiuj l'reklamil'
Simple li vivas senzorge de l'mensoj
De l'kaptitaj fiŝoj ĉirkaŭ li en nasoj
Li liberigas Maks li liberigas Maks!
Unu diras, ke flugi vidis lin

Li laboretas, kiam konsentas la korp'
Ne estas risko, ke li laborus ĝis tro
En vetnaĝo, ne partoprenas li
Pro belaj vezikoj ne fanfaronas li
Li liberigas Maks' li liberigas Maks!
Unu diras, ke flugi vidis lin

Li rigardas ĉion kun l'okuloj de am'
Tuj vidinte vin, jam vin teneras li
Krias ne li, nek strebas al la fam'
Sed la statuoj havas rigardon por li
Li liberigas Maks li liberigas Maks!
Unu diras, ke flugi vidis lin

Kaj certe knabinoj lin amindumas.
Al ili li flustras fabelojn en l'orel'
Li trans la kampoj ilin promenumas
Rajdi kun feoj kiam falas la vesper'
Li liberigas Maks li liberigas Maks!
Unu diras, ke flugi vidis lin

Ĉar por vojaĝi for, al li mankas la or'
Iras li viziti loĝantojn de la kor'
Ni scias, pri kio babilas la ul'
Por respeguli tiom da am' en l'okul'
Li liberigas Maks li liberigas Maks!
Unu diras, ke flugi vidis lin

Tiam estis la epoko libera kaj «hipia» de la jaroj sepdekaj, tiuj de Gébé, Julien Clerc kaj Polnareff.

Rimarkoj:

1° la timo antaŭ la morto malaperis, kaj la konscio pri vanteco de ĉio ajn. Tro suferigas esti klarvida! Do oni forpremadas, kaj oni ĝuas (kio igas, ke la junuloj, kiuj kredis sin «revoluciuloj» estas pretigontaj la ŝoseon por la nuntempaj burĝoj «liberal-libertariaj»!)

Tiel ankaŭ naskiĝis tio, kion mi nomas «la Sekto de la Kultantoj de la Morto».

2° Tio estas idealo rava, sed ... ve, la mojosaj junuloj, kiuj revumis tiun epokon, ne povis resti tiaj. Tiuj, kiuj plu restis, iĝis maljunuloj, solaj, malfreŝaj, eĉ sekiĝintaj, foje amaraj, aŭ marĝenaj, aŭ mortintaj. La aliaj? Nu, la aliaj, ili normiĝis, ili iĝis burĝoj, tiuj burĝoj, kiujn en Francujo oni nomas pli kaj pli moke «bobo»-oj, riĉaj, bone instalitaj en la socio, kiel en la filmo de Claude Sautet «Koro en Vintro», ili ŝajnigas kredi plu je la samaj valoroj – fraze, sed en la vero ili estas profunde mergitaj en la malo! - tio ebligas al ili kovi pretendon al saĝumi kaj malestimi la popolon! (kiel tiuj morde priskribitaj en la fama libro de François Begaudeau «Rakonto pri cia stulteco» ekzemple).

3° Kaj tio estis epoko, kiam oni estis liberaj kaj humanismaj, kaj ne jam reĝis la totalismaj higienistoj nek la histeriaj kontraŭ-tumultaj policistoj nuntempaj.

(Tiam estis la epoko, kiam mi estis junula, kaj mi laboris) ♦

La perdita mondo de kurtonda radio

Roland Platteau



Ĉiu, kiu ne aŭskultis kurtondan radion dum la 20-a jarcento — tiu turbula oceano, pli bela, elvokiva kaj mistera ol iu ajn verko de "nuntempa" elektroakustika muziko — maltrafis ĉion! Tiu simfonio de radiostacioj — svagiĝantaj kaj malaperantaj aŭ subite reaperantaj antaŭ ol forgliti denove — elsendantaj en dekoj da misteraj lingvoj, elsendantaj kiu scias kiajn misterajn programojn, muzikpecojn el ĉiu angulo de la globo (inkluzive de klasika muziko), tiujn glisandojn, nepriskribeblajn gluglojn, krakadetojn, virtualajn ŝtormojn de la sendondoj, kapturnigajn kirlakvojn — memorigantajn la konstantan grumbladon de mia persrasa katino Poupounette kiam ŝi estis "malbonhumora"! Kaj ĉio ĉi meze de maro da "bip-bip" de miloj da Morse-kodaj dissendoj — mem neeviteble tiel misteraj (ŝajne ili ne plu estas uzataj, aŭ eĉ malpermesitaj — kio ne estas malpermesita nuntempe?!) — tre simile al la neŭtrinoj, en kiuj ni konstante mergas!

Ve! Trifoje ve! Lastatempe (en la 1990-aj jaroj), mi provis aŭskulti denove per mia — aŭ pli ĝuste, nia — malnova tubradio (<https://www.picclickimg.com/aXIAAOSwunpjzrQI/Poste-de-radio-a-lampes-Vintage-1945-1949.webp>). Ĝi ne kaptas FM-ondojn, sed antaŭe ĝi kaptis ne nur long-ondojn kaj mez-ondojn (agorditaj al stacioj kiel Hilversum, Florenco, Sottens, kaj multaj aliaj malproksimaj urboj) sed ankaŭ kurtondojn kaj ultra-mallong-ondojn. Nun, preskaŭ nenio restas, kaj la nombro da elsendoj malkreskas jaron post jaro. Baldaŭ, estos kompleta silento sur ĉi tiuj sendondoj... Tuta kultura heredaĵo, tuta heredaĵo de revoj, jarcento da vivoj (ĝi ampleksis preskaŭ jarcenton da la historio de la Tero, kaj — kiel ĉio alia — ĝi ŝajne finiĝis); ĝi estas pli tragika ol la dinamitado de la Bamijanaj Budhoj! Kaj infanoj hodiaŭ neniam konos la sonon — foje tiel ĝenan! — tamen tiel fascinan, de malbone agordita kurtonda radioricevilo!!! ♦



Ĉu mi povas?

Ismary Lezcano García



Neniam mi forgesos
vian rapidan geston
kiam mi demandis ion
tremante apud vi.

Mi volis tre intense
ke vi kisu miajn lipojn
sed mi ankaŭ tro timis
ke vi sentu kiel mi.

Bena demando mia!
kaj mi pensis tenere
sur via brusto dormi
por esti tiel feliĉ'.

Sed via reago estis
certe diega ĉielo
ĉar mi sciis ke ankaŭ
vi multe amas min.



Morala instruo de avĉjo Tiko

Violeta V.Joviĉ

Esperantigita de Miriĉ Jadranka



Najbarino, Ljubinka, povra kukulin', restis vidvino kie junulinon kun du infanoj. Sen iu ajn.

ĈI-MATENE MI RENKONTIS ŜIN ĈE LA AKVO FONTO. Ŝi estis preninta la akvon plenigite la argilajn kruĉojn. Mi tuj pridemandis ŝin, ja estis ĝentile, kiel ŝi eltenas la vivon.

Ŝi respondis jene: "Onklo Tiko, kion diri, kiel bruligita nigelo, de supre kaj de malsupre brulas, nu, kiel mi povus elekti kaj vivi.

-Ne tiel, kara junedzino, ankoraŭ vi junas. Se al vi vivo estas kiel al tiu bruligita nigelo, vi faru kiel pano sub tegolo. Kresku, ekodoru kaj nutru viajn infanojn. Kiam ili estas sataj eĉ iliaj tagoj heliĝos. Kiam ili vidu kiel vi estas kapabla solvi la problemon kun malbono kaj kiam vi forjetu vian kovrilaĉon kiu klinigis premante vian animon.

Nu, lavu viajn vangojn, ĉi-tie ĉe la akvofonto. Kaj speguliĝu vi tie, speguliĝu en la klara pura akvofonto.... Kaj rigardu vin, rigardu vin en la akvon!

Ŝi akceptis mian konsilon. Jen, mi renkontis ŝin ie en kamparo. Ŝi fluganta kiel falkino. Vento puŝas ŝiajn nigrajn vestaĵoj sed kiam ni renkontiĝis ŝi benis min per "Dio helpas! kaj ŝi ridas, la kapon levas, rektigas sian dorson kaj pasas al sia vojo kiel kapriolido.



Ŝi bone scias ke ŝiaj infanoj ne devas vidi ŝin kiel ŝi lamentadas aŭ blasfermas la vivon kaj sian destinton. Neniam antaŭ ili. Ŝi devas paŝi per forta paŝo ne dorskurbiĝinta.

Morala instruo - la virino estas pli forta ol ĉiuj potencoj. Ŝi estas vivo – ŝi donas la vivon. Nenio estas ke ŝi ne povas! Samkiel eta formiko kiuj tenas la grandan morditan pomon aŭ pajlon subkiu ĝi estas tute nevidebla. Sed ĝi iras plu kaj plu. Neniu scias kiel tio povas sed ĝi iras ne turniĝante nur irante antaŭen al sia **vivovojo** ĝis la fino de ĝia destino. ♦

el Nisa dialekto "Deda Tikine dume" Zajĉar Aŭgusto 20-21

Longa vojo antaŭen



Paŭlo Sergio Viana

La registaro diskonigis antaŭ nelonge, ke nia lando atingis tre malaltan nivelon de analfabeteco. La plej mlaltan en la historio, ĉirkaŭ 5 procentoj el la loĝantaro de homoj pli ol 15-jaraĝaj, kio respondas al proksimume 8 milionoj da brazilanoj.

Ĝi estas bona novaĵo. Ni scias, ke nula analfabeteco estas preskaŭ neebila. Sekve, aplaŭdojn al Brazilo.

Post la aplaŭdoj, ni kompletigu la datumojn. Ĉirkaŭ 30 procentoj el la brazila loĝantaro de homoj pli ol 15-jaraĝaj konsistas el... "funkciaj analfabetoj". Homoj, kiuj apenaŭ rekonas izolitajn vortojn kaj tre simplajn frazojn. Ĉu necesas kalkuli, kiom da milionoj da civitanoj troviĝas en tiu socitavolo? Inter la pli ol 200 milionoj da homoj, kiuj loĝas en ĉi tiu lando, unu triono estas analfabeta, tuta aŭ funkcia.

Urĝas iri antaŭen. Ne sufiĉas alfabetigi je primitiva nivelo. Estas necese transformi la uzon de la lingvo en funkcion, en perilon por homa promocio, en instrumenton por pensado. Estas tempo revalorigi la libron.

Edukado, en Brazilo, havas longan vojon antaŭen. ♦



KAMPO NULO-PUNKTO



Paulo P. Nascentes

L' animo ne plendas, kvietiĝas:
Ne mi plendas, aklamas la kvieton
Sur la nulo-punkto mi min rebonigas,
Foriras el la radio de la plendo,
Eniras la delikatan spacon de la ago.
Forgesas tion, kiun mi ne volas:
Timo, plendo, obstino.
Vidas mi en la arto de la ĝojo
La poezion sen tordo.
Intuicio fluas el la Fonto,
Mi vidas la ĵus-naskiĝintan
Revivi la noosferon
Sen hieraŭ, sen poste, nur nun.
Do kiucele reklami?
Kio ne gravas foriris:
Sed, ĉu tion la plendanto vidas?!



FORFUĜA BRILO

Paulo P. Nascentes

La blanka paperfolio
senvorta
ne iras aŭ fiaskas!
La poemo estas la blankeco
de la folio
malantaŭ rejloj
de la rekantaĵo
malantaŭ la literoj
nigraj
portaloj – de l' brilo?



Mi koleras

Angel Arquillos Lopez




Via rigardo

ege serena
min tre timigas,
ĉar mi koleras
kaj mi ĉagrenas
pro mi ne scias.
Ĝi estas fulma
kiel la suno,
kiu blindigas
miajn okulojn.
Karega Dio,
Vi min rigardas,
mi ne Vin vidas,
ĉar mi ne rajtas.

Dum la mateno

kaj la vespero
ĉio malhelas
nenio belas,
karega Dio
kaj mi kverelas
kun mia mio,
ĉar mia menso
ĉiam malplenas
kaj mia mondo
ne plu serenas.
Mi min demandas
ĉiumomente
ĉu mia celo

estos la fino
de mia vivo.
Mi min demandas
ĉu ja valoras
imagi sonĝojn
pri fantazio,
ĉar mi ne ĝuas
Vian ĉeeston,
mi tre suferas
ĉar Vi ne veras,
kaj mi koleras,
kaj mi koleras,
kaj mi koleras.



SEPTEMBRO

*Verkis: Rudina Muharremi Beja
Tradukis: Bardhyl Adem Selimi*



Rudina Muharremi Beja



Bardhyl Adem Selimi

Septembro venis denove,
kun kelkaj pluvgutoj sur la ŝultroj de la urbo
kaj kun stratoj, kiuj revekas siajn vejnojn
post longa somero.

La urbo ekzumadas.

La fenestroj malfermas siajn okulojn,
la semaforoj ekbruligas
la ruĝajn vundojn de la matenoj,
la busoj pleniĝas je vizaĝoj
kiuj ankoraŭ portas en siaj okuloj
pecon de maro,
sunsubiron,
matenon sen horloĝo.

Preskaŭ ĉiuj revenis.

El la bordoj, kie la tempo iris nudpiede,
el la montoj, kie la silento havis pli da senco
ol miloj da vortoj,
el tiuj malmultaj feriaj tagoj,
kiam la homo, por momento,
kuraĝas esti neniu.

Nun denove hastado.

Hastado al la oficejoj,
al la horaroj,
al la telefonoj, kiuj sonoras
kiel etaj alarmsonoriloj,
al vespero,
kiun ni nomas, kvazaŭ ĝi estus vivo.

Kaj neniu scias
kien ni iras.

Ni fordonas la matenojn kontraŭ salajro,
la vesperojn kontraŭ promeso,
la jarojn kontraŭ „iam“,
kiu ĉiam restas
unu paŝon pli for.

Kiel stranga estas tiu homa soifo:

kiam li havas malmulte, li volas pli;
kiam li havas multe, li volas ankoraŭ;
kiam oni donas al li liberecon,
li mem konstruas al si ĉelon
kaj poste forgesas
kie li lasis la ŝlosilon.

Neniu kontentiĝas
pri sia propra libereco.

Ni plenigas la ĉielon per planoj
kaj la teron per limdatoj;
ni donas belajn nomojn al nia angoro:
ambicio,
sukceso,
vivo.

Ĉiu elektis sian propran abismon.

Iu fosas ĝin per sia kariero,
iu per la soifo esti admirata,
iu per la timo perdi.

Kaj ĉiu, silente,
ĵetas ion en ĝin:

revon,
dimanĉon,
amikon,
trankvilan vesperon,
pecon de si mem.

Poste li ĵetas ankaŭ unu jaron.

Kaj iun tagon,
kiam ĉio fine ŝajnas
esti en sia loko,

li komprenas, ke la domo estas konstruita,
sed tiu, kiu devus loĝi en ĝi,
restis ie malantaŭe.

Septembro venis denove.

La urbo zumadas
kiel koro, kiu forgesis
pro kio ĝi batas.

Kaj eble la tragedio de la homo
ne estas, ke iun tagon li mortos.

Ĝi estas, ke li povas pasigi tutan vivon
neniam komprenante
ke li ne vivis.





Pejzaĝo

— Maria Nazaré Laroca

De l' hotelfenestro
mia filo kaptas
aŭroron ĉe marbordo.

La ĝojo de l' suno
surverŝas oron
en la maron de Natal'.

Dum momento,
malaperas ĥaoso,
kaj stariĝas paco.



La ikono

Julian Modest



La vilaĝo estis eta, kaŝita ĉe la piedoj de Balkano. Oriente de ĝi vastiĝis densa kverka arbaro kaj okcidente - la kamparo. La homoj, kiuj loĝis ĉi tie, estis kvietaj kaj laboremaj. La vilaĝo havis la neordinaran nomon Kareso. Neniu el la loĝantoj povis diri, kiu kiam donis tiun ĉi belan kaj poezian nomon al la vilaĝo.

Kiel por multaj vilaĝoj, tiel por Kareso, oni rakontis diversajn mirindajn legendojn. Iujn el ili delonge oni forgesis, sed unu daŭre okupis la imagon ne nur de la vilaĝanoj de Kareso, sed de ĉiuj kiuj hazarde preterpasis la vilaĝon aŭ venis en ĝin.

La homoj rakontis, ke ĉe la fino de la vilaĝo, ĉe la fonto, proksime al la vojo, kiu pasas tra la kampo kaj gvidas al la urbo, sur la senarbejo Patrino Larmo, iam nokte dum aŭgusto, kiam ne estas luno, aperas ia stranga brilo. Iuj diris, ke ĝi similas al kolora fajro, aliaj asertis, ke ĝi estas kiel fasko da oraj radioj, sed tre malmultaj homoj vidis tiun ĉi brilon.

Oni rakontis, ke tie estis enfosita la ortrezoro de turka bejo. Kiam la turkoj fuĝis de Bulgario dum la rusa-turka milito, bejo, kiu tiam regis la vilaĝon, vidis, ke li ne povas forkuri kun sia tuta trezoro kaj ordonis, ke oni kaŝu tie parton de la oro, kiun li portis. Fama estis tiu ĉi legendo kaj multaj trezorserĉantoj ofte fosis sur Patrino Larmo, sed ĝis nun nenion ili trovis. Certe ĉio, kion oni rakontis estis nur fabelo, kiu fajrigis la imagojn kaj gardis la memoron pri pasintaj tempoj, vualitaj en mistero.

Pri Patrino Larmo oni rakontis ankaŭ alian legendon, tamen multaj homoj delonge ĝin forgesis. Oni diris, ke sur tiu ĉi senarbejo, ĉe la fonto, iam estis bela blanka monahejo, simila al kolombo, sidiĝanta sur la verda senarbejo, inter la jarcentaj kverkoj. Kiam la turkoj konkeris la vilaĝon, ili ruinigis kaj bruligis la monahejon kaj eĉ spuron ne restis de ĝi. Nun neniu scias kiel aspektis tiu monahejo.

Kiam li estis infano, Trajan plurfoje aŭdis tiujn ĉi legendojn. Lia avino kutimis rakonti ilin vintre. Tiam ŝi kaj Trajan sidis ĉe la varma forno en la eta vilaĝa ĉambro. De iom malfermita pordeto de la forno videblis la ludemaj flamoj, kiuj ĵetis misteran lumon sur la sulkiĝintan kaj velkintan avinan vizaĝon.

Tiam Trajan aŭskultis ŝin sinforgese kaj lia infana imago detale pentris la monahejon kaj la grandegajn flamajn langojn, kiuj malsate neniigis la monaĥejajn konstruaĵojn. Lia infana koro tremis kaj Trajan ne povis kompreni, ke dum la avino rakontis tiujn ĉi teruregajn historiojn, ŝi ruzete ridetis, ĉar ŝiaj fabeloj igis Trajan forgesi la ludojn kaj petolojn.

Delonge jam Trajan loĝis en la urbo, sed ofte li vizitis la vilaĝon kaj la gepatran domon. Somere li kutimis ripozi en la silenta kaj friska korto de la olda gepatra domo. Dum la lastaj jaroj, kiam lia vivo fluis kiel sablo, Trajan pli ofte venis en Kareson. Nur ĉi tie li povis vere ripozi, malproksime de la ĉiutagaj zorgoj kaj problemoj.

Ĉi-semajnfine, kiel kutime vendrede posttagmeze, Trajan preparis sin por ekiri al Kareso, tamen antaŭ la ekveturo, li rimarkis, ke la aŭto ne tre bone funkciis kaj li devis iom ĝin ripari. Nesentebles vesperiĝis.

Trajan stiris malrapide. Post horo li estos en la vilaĝo kaj jam antaŭsentis la plezuron de la ripozo; li eksidos en la korto, sub la olda pirarbo, preparos salaton de tomatoj kaj kukumoj, verŝos en etan glason iom de la hejma forta brando kaj en la nokta frisko li longe ĝuos la susuron de la arbfolioj. Trajan ŝatis la somerajn noktojn en Kareso, kiuj memorigis lin pri lia infaneco, pri liaj gepatroj kaj parencoj, kiuj delonge jam translokiĝis en la transon.

La vojo al Kareso estis dezerta. Videblis nek aŭto, nek kamiono. Eĉ lumo ne estis en ĉi agrabla aŭgusta nokto. Baldaŭ Trajan proksimiĝos al senarbejo Patrino Larmo kaj eniros en la silentan dormantan vilaĝon. Antaŭ la senarbejo estis vojkurbiĝo kaj Trajan iom reduktis la rapidecon. Ĝuste tiam li rimarkis ian fajron inter la arboj. Strange? Kiu bruligis fajron ĉi tie meze de la nokto? Trajan jam preskaŭ premis la gaspedalon, kiam ŝajnis al li, ke la fajro estas multkolora - blua, flava, roza, ora. Subite li opiniis, ke li haluciniĝas aŭ sonĝas. Trajan iom deflankiĝis de la vojo, bremsis kaj kelkajn sekundojn senmova sidis en la aŭto. La fajro aŭ la koloraj lumoj daŭre ludis inter la arboj. Li pli kaj pli konsterniĝis kaj ne sciis kion entrepreni. Ĉu li sonĝis, imagis aŭ tio estis ia ŝerco? Subite Trajan rememoris la legendon pri la enfosita ortrezoro de bejo kaj jam kredis, ke iu ŝercas. Trajan ne estis timema kaj decidis mem vidi kio okazas. Li eliris el la aŭto kaj ekiris al la arboj, kie videblis la stranga brilo. Li paŝis malrapide, singardeme, sed kiam li estis je du metroj de la brilo, ĝi subite perdiĝis kaj aperis denove iom pli flanke kaj pli malproksime de li. Tiel Trajan vagis tra la senarbejo Patrino Larmo kaj ne povis kompreni kio okazis. La brilo jen aperis, jen malaperis. Nenie videblis homo kaj ĉie regis profunda silento. Post duonhora vagado tien, reen, Trajan konvinkiĝis, ke ĉio estas sensenca kaj freneza. Li revenis en la aŭton, funkciigis ĝin kaj daŭrigis al la vilaĝo.

Ĉu li songis aŭ tio vere estis la fajro pri kiu oni asertis, ke ĝi aperas tie, kie estas enfosita la trezoro? Sed tio estas nur legendo. Ja, trezorserĉantoj, kiuj venis de proksime kaj malproksime delonge plurfoje trafosis la tutan senarbejon Patrina Larmo kaj trovis nenion.

Trajan eniris la gepatran domon, preparis salaton, verŝis iom da brando en etan glason kaj sidiĝis ĉe la tablo en la korto, sub la volbo de la vito. Li longe sidis kaj provis forgesi la neordinaran brilon. „Tio estis nur vizio - li meditis - Mi estas tre laca, aŭ eble mi jam sufiĉe maljuniĝis.”

Li estis sesdekjara kaj post du monatoj devis pensiiĝi. Lia edzino forpasis antaŭ dek kvin jaroj kaj lia filino kun sia familio loĝis en Burgas. Foje en la jaro ŝi gastis ĉe li kaj ankaŭ Trajan foje jare veturis al Burgas por vidi la genepojn.

Ĉi-nokte Trajan malfrue enlitiĝis. En Kareso, kie la aero estis pura kaj ĉiam regis silento, li kutime bone kaj profunde dormis, sed ĉi-nokte li ne povis ekdormi. Dufoje li ellitiĝis, eliris el la domo, promenis en la korto kaj poste denove enlitiĝis. Je tagiĝo Trajan ekdormis kaj songis strangan songon. Li estis sur senarbejo Patrina Larmo kaj nenion oni povis vidi en la mallumo. Subite antaŭ li io blanka moviĝis. Trajan streĉis rigardon kaj vidis junan virinon, vestitan en longa blanka robo, pli ĝuste en longa blanka ĉemizo. Ŝi estis nudpieda, kun blondaj haroj, similaj al pezaj oraj fadenoj. La junulino kvazaŭ ridetus al li kaj logis lin postsekvi ŝin. Pezspirante Trajan rapide paŝis post ŝi, sed antaŭ ol esti atingita aŭ tuŝita, la junulino malaperis kaj poste tuj subite ŝi aperis malantaŭ li aŭ flanke de li. Trajan kuris inter la arboj, aŭ dekstren aŭ maldekstren, sed vane. Li ne povis proksimiĝi al la junulino. Li vekiĝis ŝvita, laca kaj senforta.

Dum la tago li provis fari ion, sed la laboro ne prosperis. Fin-fine Trajan ĵetis la ilojn kaj ekiris al la senarbejo Patrina Larmo. Li ne sciis kio tiris lin tien, sed deziris bone trarigardi la senarbejon je taga lumo. Li paŝis rapide kaj preskaŭ ne rimarkis la homojn, kiuj preterpasis lin kaj afable lin salutis.

Trajan venis al la senarbejo, trinkis akvon de la malvarma fonto kaj longe silente sidis ĉe la fonto. Nenio stranga videblis tie. Ĉio estis tiel, kiel li memoris jam de la infaneco. Trajan provis rememori sian songon kaj ŝajnis al li, ke songe li vidis la junulinon sub la branĉoj de la olda saliko, kiu kreskis ĉe la fonto. Jes, en la songo, Trajan tre klare vidis la salikon.

Tamen li decidis, ke ne estas senco pli sidi tie kaj ekiris al la vilaĝo. Survoje io denove komencis tikli lian scivolemon. Ĉu vere ne estas trezoro, kaŝita tie? Kion signifas la koloraj flamoj hieraŭ nokte kaj la stranga songo?

Ĉiam li opiniis sin realisto, homo, kiu stabile staras sur la tero, tamen nun io forte igis lin preni fosilon kaj ŝovelilon kaj komenci fosi sub la olda saliko, ĉe la fonto sur Patrino Larmo. „Kion opinioj liaj samvilaĝanoj? - meditis Trajan. - Eble ili diros, ke li freneziĝis.” Ĉiuj konis lin kiel saĝan kaj seriozan viron. Trajan finis universitaton, estis inĝeniero. Tre malmultaj vilaĝanoj finis universitaton kaj Trajan bone sciis, ke liaj parencoj kaj konatoj fieras pri li.

Trajan prenis la fosilon kaj ŝovelilon kaj kvazaŭ iu lin pelus, li ekiris denove al Patrino Larmo. Li ekstaris sub la jarcenta saliko kaj provis rememori kie ĝuste en la sonĝo li vidis la junulinon en la blanka robo. Ŝajne ŝi staris oriente de la fonto. Trajan komencis fosi je kelkaj paŝoj de la saliktrunko. Li fosis rapide, sen halti, spiris profunde, ŝvitis kaj salaj ŝvitgutoj ruliĝis sur lia vizaĝo. Trajan rimarkis, ke al la fonto proksimiĝis maljunulino, sed li ne ĉesis fosi, li nur ŝajnis, ke li ne vidas ŝin. La maljunulino kliniĝis, trinkis akvon de la fonto. Iom ŝi observis lin kaj krucsignis. Eble ŝi opiniis, ke Trajan malsaniĝis aŭ freneziĝis kaj tial li fosas ĉi tie, ĉe la saliko, dimanĉe matene.

Trajan tamen daŭre fosis. La neordinara forto igis lin fosi kaj li ne sentis lacon. Li pli kaj pli ŝvitis kaj demetis la ĉemizon. Trajan ne memoris antaŭ kiom da jaroj li lastfoje fosis. La fosaĵo jam estis ĉirkaŭ duonmetron profunda, kiam la fosilo frapis ion malmolan. Ne estis metalo, sed ligno. Trajan ĵetis la fosilon, genuiĝis en la fosaĵo kaj malkovris lignan tabulon. Granda senrevigo obsedis Trajan. Ne estis la trezoro, sed eble ia putrita ligna tabulo, kiu hazarde troviĝis tie. Tamen la tabulo estis bone kaŝita, ĉar ĉirkaŭ ĝi videblis ege malnovaj restaĵoj de ia teksaĵo, delonge jam ŝirita kaj putrinta. Tiuj ĉi teksaĵaj pecoj verŝajne estis de kanaba sako. Evidente la tabulo estis diligente kaj atente volvita en ĝi, sed delonge jam la sako putriĝis kaj ŝiriĝis. Trajan elprenis la tabulon, viŝis ĝin per manplato kaj rigidiĝis. La tabulo estis ikono. Vere mankis iuj detaloj, sed bone videblis, ke ĝi estas ikono de Sankta Dipatrino. Trajan ekstremis. Li sidiĝis, pli ĝuste falis sur la teron elĉerpita, senforta, laca. La Ikono tremis en liaj manoj. En lia kapo kiel en muelejo batiĝis sennombraj demandoj, supozoj, konjektoj. Kion signifis tio? Kiu kaŝis la ikonon ĉi tie? Kial kaj kiam oni enfosis ĝin? Kial ĝuste li devis malkovri ĝin? Trajan ne povis respondi al tiuj ĉi demandoj. Nur profunde en si mem li sentis, ke kun li okazas io stranga. Li ne estis pia. Tre malofte li eniris templon, sed nun iu granda interna forto obsedis lin. Ne estis hazarde, ke ĝuste li trovis tiun ĉi ikonon. Ja, tiom da trezorserĉantoj fosis ĉi tie kaj neniu ĝis nun trovis ĝin. Ne estis hazardaj nek la koloraj flamoj, kiujn li vidis hieraŭ nokte, nek la sonĝo pri la junulino en la neĝoblanka robo. „Kio estas la homo kaj kio povas okazi kun li?” - meditis Trajan.

Li stariĝis, atente volvis la ikonon per sia ĉemizo kaj ekiris al la vilaĝo. Trajan decidis iri al pastro Stoj kaj rakonti al li pri la okazintaĵo. Pastro Stoj estis serioza, edukita persono kaj certe li diros ion pli pri la ikono.

La pastro estis en la korto de sia domo sen sutano kaj okupiĝis pri la abeluloj. Trajan salutis lin.

- „Dio benu vin, mia filo,” respondis Stoj. „Kio gvidas vin al mi?”

Per kelkaj vortoj Trajan rakontis kion li travivis hieraŭ nokte, kiam li veturis al la vilaĝo. Li ankaŭ menciis sian sonĝon kaj diris pri la fosado sub la olda saliko sur la senarbejo Patrino Larmo. Fine Trajan elprenis la ĉemizon kaj montris la ikonon.

Pastro Stoj prenis ĝin per tremantaj manoj, kruccignis kaj longe ĝin rigardis.

- „Ĝi estas ege, ege malnova. Strange, kiu ĝin kaŝis tie? Eble oni deziris savi ĝin. Ja, la legendo rakontas, ke iam tie estis monaĥejo. Ĝia malkovro estas Dia signo. Sur Patrino Larmo ni devas konstrui templon aŭ kapelon.”

Trajan atente alrigardis lin.

- «Pastro, mi entreprenos la konstruon. Ja, mi estas konstruisto.”

- «Dio benu vin, filo mia. Via ago estos granda kaj benita.”



Jam dum la sekva diservo en la vilaĝa templo pastro Stoj diris al la vilaĝanoj pri la ikono kaj petis ilian helpon por konstruo de kapelo sur Patrino Larmo, tie, kie iam estis la bela blanka monaĥejo. La vilaĝanoj miris. Iuj diris, ke tio estas Dia signo, aliaj ne deziris kredi, sed ĉiuj bone konis Trajan kaj neniuj supozis, ke li povus elpensi tion. La homoj estis konvinkitaj, ke nun venis la momento por la trovo de la ikono kaj Dio mem elektis Trajan por tio.

- „Jes,” - diris la vilaĝanoj - „Trajan estas bona kaj honesta homo kaj nehazarde Dio elektis lin por trovi la sanktan ikonon. Nehazarde li vidis la koloran brilon kaj li sonĝis la mirindan sonĝon.”

Multaj vilaĝanoj kredis, ke la ikono de la sankta Dipatrino havas sanigan forton kaj ili preĝis antaŭ ĝi. Pastro Stoj metis la ikonon je la centra loko en la templo kaj multaj homoj de aliaj vilaĝoj venis vidi ĝin kaj preĝi antaŭ ĝi.

Oni komencis rapide kolekti monon por la kapelo. La homoj malavare donis monon, konvinkitaj, ke la kapelo nepre devas esti konstruita sur Patrino Larmo, Ili eĉ opiniis, ke delonge jam devis konstrui kapelon tie, por ke ĉiu sciu, ke iam sur Patrino Larmo estis monaĥejo.

Trajan estis la animo kaj la koro de la kapelkonstruo. Kiam la kolektita monsumo jam sufiĉis, oni difinis tagon por la inaŭguro de la konstruado.

En la komenco de oktobro la kamparaj laboroj jam estis ĉe la fino kaj la vilaĝanoj ankoraŭ kolektis nur la vinberon. La homoj havis pli da libera tempo kaj multaj venis por la solena inaŭguro de la konstruado. Estis agrabla aŭtuna dimanĉo. Sur Patrino Larmo la arbofolioj jam flaviĝis kaj mola ora sunlumo brilis sur la tuta senarbejo.

Solene pastro Stojanov komencis la akvosanktigan diservon. La homoj festvestitaj staris silente kun brulantaj kandeloj mane. Pastro Stojanov ankoraŭ ne estis fininta la diservon, kiam proksime, sur la vojo, haltis nigra aŭto kaj el ĝi eliris tri viroj, kiuj rapide ekpaŝis al la homamaso. Antaŭe iris la partisekretario de la vilaĝo Stojanov, alta svelta persono. Stojanov proksimiĝis al la homoj, disigis ilin kaj ekstaris antaŭ pastro Stojanov.

- „Pastro,” - diris krude Stojanov - „mi avertis vin! Ne inaŭguru la konstruon de tiu ĉi kapelo! Ni loĝas en socialisma lando kaj ne kapelojn, sed uzinojn ni devas konstrui!”

Post tiuj ĉi vortoj Stojanov severe alrigardis la homojn, kaj iom pli akre fiksigardis Trajan. Estiĝis profunda silento. Pastro Stojanov staris kiel ŝtonigita kaj nur la granda arĝenta kruĉo tremis en lia mano. La homoj maltrankvile rigardis unu la alian kaj ne sciis kiel agi. Iuj el ili eĉ komencis foriri.

Stojanov komprenis, ke lia subita apero ĉi tie havis efikon kaj li ne dubis, ke post kelkaj minutoj neniu restos sur Patrino Larmo. Kontenta Stojanov ekiris al la nigra aŭto, ĉe kiu atendis lin la aliaj du viroj, kiuj verŝajne ankaŭ estis partifunkciuloj eble el la urbo. Stojanov marŝis rapide al la aŭto, tamen subite li falis, kvazaŭ iu forhakus lin. La homoj de la senarbejo kaj la du viroj de la aŭto ekkuris al li. Kelkaj, kiuj unuaj proksimiĝis, kliniĝis super li kaj iu el ili time ekflustris: „Li mortis.”

Sur la senarbejo estiĝis tumulto. Iuj el la homoj forkuris, aliaj provis levi la korpon de Stojanov kaj porti al la aŭto.

Trajan rigardis senmova kaj nevole meditis: „Ĉu tiel naskiĝas la legendoj?” ♦

Gajnintoj verkoj de LITERATURA KONKURSO KÁLMÁN KALOCSAY 2026

Branĉo poemo:

Unua loko:

Carmel Mallia

Verko de nekonata forfuĝintino el Libio



Ribelas la ĉiel', la sun' malvarmas
dum malserenas ĉi premaĝ-gondol'.
Ĉi tie l'morto ĉiun nepre lekas.
Ĉi aktualaĵ' similas al pilol'.

Rigardu jen: perdiĝis mia bebo
eble pro l'krudo de la brusta lakt';
la edzo malaperis en la nokto;
nin ĉiujn ŝmiras agoni-barakt'.

Ni traserĉis la stelon, por ke nete
evidentiĝu l'vojo traserĉata;
tuj bedaŭrinde ĝi ekmalaperis
dum ĉi stupora sceno delikata.

Jam oni l'historion precizigis
pri tri personoj kiuj traforlasis
kun azeno al fora Egiptio.
Same l'destin-dolor'nin krake ĉasis.

Forpelis nin patrujo nia kara.
Kie nia proksima lum' ĉiela?
Ne gravas. Fore jam liber' riparas;
Ĉu harmoni' sincera, lum-rivela?

Preĝejojn kaj moskeojn ni forlasis
detruigintajn jam. Jen mov-vibrigo,
kvazaŭ por tuj forgesi la destinon
al plej freŝaj fiero kaj instigo.

Ploretu nu, patrujo plej amata...!
Jen fine lampo kies lum' tremetas
bonvenigante nin, lacajn povrulojn.
Travivos ni...

(el Malto).

la 28-an de novembro 2015.

Dua loko:

CHOE Taesok

La kverko en seka ĉifono



Accero, poplo, fago, alno –

ĉi ĉiu foliarbo nudas

eĉ nune en martfina parko.

Sed kverko ventosvinge ludas

en vesto de la ĵusa jaro.

Vi, kverko, admiringe prudas!

Folioj viaj seke brunaj,

ankoraŭ estas sen difekto

kaj do por koniferoj junaj

mi prenas vin dum mia spekto.

Imponas vi sur belvedero,

samkiel pino sur neĝtero.

Ja ĝustatempas foliarbo.

Ho, kial tamen vi solenas

per l' ekssezona foliaro?

Ĉu la paseo vin katenas?

Ĉu vent' tro feblas por forskui?

Ĉu frost' tro mildas por forpluki?

Ĉu simple pro la denaskeco

por ŝirmi sproson kontraŭ neĝo?

Mortaĵon tenas vi ĝis l' eko

de novburĝono sur la branĉo.

Malŝargâ igas sen avaro

vin tiam la folivualo.

Aspektas vide vi kreteno.

Vin mokas hom' pro nekompreneo:

persistas vi en la ĉifono.

Sekuras tamen novburĝono

pro via daŭra pacienco

por ŝirmi kontraŭ fivetero.

Vi fine brilas en helverdo.

Plej montras ĉio en mizero.

Foliojn sekajn por burĝono

vi tenas ĝis la lasta horo.

Pro via muta leciono

kapklinon faras mi el koro.

Tria loko

Miklós Cseszneky

Helikoptero super la urbo

Aŭskultu, filo,

tiu bruo super la tegmentoj
ne estas ŝtormo
nek la maro reveninta al la urbo.

Ĝi estas helikoptero.

Vi demandas kial ĝi rondiras tiel longe
super la kvartalo
kvazaŭ ĝi serĉus perditan nomon.

Mi ne scias.

Foje la ĉielo sendas
maŝinojn anstataŭ birdojn
kaj la aero pleniĝas je metala susuro
kiun la stratoj ne komprenas.

Rigardu la fenestrojn:
iu malfermas kurtenon,
iu alia fermas la radion,
kaj la maljuna najbaro
levas la kapon de sia balkono.



Ĉiu pensas ion alian.

Iu timas novaĵon.
Iu esperas miraklon.
Iu simple kalkulas
kiom longe povas daŭri la bruo.

Sed vi, filo, memoru:

la helikoptero pasos.

La urbo restos kun siaj ŝtuparoj,
kun la odoroj de pano kaj benzino,
kun la voĉoj kiuj revenas vespere
tra mallumaj kortoj.

Kaj vi kreskos
inter tiuj sonoj de la mondo
kiuj venas, rondiras iom
kaj poste malaperas
kvazaŭ ili neniam konis nin.

Zumada valso



Manel Sales

La zumado de la insektoj
deseonas nian silenton.
Tro simplaj vortoj,
kiuj devigas nin sen paroli.

Ŝtormo da ideoj,
ŝtono super la kolo.
Mi volas nun babili,
sed la voĉo estingiĝas en mi.
Mi rigardas vin. Vi, silenta,
nur sopiras.

Tiom da fojoj.
Tiom da jaroj.
Ĉiam la sama valso.
Kiel malfacile estas vere paroli,
kiel facile muti en la mallumo
de tiom da noktoj.

Apud ni,
nur la erarvaganta
flugo de la muŝoj.
Atendante,
en tiu senfina momento,
ke iu rompu la zumadon,
ke la ĉirkaŭo silentu,
por ke ni povu, fine,
daŭrigi la tagon.



La spuroj de mia animo – libro naskita el la koro



Erika Godó



Ĉiu poezia libro havas sian propran historion.

La spuroj de mia animo enhavas 88 poemojn, kiujn mi verkis en diversaj momentoj de mia vivo. Ili parolas pri amo, perdo, espero, soleco, memoroj kaj pri tiuj etaj momentoj, kiuj lasas profundan spuron en nia animo.

Mi elektis verki kaj publikigi ĝin en Esperanto, ĉar por mi Esperanto ne estas nur lingvo. Ĝi estas ankaŭ ponto inter homoj, kulturoj kaj animoj.

📖 La spuroj de mia animo estas aĉetebla ĉe Amazono

https://www.amazon.com/Spuroj-animo-Poemaro-Erika-Spanish/dp/1996927116/ref=tmm_pap_swatch_0



Hungara premiito en la Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay



Trad.: Erika Godó

En du kategorioj ricevis premion Miklós Cseszneky en la Kalman-Kalocsay-Literatura Konkurso 2026: li atingis la duan lokon en prozo kaj la trian lokon en poezio. La hungara rilato de la internacia literatura konkurso en Esperanto estas aparte forta pro tio, ke ĝia nomdoninto, Kalocsay Kálmán, estis unu el la plej signifaj hungaraj kreintoj de la Esperanto-literaturo de la 20-a jarcento.

La rezultoj de la Kalman-Kalocsay-Literatura Konkurso 2026 estis anoncitaj. En la internacia konkurso, organizita de Literatura Vivo, aŭtoroj verkantaj en Esperanto konkuris en la kategorioj poezio, prozo kaj tradukado.

El hungara vidpunkto la konkurso alportis aparte rimarkindan rezulton. Miklós Cseszneky troviĝis inter la premiitoj en du kategorioj: per siaj verkoj Kunveno pri poŝtelefono kaj La Verda Libreto li gajnis la duan lokon en la proza kategorio, dum per sia poemo Helikoptero super la urbo li ricevis la trian premion en la kategorio de poezio.

La du premiitaj prozaj verkoj rilatas al la Esperanto-mondo per malsamaj tonoj. Kunveno pri poŝtelefono prezentas kunvenon de loka Esperanto-klubo, kie la partoprenantoj serioze diskutas pri ŝajne eta lingva demando. La humura kaj ironia rakonto montras apartan miksaĵon de lingva purismo, komunuma idealismo kaj homa malperfekteco.

La Verda Libreto, kontraste, estas pli modera kaj elegia prozaĵo. Per renkontiĝo komenciĝanta en malnova stacidomo kaj per verda Esperanto-adresaro en la centro de la rakonto, ĝi metas en la unuan planon korespondadon, memoron kaj la ligojn inter homoj vivantaj malproksime unu de la alia.

La tria-premia Helikoptero super la urbo estas konciza poemo adresita al infano. La provizora kaj iom maltrankviliga ĉeesto de helikoptero rondiranta super la urbo kontrastas kun la pli konstantaj bildoj kaj sonoj de la ĉiutaga vivo, dum la poemo samtempe levas demandojn pri la pasemeco kaj la kontinueco de la vivo.

La unuan premion en la poezia kategorio gajnis Carmel Mallia per Verko de nekonata forfuĝintino el Libio. La duan lokon atingis CHOE Taesok per la poemo La kverko en seka ĉifono, dum Miklós Cseszney ricevis la trian premion.



En la proza kategorio la unuan premion ricevis Jorge Rafael Noguerras pro Aŭroren. Du verkoj de Cseszney Miklós okupis la duan lokon, dum la tria premio iris al la sama Noguerras pro La milito komenciĝos morgaŭ.

En la kategorio de literatura tradukado Kirilo Brosch gajnis la unuan premion per traduko el la germana de verko de Heinrich Heine. La duan lokon ricevis Batalanto pro traduko el la ĉina lingvo, dum la tria premio estis atribuita al Igor Sokolov pro Esperanto-traduko el la rusa de verko de Anton Ĉeĥov.

La ĵurio honore menciis la novelon FLOROJ POR KALMAN KALOCSAY de Elena Popova. La rekonon por juna talento ricevis Jeroubbaal Banyanga pro sia poemo Kiam la jaro endormiĝas.

Hungara nomo en la historio de la Esperanto-literaturo

La nomdoninto de la konkurso, Kalocsay Kálmán, estis unu el la plej gravaj figuroj de la hungara kaj internacia Esperanto-literaturo. Li havis gravan karieron kiel poeto, tradukisto, lingvisto kaj kuracisto, kaj jam juna li ligiĝis al Esperanto. Lia verkaro multe kontribuis al tio, ke Esperanto ne estu nur internacia helplingvo, sed ankaŭ firmiĝu kiel memstara literatura lingvo.

La nuna rezulto do havas ankaŭ simbolan signifon: en internacia konkurso nomita laŭ unu el la plej gravaj historiaj figuroj de la hungara Esperanto-literaturo denove troviĝas hungara aŭtoro inter la premiitoj — kaj eĉ en du malsamaj literaturaj ĝenroj. ♦

Fonto: [Pannon Panda](#)

Nova ĵuriano en la konkurso de Kálmán Kalocsay



Erika Godó

Kun ĝojo ni anoncas, ke **Julian Modest** aliĝis al la ĵurio de la Kálmán Kalocsay konkurso.

Julian Modest estas konata esperantista verkisto kaj literaturisto, kies nomo estas ligita al la Esperanta literaturo jam de multaj jardekoj. Li verkis kaj publikigis originalajn prozajn kaj literaturajn verkojn, kaj lia kontribuo estas valora por la Esperanta kultura vivo.

Ni estas tre ĝojaj bonvenigi lin en la ĵurio kaj dankas lin pro lia partopreno en la taksado de la verkoj.

Bonvenon, Julian Modest, kaj multan sukceson al la partoprenantoj! ♦



Foto farita de John Huang

La burĝonaĝo de fraŭlino Johana Brodi (8)

Daŭrigante la enhavon de numero 014

Verkis: Muriel Spark

Tradukis: Detlef Karthaus



Dum la lastaj kelkaj monatoj de la instruado de f-ino Brodi, ŝi faris sin adorinda. Ŝi nek donis avertojn, nek kvereletis eĉ en ekstremaj cirkonstancoj kaj iritiĝis nur pro Mary Macgregor. Tiu printempo ŝi monopoligis kun sia klaso la benkojn sub la elmo, de kie oni povis vidi senfinan avenueon de ruĝe florientaj kratagoj, kaj oni aŭdis la trotadon de ĉevaloj kune kun la ritmo de la turniĝantaj radoj de malpezaj, malplenaj ĉaroj revenantaj hejmen, per kaŝita vojo, de iliaj frumatenaj ĉirkaŭiroj. Ne malproksime, kvazaŭ antaŭsigno de la venonta jaro, grupo de knabinoj de la Progresinta Sekcio faris siajn unuajn ekzercojn pri la latina lingvo. Ilia instruistino, inspirita de la printempo kantis popolkanton por akompani la frap' frap' de la ĉevaletoj kaj la sonoron de la ĉaretoj; kaj f-ino Brodi ĝoje levis la montrofingron por indiki ke ŝiaj knabinoj ankaŭ devus aŭskulti.

Nundinarum adest dies,

La tago de la foiro estas ĉi tie,

Mulus ille nos vehet

Tiu mulo nin portos

Eie, curre, mule, mule,

Hej, kuru, mulo, mulo,

I tolutari gradu.

Mi kuros rapide.¹

En tiu printempo la patrino de Ĵenja atendis bebon; ne estis memorinda pluvo; la herbo, la suno kaj la birdoj perdis sian egoisman vintran animstaton kaj komencis pensi pri aliaĵoj; la malnova amrakonto de f-ino Brodi estis nove brodita, sub la ulmo, per strangaj fadenoj: evidentiĝis ke dum sia forpermeso de la milito, ŝia nun forpasinta fianĉo ofte invitis ŝin al velado en fiŝkapta boato kaj ke ili pasigis sian pli ĝojan tempon inter la rokoj kaj ŝtonetoj de iu malgranda haveno. 'Iufoje Hugo kantis, li havis riĉan tenoran voĉon. En aliaj okazoj li restis silenta kaj starigis sian stablon por fari pentraĵon. Li estis tre talenta pri ambaŭ artoj, sed mi opinias ke la pentristo estis la vera Hugo.'

Tio estis la unua fojo ke la knabinoj aŭdis pri la artista inklinado de Hugo. Sandra cerbumis pri tio kaj konsiliĝis kun Ĵenja, kaj ambaŭ konsentis ke f-ino Brodi kongruigis la novan amhistorion kun la malnova. Depost tiu momento la du knabinoj aŭskultis ambaŭorele, dum la ceteraj klasanoj nur per unu orelo.

Sandra estis fascinata de ĉi tiu metodo forĝi komploton per la aranĝo de faktoj kaj estis ŝirita inter sia admiro por ĉi tiu metodo kaj la urĝa bezono pruvi, ke fraŭlino Brody kulpis de miskonduto.

'Kio pri tiuj kulpigaj dokumentoj?' diris Serĝentino Anne Grey en ŝia gaja afabla maniero. Ŝi vere estis ekscitiga.

¹ En la originalo la kanto estas nur en la latina.

Sandra kaj Ĵenja finis la amkorespondadon inter f-ino Brodi kaj la muzikinstruisto je la mezo de la semestro. Ili restis kun la onklino de Ĵenja en la urbeto Crail ĉe la marbordo en la regiono Fife. La kajero vekis suspekton ĉe la onklino kaj ili prenis ĝin en aŭtobuso al najbara vilaĝo kaj sidis en la enirejo de kaverno por fini la verkadon. Estis delikata demando kiel prezenti fraŭlinon Brodi samtempe en favora kaj malfavora lumo, ĉar nun, dum la lasta semestro kun fraŭlino Brodi finiĝis, nenio malpli estis postulata.

Ke intimaĵoj okazis, tio devis esti konfirmota. Sed ne sur ordinara lito. Tio estis penso adekvata nur por malenui dum la instruhoro pri kudrado, sed f-ino Brodi meritis ion pli altrangan. Ili metis fraŭlinon Brodi sur la altan dorson de la leono de la Artura Sidejo², kun nur la ĉielo kiel tegmento kaj filikoj kiel lito. Sub ŝia rigardo la vasta parktereno ondis foren, akompanata de la ekbrilo kaj krako de fulmotondro. Estis ĉi tie ke Gordon Lowther, sinĝena, ridetanta, malgranda, kun longa torso kaj mallongaj kruroj, kun ruĝ-ora hararo kaj lipharoj trovis ŝin.

‘Prenis ŝin,’ diris Ĵenja kiam ili unue diskutis tion.

‘Prenis ŝin — nu, ne. Ŝi donis sin al li.’

‘Ŝi donis sin al li,’ diris Ĵenja, ‘kvankam ŝi volonte estus doninta sin al iu alia.’

La lasta letero de la serio, finverkita meze de la semestro, vortumis jene:

Mia ununura karega Gordon,

Via letero profunde tuŝis min, kiel vi povas imagi. Sed, ho ve, mi devas por ĉiam malakcepti vian proponon fariĝi s-ino Lowther. Mia kialo estas duobla. Mi estas dediĉita al miaj knabinoj same kiel Madame Pavlova, kaj ekzistas iu alia en mia vivo, kaj nia reciproka amo atingas regionojn ekster la limoj de tempo kaj spaco. Li estas Teddy Lloyd! Intimaĵoj kun li neniam okazis. Li estas edzo de alia. Unu tagon, en la artĉambro, ni reciproke fandiĝis en niajn brakojn kaj eksciis la veron. Sed mi estis fiero doni min al vi kiam vi venis kaj prenis min inter la filikoj sur la Artura Sidejo, dum la tempesto

ŝtormis ĉirkaŭ ni. Se rezulte mi troviĝus en certa stato, mi certigos ke la infano estos prizorgita de inda ŝafisto kaj lia edzino, kaj ni povos tion kviete diskuti kiel platonaj konatuloj. Mi permesos al mi miskonduti kun vi de tempo al tempo por malfrustriĝi, ĉar mi estas en mia burĝonaĝo. Ni povas ankaŭ kune ĝui ventetajn tagojn en la fiŝkapta boato sur la maro.

Mi deziras informi vin ke via mastrumistino plenigas min per angoro kiel John Knox³. Mi timas ke ŝi estas tre malgrandanima, kio rezultas de nescio pri kulturo kaj la itala vivmaniero. Bonvolu peti ŝin ne diri: ‘Vi konas la vojon supren,’ kiam mi vizitas vin ĉe via domo ĉe Cramond. Ŝi devus konduki min supren kaj enirigi min. Ŝiaj genuoj ne estas rigidaj. Ŝi nur ŝajnigas tion. Mi amas aŭdi vin kanti ‘Hey Johnnie Cope.’ Sed se mi morgaŭ ricevos edziĝproponon de Lord Lyon King of Arms⁴ mi malakceptus ĝin.

2 Artura Sidejo (angle: Arthur's Seat) estas la plej alta pinto de tri montetoj en Edinburgo, kiuj aspektas kiel kuŝanta leono.

3 John Knox 1510-1572, skota pastro, reformisto kaj fondinto de la presbiteranisma eklezio.

4 Alta moŝtulo en la skota registaro, kiu respondecas interalie pri ŝtatceremonioj.

Permesu al mi, konklude, kore gratuli vin pro via seksumado kaj ankaŭ pro via kantado.

Kun tenera ĝojo,

Johana Brodi.

Finskribinte ĉi tiun leteron, ili tralegis la tutan korespondadon de la komenco ĝis la fino. Ili ne decidiĝis tiam ĉu ĵeti ĉi tiun kulpigan dokumenton en la maron aŭ enterigi ĝin. Ĵeti aĵojn de la landlimo for en la maron estis, kiel ili sciis, pli malfacile ol oni pensas. Sed Sandra trovis duone kaŝitan humidan truon apud ŝtono en la malantaŭo de la kaverno en kiu ili ŝtopis la kajeron kun la amkorespondado de f-ino Johana Brodi kaj ili neniam plu vidis ĝin. Plenaj je freŝaj planoj kaj tenera ĝojo, ili marŝis sur la torfa tapiŝo returne al Crail.

ĈAPITRO 4

‘Mi havas sufiĉe da pulvo en tiu kruĉo por eksplodigi ĉi tiun lernejon,’ diris f-ino Lockhart senemocie.

Portante sian blankan linajan kitelon, ŝi staris malantaŭ sia labortablo kun ambaŭ manoj sur vitra kruĉo, kiu estis tri-kvarone plena de griza pulvo. La subita silento kiu ekregis estis ekzakte kion ŝi atendis, ĉar ŝi ĉiam komencis la unuan sciencan klason per ĉi tiuj vortoj kaj kun la pulvo antaŭ ŝi, kaj la unua scienca leciono tute ne estis leciono, sed nomado de la plej imponaj objektoj en la sciencoĉambro. Ĉiu okulo estis fokusita sur la kruĉo. Fraŭlino Lockhart levis ĝin kaj zorge metis ĝin en ŝrankon, kiu estis plena de similaj kruĉoj plenaj de diverskoloraj kristaloj kaj pulvoroj.

‘Ĉi tiuj estas bruliloj de Bunsen, tiu estas provtubo, ĉi tiu estas pipeto, tio estas bureto, tio estas retorto, jen krisolo aŭ fandvazo ...’

Tiel ŝi establis sian misteran pastrinecon. Ŝi estis absolute la plej afabla instruisto en la Progresinta Sekcio. Sed ili ĉiuj estis la absolute plej afablaj instruistoj. Tio estis tute nova vivo, preskaŭ nova lernejo. Ĉi tie ne ekzistis magraj instruistinoj kiel f-ino Gaunt, tiaj kiaj orgojle preteriris fraŭlinon Brodi en la koridoro dirante ‘bonan matenon’ kun antaŭjuĝema rideto. La instruistoj ĉi tie ŝajnis ne okupiĝi pri ies personeco, nur pri ties fako, ĉu matematiko, Latino, aŭ scienco. Ili traktis la novulojn kvazaŭ ili ne estus realaj, sed nur simboloj de algebro kaj la lernantoj de f-ino Brodi trovis tion freŝigan. Ankaŭ mirinde, dum la unua semajno, estis la instruprogramo de brilaj, novaj studobjektoj, kaj la hastado tien kaj reen de ĉambro al ĉambro por teni sin al la horaro. Iliaj tagoj estis nun plenaj de malfamiliaraj formoj kaj sonoj, kiuj estis magie malligitaj de la ordinara vivo, la grandaj cirkloj kaj trianguloj de geometrio, la hieroglifoj de la greka alfabeto, kaj la strangaj siblaj kaj kraĉaj sonoj kiuj venis el la lipoj de la instruistino — “psi ... ksi...”

Post nur kelkaj semajnoj, kiam signifoj aperis el tiuj simboloj kaj sonoj, estis malfacile memori la ludecan etoson de tiu unua semajno, kaj ke la greka iam sonis sibla kaj kraĉa, aŭ ke ‘*mensarum*’ sonis kiel vorto el sensenca rimajo. La moderna branĉo, ĝis la tria klaso, malsamis de la klasika nur per modernaj aŭ klasikaj lingvoj. La knabinoj en la moderna branĉo studis la germanan kaj hispanan, kaj kiam ili ekzercis sin pri tiuj lingvoj inter la instruhoroj, ili kreis la mirindan bruon kiun oni aŭdas preterpasante fremdajn kanalojn en radioaparato. Iu *Mademoiselle*⁵ kun nigra krispa

⁵ *Mademoiselle* - (france) fraŭlino; en Britio instruistino aŭ vartistino kies denaska lingvo estis la franca.

hararo, kiu portis striitan ĉemizon kun veraj manumbutonoj, prononcis la francan kun tia fremdlanda akĉento, kia ne estis imitebla. La sciencoĉambro havis la variantan odoron de la Kanonpordego je tiu tago de la vintra promeno kun f-ino Brodi; la vaporeto de la bruligiloj Bunsen miksiĝis kun la dolĉa aŭtuna fumo kiu enŝvebis de la unuaj bruligitaj folioj. Ĉi tie en la sciencoĉambro — strikte ne nomata la laboratorio — lecionoj estis nomataj eksperimentoj, kio donis al ĉiuj la senton ke eĉ f-ino Lockhart ne sciis kio povus rezulti, kaj io ajn povus okazi inter ilia alveno kaj eliro inkluzive la eksplodigo de la tuta lernejo.

Dum la unua semajno oni faris eksperimenton kun magnezio en provtubo, kiu tuŝetis la flamon de la brulilo de Bunsen. Fine, el diversaj partoj de la ĉambro blankaj magneziaj flamegoj pafiĝis el la provtuboj kaj estis kaptitaj en pli grandaj vitraj ujoj, kiuj estis preparitaj tiucele. Mary Macgregor timiĝis kaj ekkuris laŭ mallarĝa vojo inter du labortabloj, renkontis blankan flamon, kuris reen kaj renkontis alian brilan langon de fajro. Tien kaj reen ŝi panike kuris inter la labortabloj ĝis oni kaptis kaj trankviligis ŝin. Kaj ŝi estis admonita ne kondukti tiel stulte de f-ino Lockhart, kiu jam spertis la agacan efikon de la vizaĝo de Mary kun ĝiaj du okuloj, nazo, kaj buŝo; nenio plu direndas.

Iam, en postaj jaroj, kiam Sandra ricevis viziton de Roza Stanley kaj la konversacio turnis sin al la mortinta Mary Macgregor, Sandra diris:

‘Ĉiam kiam malbonaĝo okazas al mi, mi deziras ke mi estintus pli afabla al Mary.’

‘Kiel ni povus scii?’ diris Roza.

Kaj f-ino Brodi, sidanta ĉe la fenestro de la hotelo *Braid Hills* kun Sandra, diris:

‘Mi scivolas ĉu estis Mary Macgregor kiu perfidis min? Eble mi estintus pli afabla al Mary.’

La Brodiaro povus facile perdi sian identecon en tiu tempo, ne nur ĉar f-ino Brodi ĉesis prezidi la grupon, sed ankaŭ pro tio ke la akiro de scio pere de seninspiraj ekspertoj tute plenigis tiujn tagojn, kaj aldone ĉar la direktorino intencis ke ili disiĝu.

Ŝi planis intrigon, sed ĝi malsukcesis. La plano estis tro ambicia; ĝi celis forigon el la lernejo de f-ino Brodi kaj disiĝi la Brodiaron en unu sola frapo.

Ŝi kultivis amikecon kun Mary Macgregor, pensante ke estus facile trompi kaj subaĉeti ŝin, sed ŝi subtaksis ŝian stultecon. Ŝi memoris ke Mary, kiel ĉiuj knabinoj de f-ino Brodi, petis akcepton al la klasika branĉo, sed estis rifuzita. Nun f-ino Mackay ŝanĝis sian opinion kaj permesis al ŝi studi almenaŭ Latinon. Rekompence ŝi esperis ricevi informojn pri f-ino Brodi. Sed pro tio ke la ununura kialo ke Mary volis studi Latinon estis por plaĉi al f-ino Brodi, la plano de la direktorino fiaskis. Ne gravis kiom ofte ŝi invitis la knabinon al tetrinkado, Mary simple rifuzis kompreni kion oni atendis de ŝi, kaj ŝi pensis ke ĉiuj intruistoj estas ligitaj per komuna celo, f-ino Brodi kaj ĉiuj.

‘Vi ne vidos multe de f-ino Brodi,’ diris f-ino Mackay, ‘nun ke vi estas en la Progresinta Sekcio.’

‘Mi ankaŭ kredas tion,’ diris Mary, komprenante la rimarkon kiel dekreton anstataŭ enketon.

Fraŭlino Mackay provis alian ruzaĵon kaj tiu plano ankaŭ malsukcesis. En la Progresinta Sekcio, dividitaj en kvar domoj nomitaj Holyrood, Melrose, Argyll kaj Biggar, regis vigla konkurenco. Fraŭlino Mackay certigis ke la Brodi-knabinoj laŭeble lokiĝis malkune en malsamaj domoj;

Ĵenja estis en Holyrood, Sandra kun Mary Macgregor en Melrose, Monika kaj Eŭnike iris al Argyll kaj Roza Stanley al Biggar. Ili estis tial devigitaj konkurenci unu kun la aliaj en ĉia aspekto de sia vivo interne de la lernejo kaj sur la ventblovataj hokeokampoj, kiuj troviĝis en antaŭurbo elmetitaj al la vetero kiel la tomboj de martiroj. Estis la teama spirito, kiu gravis nun, oni diris al ili, kaj ĉiu domo devas klopodi por gajni la blazonŝildon kaj ĉeesti sabatmatene por voĉigi kuraĝigajn kriojn al la domo. Interdomaj amikecoj devas ne suferi, kompreneble, sed la teama spirito...

Ĉi tiu frazo sufiĉis por la Brodiaro, kiu post du jaroj sub la gvido de f-ino Brodi estis bone informita pri ĝia signifo.

‘Frazoj kiel “teama spirito” estas ĉiam uzataj por detrui individuecon, amon kaj personan lojalecon,’ ŝi diradis. ‘Ideoj kiel “teama spirito” ne devas esti altruditaj al la ina sekso, aparte se ili estas dediĉemulinoj kies virtoj ekde la pratempo tute kontraŭis tiun koncepton. Florence Nightingale⁶ sciis nenion pri teama spirito; ŝia alvokiĝo estis savi vivon sendepende de la teamo al kiu ĝi apartenis.

Kleopatro sciis nenion pri teama spirito se vi legis vian Ŝekspiron. Prenu Helena de Trojo. Kaj la Reĝino de Anglujo⁷; – estas vere ke ŝi ĉeestas internaciajn sporteventojn, sed tio estas ŝia devo, kaj nur sensignifa spektaklo; ŝi vere zorgas nur pri la sano de la reĝo kaj pri antikvaĵoj⁸. Kiel Sybil Thorndike estus profitinta de teama spirito? Ŝi estas la elstare granda aktorino, kaj nur la cetera aktorado havas la teaman spiriton. Pavlova...’

Eble f-ino Brodi antaŭvidis ĉi tiun estontan momenton, kiam ŝia teamo de ses devis alfronti kvar diversajn konkurencantajn spiritojn, Argyll, Melrose, Biggar kaj Holyrood. Ne eblis scii kiom f-ino Brodi konscie planis, kaj ĝis kiu punkto ŝi fidis nur instinkton. Tamen en ĉi tiu afero, ŝia unua fortoprovo, ŝi atingis la venkon. Eĉ ne unu el la dom-reprezentantoj havis la personecon kiu nuligus la sendependecon de iu Sybil Thorndike kaj Kleopatro. Por la Brodiaro aliĝi al la skoltinoj aŭ subiĝi al la teama spirito, tio estis frako kiel jako. Ne nur ili, sed almenaŭ dek aliaj knabinoj kiuj pasis tra la manoj de f-ino Brodi, restis for de la ludkampoj krom sub devigo. Neniu, krom Eŭnike Gardiner, estis akceptita en ajna teamo por ekzerci sian teamspiriton. Ĉiuj konsentis ke Eŭnike estis tiel bona sur la ludkampoj ke ŝia partopreno estis pardonebla.

Je la plej multaj sabataj posttagmezoj f-ino Brodi gastigis sian malnovan aron per temanĝo aŭskultante pri iliaj novaj spertoj. Ŝi mem, kiel ŝi rakontis, ne havis altan opinion pri la eduka potencialo de siaj novaj lernantoj, kaj ŝi priskribis iujn el la novaj knabinetoj, kio ridigis la malnovajn; tio kunligis la aron pli ol iam ajn, kaj sentigis ilin esti elektitaj. Kompreneble ŝi baldaŭ demandis kion ili faris en la artklaso, ĉar nun la knabinoj estis instruataj de la orbukla, unubraka Teddy Lloyd.

Ĉiam estis multe rakontinda pri la artlecioj. Je la unua tago estis malfacile al s-ro Lloyd meti ordon en la klasĉambro. Post tiom da malfamiliaraj, streĉaj instruhoroj pri diversaj sciencaj fakoj, la knabinoj tuj sentis la malstreĉan naturon de la artĉambro, kaj ili troigis sian malstreĉadon. s-ro Lloyd, per raŭka voĉo kriis al ili fermi la faŭkon. Tio vigligis ilin eĉ pli.

Li provis klarigi la naturon kaj aspekton de elipso tenante subtason en sia rekta mano, alte super la kapo, kaj poste pli malalte. Sed lia romantika sinteno kaj lia raŭka "Fermu la faŭkon" kreis reagon de multvoĉa subridado per diversaj voĉnuancoj.

6 Florence Nightingale (1820-1910) — brita flegistino kies plej konata kontribuo okazis dum la Krimea Milito.

7 Queen Mary, ankaŭ nomata Mary of Teck, estis la reĝedzino de Georgo la 5a.

8 Estas konate ke homoj kaŝis siajn antikvaĵojn antaŭ reĝina vizito por ne esti devigitaj donaci ilin al ŝi.

‘Se vi knabinoj ne fermos la faŭkon, mi frakastos tiun subtason sur la plankon,’ li diris. Ili penis sed ne povis silenti.

Li frakasis la subtason sur la plankon.

Dum la tuja silento kiu sekvis li elektis Roza Stanley kaj indikante la subtasajn pecetojn sur la planko, li diris, ‘Vi kun la profilo — kolektu tion.’

Li turnis sin kaj dum la resto de la instruhoro li faris ion alian ĉe la alia flanko de la longa ĉambro, dum la knabinoj rigardis la profilo de Roza Stanley kvazaŭ por la unua fojo; ili miris pri la stilo de s-ro Lloyd, kaj finfine komencis desegni botelon kiu staris antaŭ kurteno. Ĵenja menciis al Sandra ke fraŭlino Brodi vere havas bonan guston.

‘Li havas artistan temperamenton, kompreneble,’ diris f-ino Brodi kiam oni rakontis al ŝi pri la subtasoj. Kaj kiam ŝi aŭdis ke li nomis Roza ‘vi kun la profilo,’ ŝi rigardis al Roza en speciala maniero, dum Sandra rigardis al f-ino Brodi. La intereso de Sandra kaj Ĵenja pri la amantoj de f-ino Brodi eniris novan fazon ekde kiam ili enterigis sian lastan redaktaĵon kaj antaŭeniĝis al la Progresinta Lernejo. Ili ne plu vidis ĉion en seksa kunteksto; nun ili celis la esploradon de la profunda kerno de la koro. La mondo de pura sekso ŝajnis nun aparteni al foraj pasintaj jaroj. Ĵenja ĵus fariĝis dekdujaraĝa. Ŝia patrino, antaŭnelonge, naskis knabon, kaj tiu evento ne incitis ilin eĉ cerbumi pri la origino de la bebo.

‘Ne estas multe da tempo por seks-esplorado en la Progresinta Lernejo,’ diris Sandra. ‘Mi sentas ke mi superis tion,’ diris Ĵenja. Tio estis strange vera, kaj ŝi ne refoje spertis sian fruan senson de erotika miro pri la vivo ĝis subite, unu tagon kiam ŝi estis preskaŭ kvardekjaraĝa, kaj estis aktorino kun modera reputacio kaj edzino de teatra administranto. Hazarde ŝi staris apud viro, kiun ŝi ne tre bone konis, ekster fama konstruaĵo en Romo, atendante ke la pluvo ĉesu. Ŝi estis surprizita pro la revekiĝo de tiu sama ĝojige senzorga malkovro de sekso, tiu plena sensaĵo pri kiu ne direblis ĉu ĝi estis fizika aŭ mensa, sed nur ke ĝi enhavis la naivan delicon de ŝia deknua jaro. Ŝi supozis ke ŝi enamiĝis kun tiu viro, kiu eble, laŭ ŝia penso, estis kondukita al ŝi el sia propra mondo kies asocioj restis al ŝi plejparte nekonataj. Nenio estis decidenda pri tio, ĉar Ĵenja estis kontenta edzino dum la lastaj dek ses jaroj, sed tiu mallonga okazintaĵo plenumis ŝin per miro kiam ajn ŝi pensis pri ĝi en postaj tagoj, kaj ŝi sentis la kaŝitajn eblecojn en ĉiuj aferoj.

‘La mastrumistino de s-ro Lowther,’ diris f-ino Brodi iun sabatposttagmezon, ‘estas forlasinta lin. Tio estas pleje nedankema, ĉar estas facile mastrumi tiun domon ĉe Cramond. Mi neniam ŝatis ŝin, kiel vi scias. Mi pensas ke ŝi indignis kontraŭ mia pozicio kiel amikino kaj konfidenculino de s-ro Lowther, kaj ŝi ŝajnis malkontenta pri miaj vizitoj. S-ro Lowther nun komponas kelkajn kantojn. Oni devus kuraĝigi lin.’

La venontan sabaton ŝi diris al la knabinoj ke la kudrantaj fratinoj, f-ino Ellen kaj f-ino Alison Kerr, alprenis la intertempan taskon de mastrumado ĉe s-ro Lowther, ĉar ili loĝis proksime al Cramond.

‘Mi kredas ke tiuj fratinoj estas tre scivolemaj,’ f-ino Brodi rimarkis. ‘Ili estas tro kunligitaj al f-ino Gaunt kaj la Eklezio de Skotlando.’

Sabatposttagmeze unu horo estis dediĉita al ŝiaj lecionoj de la greka, ĉar ŝi insistis ke Ĵenja kaj Sandra instruu la grekan al ŝi dum ili mem estis lernantaj ĝin. ‘Ekzistas malnova tradicio por ĉi tiu uzanco,’ diris f-ino Brodi. ‘Multaj familioj en antikvaj tempoj havis la rimedojn por sendi nur unu infanon al la lernejo, post kio tiu sola instruitulo de la familio devis vespere komuniki al la aliaj, kion li estis lerninta en la mateno. Mi jam delonge volis scipovi la grekan lingvon, kaj ĉi tiu aranĝo ankaŭ utilis al vi encerbigi tiun scion. John Stuart Mill kutimis leviĝi je la matena krepusko por lerni la grekan, je la aĝo de kvin jaroj, kaj kion John Stuart Mill povis fari kiel infano je la krepusko, mi ankaŭ povas fari sabatposttagmeze dum mia burĝonaĝo.’

Ŝi progresis en la greka, kvankam ŝi estis iomete konfuzita pri la supersignoj, pro tio ke ŝi ricevis malsamajn informojn de Ĵenja kaj Sandra, kiuj laŭvice transdonis al ŝi sian tiusemajnan lernitaĵon de la lingvo. Sed ŝi estis determinita partopreni en la nova vivo de siaj specialaj lernantoj, kaj kion ŝi ne taksis humana el iliaj novaj interesoj, aŭ kio estis ekster ŝia influkapablo, ŝi simple malestimis.

Ŝi diris: ‘Estas tre sprita diri ke rekta linio estas la plej mallonga distanco inter du punktoj, aŭ ke cirklo estas kurbo, konsistanta el ĉiuj punktoj en ebena kun fiksa distanco al donita punkto nomata la centro de la cirklo. Tio estas simple sprita. Ĉiu scias kio estas rekta linio kaj kio estas cirklo.’

Kiam, post la ekzamenoj en la fino de la unua semestro, ŝi rigardis la ekzamenajn demandojn, ŝi laŭtleĝis kelkajn el la pli kritikeblaj demandoj kun la plej granda malestimo. ‘Fenestropurigisto portas ŝtupetaron de normala proporcio, kiu pezas 60 funtojn kaj longas je 15 futoj. Je unu ekstremo pendas sitelo de akvo pezanta 40 funtojn. Ĉe kiu punkto li devas subteni la ŝtupetaron por porti ĝin horizontale? Kie troviĝas la masocentro de ĉi tiu ŝarĝo?’ f-ino Brodi, leginte la demandon, rigardis la folion kvazaŭ indiki ke ŝi ne povas fidi siajn okulojn. Multfoje ŝi komprenigis al la knabinoj ke la solvo de tiaj problemoj estus tute senutila al Sybil Thorndike, Anna Pavlova kaj la forpasinta Helena de Trojo.

Sed la Brodiaro ankoraŭ plimalpli entuziasmiĝis pri siaj novaj fakoj. En postaj jaroj, kiam la lingvo de fiziko kaj kemio, de algebro kaj geometrio estis perdinta sian elementan strangecon, la afero ne plu estis tiel alloga kiel en la komenco; ĉiu fako entenis apartan vivokampon, ĉiu kun siaj propra tedaĵo kaj fariĝis streĉa laboro. Eĉ Monika Douglas, kiu poste evoluigis tiel bonan cerbon por matematiko, neniam plu spertis la saman memplaĉon kiel antaŭe kiam ŝi unue subtrahis x de y kaj la rezulton de a . Ŝi poste neniam aspektis tiel feliĉa.

Roza Stanley tranĉis vermon tra la centro kun la plej granda mensa koncentriĝo dum ŝia unua semestro en biologio, kvankam post du semestroj tiu penso tremetigis ŝin kaj ŝi retiriĝis de tiu fako. Eŭnike Gardiner malkovris la industrian revolucion, ĝiaj fortoj kaj febloj, tiel ke la instruisto pri historio, vegetarana komunisto, havis altajn esperojn por ŝi, esperoj kiuj frakasiĝis ene de kelkaj monatoj kiam Eŭnike regresis al legado de romanoj bazitaj sur la vivo de Maria 1-a de Skotlando, kies kaligrafio estis malbona kaj kiu pasigis horojn desegni belvice grekajn literojn en ŝiaj kajeroj dum Ĵenja same fieris pri siaj desegnoj de sciencaj aparatoj por siaj kemiaj notoj. Eĉ la stulta Mary Macgregor surprizis sin mem per kompreno de la Gaŭla Milito de Cezaro, kio nenion postulis de ŝia difektita imagopovo, kaj kies vortoj estis al ŝi pli facile ol la angla, rilate ortografion kaj prononcon, ĝis subite unu tagon, evidentiĝis de eseo kiun ŝi devis verki, ke ŝi kredis ke la dokumentoj datiĝis de la tempo de Samuel Pepys, kaj tiam oni malpravigis Mary refoje kiam ŝi estis torturita per profundaj demandoj, kiuj kondukis ŝin al konfeso, antaŭ mokanta mondo, de ŝia kredo, ke la latina kaj stenografio estas la sama afero.



Fraŭlino Brodi devis konduki malfacilan batalon dum la unuaj monatoj kiam la Progresinta Lernejo kaptis ŝian aron, kiu montris kapablan entuziasmon, kiun ŝi mem estis plantinta. Sed venkinte la batalon kontraŭ la teamspirito, ŝi ne malesperis. Jam evidentiĝis eĉ tiam, ke ŝi ĉefe zorgis ke la knabinoj ne havu personajn ligojn al ajna instruisto en la Progresinta sekcio, sed ŝi singarde retenis sin de rektaj atakoj, ĉar tiuj instruistoj ŝajnis tute indiferentaj al ŝia idaro.

Kiam alvenis la somera semestro, la plej ŝatataj horoj de la knabinoj estis tiuj sencerbe pasigitaj en la gimnastikejo, svingante sur paralelstangoj, pendante kapmalsupre sur spalieroj aŭ grimpante ŝnuregojn ĝis la plafono, ĉiuj en konkurenco kun la movlerta Eŭnike, por levi sin pli alten per manoj, genuoj kaj piedoj kiel simioj grimpas sur tropika liano, dum la gimnastika instruistino, malgranda, griza, kaj maldika kiel drato montris al ili kion fari kaj kriis la ordonojn per skota akĉento, interrompitaj de mallonga tuso, pro kio oni poste sendis ŝin al sanatorio en Svislando. ♦

daŭrigota

Vento orienta - Vento okcidenta (15)



Pearl S. Buck



Detlef Karthaus

ĈAPITRO 18 · Daŭrigante la enhavon de numero 014

Pearl S. Buck · elangligis Detlef Karthaus

Kaj nun Fratinjo, okazis tio, kion ni ne deziris; ŝi gravediĝis! Ŝi jam sciis dum tuta ciklo da tagoj antaŭ ol – pro stranga fremda diskretemo – ŝi diris ion eĉ al mia frato, kiu ĵus diris tion al mi.

Tio ne estas afero kiu ĝojigos nin, kaj mia patrino, aŭdante pri tio, devis kuŝiĝi, kaj ŝi ne povas ellitiĝi pro aflikto. Tio estas kion ŝi antaŭvidis kaj timis, kaj ŝia febla korpo ne povas kontraŭstari la forton de ŝia seniluziigo. Vi scias kiel ŝi deziris la unuenaskiton de mia frato, por la familio. Kaj nun kiam tio neniam okazos, ŝi opinias ke ĉiuj virtoj forlasis lin, kaj ĉio vanas, ĉar ŝi neniam povos akcepti tiun infanon kiel sian nepon.

Mi tiam iris al mia patrino kaj trovis ŝin kuŝanta rekte kaj senmove sur la lito. Ŝiaj okuloj estis fermitaj, kaj ŝi malfermis ilin nur sufiĉe por rekoni min kaj poste refermis ilin denove. Mi sidiĝis trankvile apud ŝi kaj atendis silente. Subite ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis, kiel okazis iam antaŭe; ĝi morte paliĝis alprenante la koloron de cindroj, kaj ŝi komencis malfacile spiri.

Mi timiĝis, kaj klakis la manojn por venigi sklavon, kaj Ŭang Da Ma mem enkuris kun pipo de opio jam ekbruligita kaj fumanta. Mia patrino tuj ekprenis kaj urĝe suĉis ĝin, kaj la doloro estis mildigita.

Sed kiam mi vidis tion, mia animo maltrankviliĝis. Evidente la doloro estis kutima, ĉar la opiopipo estis ĉiam preparita kaj la lampo ĉiam brulanta. Sed kiam mi volis paroli pri tio, mia patrino malpermesis tion, akre dirante:

“Estas nenio. Ne ĝenu min.”

Ŝi ne volis diri pli, kaj post kiam mi restis iom da tempo apud ŝi, mi riverencis kaj foriris. Kiam mi trapasis la korton de la servistoj mi demandis Ŭang Da Ma pri mia patrino kaj ŝi skuis la kapon.

“La Unua Sinjorino suferas tiel ĉiutage kaj pli ofte ol la fingroj de ambaŭ miaj manoj. La doloro okazis de tempo al tempo dum multaj jaroj, tamen, kiel vi scias, ŝi neniam parolas pri siaj propraj aferoj.

Sed sub la ĉagrenoj de ĉi tiu jaro, la doloro fariĝis konstanta. Mi estas ĉiam proksime al ŝi, kaj mi vidas la grizon trapasi ŝian vizaĝon. Mi vidas ŝian vizaĝon rompitan pro doloro je la matena krepusko kiam mi envenas kun la teo. Sed ia espero subtenis ŝin lastatempe ĝis antaŭ kelkaj tagoj. Nun ŝi estas kiel falinta arbo kies radikoj estis fortranĉitaj.”

Ŝi levis la angulon de sia blua antaŭtuko kaj viŝis ĉiun okulon laŭvice kaj suspiris.

Ho, mi scias pri tiu espero kiu subtenis mian patrinon! Mi nenion diris, sed reiris hejmen, kaj ploris, kaj mi rakontis ĉion al mia edzo. Mi petegis lin iri kun mi por viziti ŝin, sed li konsilis al mi atendi. Li diras al mi:

“Se oni trudas ion al ŝi aŭ kolerigas ŝin, ŝi fartos pli malbone. Kiam venos oportuna tempo, petegu ŝin konsulti kuraciston. Plian respondecon vi ne havas pri pli aĝa familiano.

Mi scias, ke li ĉiam pravas. Sed mi ne kapablas preteratenti mian antaŭsenton de alvenonta malbono.

Ŝajne mia patro estas kontenta, ke la fremdulino naskos bebon. Li ploris kiam li aŭdis pri tio.

“Ah-ha! Nun ni havas fremduleton kun kiu ni povas ludi! Haj-ja! Nova ludilo, certe! Ni nomos lin Klaŭneto, kaj li amuzos nin!”

Mia frato grumblis pri tiuj vortoj. En sia koro li ekmalamas nian patron. Mi povas vidi tion.

Rilate la fremdulinon, ŝi ne plu mornas. Kiam mi vizitis ŝin por gratuli ŝin, ŝi kantis strangan, fremdan, malmildan melodion. Kiam mi demandis pri ĝia signifo, ŝi diris ke estis kanto por dormigi infanon. Mi miris, ke iu infano povus ripozi aŭdante tion. Ŝi ŝajne forgesis la tagon, kiam ŝi rivelis al mi sian malfeliĉon. Ŝi kaj mia frato renovigis ilian amon, kaj ŝia menso okupiĝas pri nenio alia, nun ke la infano venos.

En mia koro, mi avidas vidi tiun fremdan infanon. Li ne povas esti bela kiel mia filo belas. Ĝi eĉ povas esti knabino, kaj eble ŝi havos la fajre flavajn harojn de sia patrino. Ho, mia kompatinda frato!

Li malfeliĉas, mia frato! Nun ke infano naskiĝontas, li des pli avide celas klarigi la laŭleĝan pozicion de sia edzino. Li aludas la aferon tagtage al nia patro, sed nia patro evitas respondon per rideto, kaj malurĝa parolado pri aliaj temoj.

Mia frato diras, ke je la venonta festotago li intencas prezenti la aferon antaŭ la parencaro, eĉ en la praula halo antaŭ la sanktigitaĵoj de la prauloj, tiel ke la infano naskiĝos kiel lia laŭleĝa plej aĝa filo. Kompreneble se estus knabino, tio ne gravus. Sed ni ne povas antaŭvidi la estontecon.

Nun estas la dekunua monato de la jaro. Surtere kuŝas neĝo, kiu ankaŭ pezigas la bambuojn en la ĝardeno, tiel ke ili aspektas kiel ŝaŭmanta maro de blankaj ondoj, kiam la vento milde movas ilin. La edzino de mia frato pligrandiĝas pro la gravedeco. Ĉe la domo de mia patrino pezas la etoso de atendado. Kio okazos?, mi demandas min ĉiutage.

Ĉi-matene kiam mi ellitiĝis, mi vidis la arbojn nudajn kaj nigrajn kontraŭ griza kaj vintra ĉielo. Mi vekiĝis subite kaj timplena kvazaŭ pro koŝmaro, tamen kiam mi ekzamenis mian memoron, mi sonĝis pri nenio. Kio estas la signifo de nia vivo? Ĝi estas en la manoj de la dioj, kaj ni konas nenion krom timo.

Mi provis malkovri kial mi timas. Ĉu pro mia filo? Sed li estas forta kiel juna leono. Li nun parolas kiel reĝo donante ordonojn al la mondo. Nur lia patro aŭdacas malobei lin ridante. Rilate min, mi estas lia sklavo kaj li scias tion. Li scias ĉion, la fripono! Ne, mia timo ne estas pro mia filo.

Sed kiel ajn mi rezonas pri la afero, mi ne povas flankenmeti mian maltrankvilecon, mian instinkton pri malbono, kiu estas falonta el la ĉielo. Mi atendas, ke la dioj proklamos tion. Mi certas pri ilia malbona celo. Ĉu malgraŭ ĉio ili volas atenci mian filon? Mi ankoraŭ duon-timas pro la forĵeto de la ringo.

Lia patro ridas. Estas vere, ke la infano estas sana de kapo al piedoj. Lia manĝemo estas tiel granda ke ĝi mirigas min. Li forpuŝas mian mamon, kaj nun postulas rizon kaj manĝbastonetojn trifoje tage. Mi demamigis lin, kaj li estas viro. Ah ne, neniu infano estas tiel forta kiel mia filo!

Mia patrino pli kaj pli febliĝas. Mi deziras, ke mia patro ne estu foririnta. Kiam mia frato fariĝis insistema pri sia edzino, mia patro trovis negocon en Tjanĝino, kaj li estis for dum multaj monatoj. Sed nun kiam malbono pendas super lia domo li devus reveni. Kvankam li ĉiam zorgis nur pri sia propra plezuro, li devus memori ke li estas la reprezentanto de sia familio antaŭ la ĉielo.

Tamen mi ne aŭdacas skribi al li, mi, kiu estas nur virino kaj plena je virinaj timoj. Eble estas nur fantazio. Sed se estas nur fantazio kial mi havas tiun neforigeblan antaŭsenton tagon post tago?

Mi prenis incenson kaj sekrete bruligis ĝin antaŭ Gŭanjin, dum mi antaŭtimis la ridon de mia edzo. Sen okazonta malfeliĉo oni ja povas ne kredi je dioj. Sed kiam ĉagreno alproksimiĝas al domo, kiun ni povas alvoki? Mi preĝis al ŝi antaŭ ol naski mian filon kaj ŝi aŭdis min.

Hodiaŭ komenciĝas la dekdua monato. Mia patrino senmove kuŝas sur sia lito kaj mi komencas timi ke ŝi neniam forlasos ĝin. Mi jam petegis ŝin voki kuraciston, kaj finfine, lacigite de miaj petoj, ŝi konsentis. Ŝi invitis Chang, tiun famkonatan kuraciston kaj astrologon prizorgi ŝin. Ŝi pagis al li kvardek uncojn da arĝento, kaj li promesis ke ŝi resaniĝos. Mi konsoliĝis aŭdinte tiujn vortojn, ĉar ĉiu scias ke li estas saĝa.

Sed mi scivolas kiam la horo de mildigo komenciĝos. Ŝi nun senĉese fumas la opian pipon por mildigi la doloron en la internaĵoj, kaj ŝi estas tro dormema por paroli. Ŝia vizaĝo estas pale flava kaj la haŭto estas streĉita sur la ostoj, tiel ke kiam vi palpas ĝin, vi sentas ke ĝi estas seka kaj minca kiel papero.

Mi petegis ŝin konsulti mian edzon por provi la Okcidentan medicinon, sed ŝi rifuzas. Ŝi grumbas ke ŝi estis juna kaj nun maljunas, sed ŝi neniam suferos la kutimojn de la barbaroj. Rilate mian edzon, li skuas la kapon kiam mi parolas al li pri mia patrino. Mi vidas ke li pensas, ke ŝi baldaŭ paŝos sur la Terason de Nokto.

Ho mia patrino, mia patrino!

Mia frato diras nenion de mateno ĝis vespero. Li sentas rankoron. Li sidas en sia propra apartamento, kaj per sulkigita frunto rigardas antaŭ si, kaj tiu animstato ŝanĝiĝas nur dum tiu momento kiam li esprimas senbridan tenerecon al sia edzino. Kune ili eniris propran ekziston, propran mondon, kie ili loĝas solaj kun la naskiĝonta infano.

Li teksigis ŝirmilon el bambuo por kovri la lun-pordegon, tiel ke la nenionfarantaj virinoj ne plu povas gapi al ŝi.

Kiam mi parolas al li pri nia patrino, li estas surda. Li ripetadas kiel kolera infano:

“Mi neniam povos pardoni ŝin, mi neniam povos pardoni ŝin!”

En lia vivo nenio estis iam rifuzita al li, kaj nun li ne povas pardoni sian patrino!

Semajnon post semajno, li ne vizitis ŝin. Sed hieraŭ li emociiĝis iomete pro miaj timoj kaj petegoj, kaj li akompanis min kaj staris apud ŝia lito. Li staris obstine silenta, kaj rifuzis ŝin saluti. Li rigardis ŝin kaj ŝi malfermis la okulojn kaj senvorte fiksrigardis lin. Sed kiam ni kune retiriĝis el la ĉambro, kvankam li ne volis paroli pri ŝi eĉ al mi, mi povis vidi ke la aspekto de ŝia malsana vizaĝo emociigis lin. Antaŭe li suspektis ke ŝi restis en sia propra ĉambro, pro ia amara firmdecido kontraŭ li, sed nun li vidis ke ŝi morte malsanas. Tial, unufoje ĉiutage, laŭ Ŭang Da Ma, li prenis bovlon da teo per ambaŭ manoj, kaj mem prezentis ĝin senvorte al sia patrino.

Foje ŝi feble dankis lin, sed plie ili ne parolis ekde kiam fariĝis konata, ke lia edzino estas graveda.

Mia frato sendis leteron al nia patro, kaj morgaŭ li alvenos.

Mia patrino nun ne parolis dum multaj tagoj. Ŝi kuŝas en peza dormo, kiu tamen ne estas kiel ia dormo, kiun ni iam vidis. Ĉang, la kuracisto, levis la ŝultrojn, etendis la manojn kaj diris:

“Se la ĉielo destinas morton, kiu estas mi por malhelpi la plej superan volon?”

Li akceptis la arĝenton, puŝis la manojn en la manikojn kaj foriris. Kiam li estis for, mi hastis al mia edzo kaj petegis lin veni al mia patrino. Nun ke ŝi vidas nenion, kio okazas antaŭ ŝi, ŝi ne scios, ĉu li estas tie aŭ ne. Unue li ne volis, sed kiam li vidis mian timon pro ŝi, li volonte venis kaj staris apud ŝia lito, kaj vidis por la unua fojo mian patrino.

Mi neniam vidis lin tiom emociigita. Li rigardis ŝin dum longa tempo, kaj tiam li tremis de la kapo ĝis la piedoj kaj rapide foriris de la ĉambro. Mi timis, ke li povus malsani, sed kiam mi pridemandis lin, li nur diris:

“Estas tro malfrue.”

Tiam li turnis sin al mi, plorante:

“Ŝi tiel similas al vi, ke mi pensis ke via vizaĝo kuŝas tie morta!” Kaj ni ploris.

Ĉiutage mi nun iras al la templo, kiun mi apenaŭ vizitis ekde la naskiĝo de mia filo. Havante lin, nenio plu estas petinda de la dioj. Ili fariĝis koleraj pro mia feliĉo, kaj tial ili punis min pere de mia amata patrino.

Mi iras al la dio de longviveco. Mi metis antaŭ li oferon de viando kaj vino. Mi promesis al la templo cent rondajn arĝentajn monerojn se mia patrino resaniĝos.

Sed mi ne ricevis respondon de la dio. Li senmove sidas malantaŭ sia kurteno. Mi eĉ ne scias, ĉu li akceptas miajn oferaĵojn.

Malantaŭ la vualo, tiuj dioj komplotas pri ĉiuj niaj vivoj.

Fratino, Fratino! La dioj parolis finfine kaj rivelis al ni sian malbonecon! Vidu, mi estas vestita en sakaĵo! Rigardu mian filon; li estas volvita de l' kapo ĝis la piedoj en kruda, blanka, funebra tolaĵo! Tio estas por ŝi, por mia patrino! Ho mia patrino, mia patrino! Ne, ne konsolu min; mi nun devas plori, ĉar ŝi estas mortinta!

Mi sidis sola kun ŝi ĝis noktomezo. Ŝi kuŝis tiel, kiel en la lastaj dek tagoj, kiel senmova bronzaĵo, nek parolante nek manĝante. Ŝia animo jam aŭdis la vokon de la pli altaj voĉoj, kaj nur ŝia forta koro restas por finbati ĝis febleco kaj silento.

Kiam la horo antaŭ la matena krepusko alvenis, mi subite timis ke estis ŝanĝo en ŝi. Mi kunfrapis la manojn kaj sendis la atendantan sklavon al mia frato. Li sidis en la ekstera ĉambro preparita al mia voko. Kiam li eniris, li rigardis ŝin kaj flustris duontimigite:

“La lasta ŝanĝo alvenis. Sendu iun por venigi nian patron.”

Li gestis al Ŭang Da Ma, kiu staris apud la lito viŝante la okulojn, kaj ŝi retiriĝis por plenumi lian komisionon. Ni solene staris man-en-mane, atendente, kaj plorante.

Subite nia patrino ŝajnis vekiĝi. Ŝi turnis la kapon kaj rigardis nin. Ŝi malrapide levis la brakojn kvazaŭ portante pezan ŝarĝon, kaj ŝi profunde suspiris dufoje. Tiam ŝiaj brakoj falis, kaj ŝia spirito preterpasis, silente kiel dum la vivo, rivelante nenion.

Kiam nia patro envenis, ankoraŭ duone dormanta, kun siaj vestaĵoj senordaj pro hasto, ni informis lin. Li fiksrigarde kaj time staris antaŭ ŝi. En sia koro li ĉiam timis ŝin. Nun li facile ekploris, kiel infano, kaj kriis laŭte.

“Bona edzino, bona edzino!”

Mia frato milde kondukis lin for, kvietigis lin, kaj petis Ŭang Da Ma alporti vinon por konsoli lin.

Tiam, estante sola kun mia patrino, mi refoje rigardis la silentan rigidiĝantan vizaĝon. Mi estis la sola, kiu iam vidis ŝian veran naturon, kaj mia koro fandiĝis al varmaj brulantaj larmoj. Finfine, mi lante kuntiris la kurtenojn, por ŝirmi ŝin kontraŭ rigardoj, kaj por provizi la solecon en kiu ŝi ĉiam vivis.

Patrino mia – patrino mia!

Ni perfumis ŝian korpon per oleo de la floroj de akanto. Ni vindis ŝin en longegan funebran gazon el silko. Ni metis ŝin en unu el la du grandaj ĉerkoj faritaj el la trunkoj de grandegaj kamforarboj kaj preparitaj por ŝi kaj por mia patro antaŭ multaj jaroj kiam miaj geavoj mortis. Sur ŝiaj fermitaj okuloj kuŝas la sanktaj, jadaj ŝtonoj.



Nun la granda ĉerko estas sigelita. Ni vokis la geomanciston kaj konsultis lin pri la plej favora, funebra tago. Li priserĉis la libron de la steloj kaj malkovris, ke tio estas la sesa tago de la sesa monato de la nova jaro.

Ni tial vokis la sacerdotojn, kaj ili venis vestitaj en la ruĝaj kaj flavaj roboj de ilia ofico. Kun la malĝoja, moskaodoro de pipoj, ni kondukis ŝin en solena procesio al la templo por atendi la tagon de la entombigo.

Tie ŝi kuŝas sub la okuloj de la dioj, en la kvieto kaj polvo de jarcentoj. Ne ekzistas sono kiu povus rompi ŝian longan dormon; por ĉiam estas nur la obtuzigita ĉantado de sacerdotoj je la matena kaj vespera krepuskoj, kaj tra la nokto la sola noto de la templa sonorilo frapita je longaj intervaloj.

Mi povas pensi pri neniu krom ŝi. ♦

daŭrigota

Jaga (15)

Daŭrigante la enhavon de numero 014.

Maksim Bočkarev / elrusigis Sergei Isakov / fantasta romano



Maksim Bočkarev



Sergei Isakov

Leŝij estis la unua se temas pri ekkompreni ke la viro bezonas helpon. Li flustris kelkajn antikvajn vortojn en siajn manplatojn kaj ŝvingis ilin al la homa militisto. Li frostiĝis dum kelkaj momentoj kaj poste ŝajnis vekiĝi. Sed la realo ne alportis al li pacon. La viro staris kaj rigardis la mortintan reptilion, poste turnis sian rigardon al la apude starantaj gigantoj kaj levis sian glavon kiel eble plej alte super si, kvazaŭ penante defendi sin. Tiam li komencis serĉi la ĉevalon per la okuloj, sed la kompatinda besto ne povis elteni la odoron de reptilioj kaj gigantoj kaj forlasis sian posedanton.

Ĉi tie oni devas diri, ke la gigantoj kondukis tre delikate. Ja ili povis disbati nekonatan estaĵon sen la plej eta peno. Sed ili konjektis, ke antaŭ ili estas reprezentanto de nova inteligenta vivo sur la Tero. Ili staris kaj silente observis la konduton de tiu ĉi estaĵo por ili. Kune kun ĝia grandeco, ili estis surprizitaj de la malzorgema kuraĝo kun kiu ĉi tiu eta militisto kuris kontraŭ la reptilio kiun ili ĵus mortigis. Ankaŭ la armiloj de la militisto vekis la intereson de la gigantoj. Ĝi aspektis kiel ilia propra, nur signife reduktita. Kaj, kompreneble, ĝi estis multe pli krude farita kaj ne havis la samajn ecojn kiel la kiraso kaj armiloj de la gigantoj.

En tiuj momentoj Leŝij bedaŭris ke li lasis Skoron hejmen, kiu estis sperta en komunikado kun homoj. Li tuj trovis manieron klarigi al ĉi tiu malespera militisto kio okazas. Sed Skor ne estis tie, kaj li devis agi memstare. Leŝij vidis, ke la viro estas klare unu el la parencoj de Jaga, kio signifas, ke ne estis problemoj kun la lingvo de komunikado. Kaj li kriis laŭte: "Rigardu min, militisto!"

Estis tia Potenco en la voĉo de Leŝij, ke la viro ne povis rezisti ĝin. Nu, kompreneble! Ne ĉiutage li devis komuniki kun la Superaj Spiritoj de la Tero. La militisto mallevis sian glavon kaj ŝajnis ĉesi atenti la nekonatajn gigantojn. Li turnis sin al la sono de la voĉo de Leŝij kaj staris trankvile kaj atendis kion alian li diros al li.

Leŝij, daŭre uzante la Forton, ordonis al la viro alproksimiĝi al li: "Militisto, venu al mi kaj aŭskultu!"

La viro tuj obeis kaj humile marŝis al la strangaspekta fremdulo.

"Atente aŭskultu min! Mi demandas, kaj vi respondos! Kaj ne timu, neniun damaĝos vin!" - Leŝij daŭre uzis la Potencon de Voĉo.

"Kiu vi estas? Kaj kial vi venis ĉi tien sola?" - demandis Leŝij en la plej amikeca kaj eĉ iel patra maniero.

"Mia nomo estas Poruba. Mi restas la sola el nia taĉmento. Antaŭ kelkaj jaroj, nia princo kolektis kaj sendis nin por kapti ĉi tiujn..." respondis la militisto, kapjesante al la fetora kadavro.

“Ni longe serĉis iliajn spurojn. Ni estis ĉe la rando de niaj landoj, kaj vizitis nomadojn, sed ni ne povis trovi tion, kion ni serĉis. Kaj tiel, pasiginte tri vintrojn en fremda lando, ni decidis reveni hejmen, kaj preskaŭ atingis la limojn de niaj denaskaj landoj, kiam ni komencis renkonti spurojn de tiuj ĉi estaĵoj! Ni ne kuraĝis malobservi la ordonon de la princo kaj komencis la ĉason. Sed el ĉasistoj ni mem fariĝis ĉasaĵo! — daŭrigis Poruba, kaj estis klare, ke la lastaj vortoj estis tre malfacilaj por li.

“Ĉe la unua renkontiĝo, nia taĉmento estis ektermita de unu el ĉi tiuj estaĵoj! Mi restis sola, mi ne scias per kia miraklo! Kaj mi ĵuris, ke mi ne revenos hejmen ĝis mi venĝos aŭ ĝis mi ekscios la sekreton detruiri ĉi tiujn estaĵojn! Dum multaj jaroj mi persekutas ilin, spuras ilin kaj rememoras ilin. Kompreneble, mi ne kuraĝis ataki ilin sola. Sed ĉi matene ĉi tiu estaĵo bruligis kaj formangis tutan setlejon antaŭ miaj okuloj. Ĝi formangis ĉiujn, eĉ malgrandajn infanojn! Kaj mi denove elvivis! Mi konis ĉi tiujn homojn! Mi pasigis du vintrojn en ilia loĝloko! Ili ne estas niaspecaj, sed ili fariĝis miaj amikoj! Kaj kiam ĉe tagiĝo la estaĵo bruligis iliajn domojn kaj forvoris ilin ĉiujn, kvazaŭ mi perdus la prudenton, kaj ĉio estis en nebulo!” - Poruba finis sian malgajan rakonton. Li staris kun la kapo malsupren, kaj larmoj ruliĝis sur liaj vangoj, ripetante la sulkojn de la cikatroj.

Leŝij malgaje aŭskultis la rakonton de la militisto kaj respondis al li: “Atente aŭskultu min, Poruba! Mi estas Bor! Kaj mi diros al vi sekreton, sed vi gardos ĝin ĝis la fino de viaj tagoj. Ĉi tiuj grandegaj militistoj revenis el la mallumo de la tempo por helpi vin venki ĉi tiujn sovaĝajn estaĵojn. Vi ne faros al mi nenecesajn demandojn! Ekde ĉi tiu tago vi ĉasos kun ni kaj lernos kaj enmemorigos ĉion, kio estos utila al via popolo por la milito kontraŭ la reptilioj!”

Kaj Leŝij prezentis al Poruba la gigantajn fratojn. Ni devas omaĝi la gloran slavan militiston. Li eltenis la "konatiĝon" tre firme kaj adekvate akceptis la fakton mem de la ekzisto de gigantoj. Kvankam, vi scias, ne estas facile akcepti ĉi tion. Sed tempoj estis malsamaj tiam kaj homoj ankaŭ estis malsamaj. Ili sciis kaj kredis, ke la spiritoj de la Tero ne estas ia fabelo, sed vera forto, kiu protektas ĉiujn vivantojn, inkluzive de la homoj mem, kaj tial Poruba estis prefere kontenta ol timita. Ĉar tia honoro ne falis al ĉiu militisto kaj, ĝenerale, al homo. Kaj li estis preta fari ion ajn, por ke lia nomo fariĝu parto de la rakontoj, kiujn posteuloj transdonos de buŝo al buŝo.

Kaj nun la taĉmento de ĉasistoj por fajraj reptilioj pliiĝis al kvin membroj. Kaj Leŝij komprenis, kial la Plejaltulo ne tuj punis lin. Ja li (la senmorta protektanto de la teraj arbaroj) havis la grandan honoron fariĝi ligo inter du civilizacioj. Kaj li ankaŭ vidis en ĉi tiu granda espero, ke la nuna civilizacio havas ĉiujn ŝancojn ne ripeti la sorton de la antaŭaj. Ĉar estaĵoj kiel Jaga neniam antaŭe aperis sur la Tero, kaj reprezentantoj de malaperintaj kaj vivantaj civilizacioj neniam transiris vojojn.

Ankoraŭ estis lingva baro inter la gigantoj kaj la homa kavaliro, sed Leŝij sciis, ke ĝi ne daŭros longe, ĉar la gigantoj, kiel supre menciite, povus facile legi la pensojn de iu inteligenta estaĵo kaj transdoni la siajn. Kaj oni devas ankaŭ diri, ke la lingvo parolita de Poruba estis multe pli simpla ol tiu, kiun parolis la gigantoj. “Do iam ajn ili parolos libere,” pensis Leŝij.

Ili decidis lasi la kadavron de la mortigita reptilio kiel estas. Eble ĝi servos kiel logaĵo por aliaj estaĵoj, ĉar neniuj sciis, kiom da ili aperis. La gigantoj ne malobservis sian antikvan kutimon kaj elŝiris plurajn dentegojn el la makzeloj de la reptilioj. Bava ne ignoris Poruban. Li akiris la plej malgrandan "denton" kiu, mi devas diri, apenaŭ konvenis en la manplato de la militisto. Post tia donaco, Poruba finfine konvinkiĝis pri la amika sinteno de la gigantoj, kaj, kompreneble, la donaco trafis la “pomon”. Por militisto, tia trofeo signifis dumvivan respekton de liaj parencoj. Poruba estis feliĉa kaj preta iri ien ajn en la nova taĉmento.

Sed kien iri, mi ankoraŭ devis pensi pri tio. La gigantoj, pro evidentaj kialoj, ne navigis la terenon, ĉar la mondo ŝanĝiĝis pli ol unufoje ekde ilia tempo. Leŝij pensis pli pri kiel eviti renkontiĝojn inter la gigantoj kaj la loka loĝantaro. Poruba povis nur pensi, ke li havas veran ŝancon venĝi siajn falintajn kamaradojn, kaj estis preta iri ien ajn en tia kaj tia kompanio.

Ni decidis ĉi tion: la taĉmento moviĝus laŭ la intuiciaj sentoj de la gigantoj. Foje, ĉi tiu intuicio tre malofte lasis ilin malsupren, kaj Leŝij sciis pri ĝi. Poruba agos kiel inteligenteco kaj, en kazo de ebla renkontiĝo kun homoj, funkcios kiel intertraktanto. Ne pli frue dirite ol farite! La plej nekutima trupo, kiun la mondo iam vidis, ekiris.

Kaj denove la gastoj

Kiel vi kaj mi jam scias, la unua persono kiu vizitis Jaga estis Provid. Sed Jaga eĉ ne povis imagi, ke la Koro de la Arbaro, unu el la plej sorĉitaj lokoj sur la Tero, subite komencos lasi homojn trairi tiel facile.

Tre malmulte da tempo pasis de kiam Provid foriris, kiam gastoj, pli ĝuste gastino, denove venis al Jaga. Ŝi estis virino ĉirkaŭ tridek kvin jarojn, sed ŝi aspektis multe pli maljuna. Estis klare, ke ŝi delonge vagadis tra la profundaj arbaroj.

La virino staris, kiel Provid siatempe, ĉe la limo de la maldensejo kie loĝis Jaga, kaj atendis pacience ĝis ili atentis ŝin. Ŝi tute ne sciis, ke ŝi estas observata ekde la momento, kiam ŝi paŝis en la Sorĉitan Arbaron. Skor estis malantaŭ ŝi, preta helpi al Jaga en ajna momento. Li ne komprenis kio okazis! Kiel la plej protektita loko sur la Tero povus fariĝi "pasejo"? Estis sento, ke la protekto kontraŭ homa penetro, kiun Leŝij instalas, nun funkcias iel selekteme, sed tio ne faciligis ĝin. Vi neniam scias, kiu povas penetri la Koron de la Arbaro. Vi devos respondi al Leŝij kiam li revenos. Aliflanke, estis Leŝij kiu konstruis la defendon. La kapo de Skor turniĝis pro ĉi tiuj enigmoj.

Sed la fakto restas fakto. Jen ŝi, homa virino, staranta preskaŭ en la centro mem de la Sorĉitaj Arbaroj. Kaj en la kapo de Skor naskiĝis penso: "Kaj se nun ĝi ĉiam estos tiel? Nuntempe Jaga loĝas ĉi tie. Ja ŝi estas duone homa, do homoj venas post ŝi. Aŭ ĉu mi eraras?

La virino ankoraŭ pacience staris kaj atendis, ke iu eliros el la bela domo. Se iu demandus ŝin nun, kiel ŝi alvenis ĉi tien, ŝi ne sciis kion respondi. Ŝiaj kruroj mem portis ŝin tra nepenetreblaj densejoj, kaj poste tra ĉi tiuj belaj, puraj arbaroj. Estis kvazaŭ iu forto montrus al ŝi la vojon kaj rakontis al ŝi, ke savo kaj helpo por ŝia familio estas ĉi tie! Sed la virino vere bezonis helpon. Nekonata malsano malpliigis ŝian malgrandan familion, kiu vivis ĉe la periferio de la domajnoj de la parencoj de Jaga. La virino (ŝia nomo estis Iva (Saliko)) tre lertas pri kuracado de malsanuloj, kaj homoj venis al ŝi eĉ el foraj landoj. Sed ĉi-foje venis malsano, por kiu ŝi ne havis medikamenton. Ŝi provis ĉion, kion ŝi sciis, sed vane, kaj unu post la alia ŝiaj parencoj falis en ian profundan dormon. Ili ne mortis, sed ili ankaŭ ne povis vekigi. Kaj tiam Iva havis sonĝon. Kaj en ĉi tiu sonĝo estis voĉo, kiu diris al ŝi, ke ekzistas sorĉistino en la mondo, ke ŝi estas pli forta ol ĉiuj aliaj kune, ke ŝi helpos savi ŝiajn parencojn, se Iva havos la kuraĝon fari longan kaj malfacilan vojaĝon. Ŝi, kompreneble, eĉ unu minuton ne pensis. Tiun saman tagon, Iva estis sur sia vojo. Nur ĉi tiu vojo estis mistero por ŝi.

Kaj Iva perdis la kalkulon pri kiom da tagoj aŭ semajnoj ŝi pasigis sur la vojo. Sed ŝajnas, ke ŝi trovis tion, kion ŝi serĉis. En arbaro perdita de homaj okuloj, en la plej bela maldensejo, ĉe la bordo de la plej bela arbara lago, staras alta, bela alta domo.

Nu, kompreneble, ŝi venis al la ĝusta loko. Kaj tiam Iva vidas, ke junulino de senprecedenca beleco aperas sur la verando de la domo. Ŝiaj vestaĵoj estas malpezaj kaj aeraj, igante ĝin ŝajni kvazaŭ ŝi ne marŝas, sed ŝvebas super la tero. Iva forgesis por momento, kial ŝi venis, admirante la belecon de la gastigantino kaj ŝian kostumon.

"Kiu vi estas? Kaj kio venigas vin al mi?" - demandis la gastigantino, irante al Iva.

"Mia nomo estas Iva! Mi venis al vi por helpo!" - Preskaŭ falante sur la genuojn, la virino petis.

"Kial vi decidis, ke mi povus helpi vin? Kaj kiel vi trovis vian vojon ĉi tien? - demandis Jaga, alproksimiĝante al la gastino.

"Mi komprenas, ke mi staras antaŭ la plej nekutima sorĉistino en la mondo, do mi diros ĉion tia, kia ĝi estas kaj kredas, ke vi komprenos min! Mia vojo al vi estis longa kaj malfacila, sed mi kredas, ke ĝi ne estis vana. Mi havis vizion, ke nur vi povas helpi mian familion. Kvankam mi estas fama en miaj propraj kaj multaj foraj landoj kiel resanigantino, mi ne kapablas ĉesigi la plagon, kiu venis al miaj landoj. Kaj en miaj sonĝoj mi eksciis, ke vi, la granda sorĉistino, scias savi miajn parencojn. Nekonata forto kaj firma fido al via helpo kondukis min ĉi tien! Tial mi petas vin, helpu!" — kaj la virino efektive falis sur la genuojn. Ŝi rakontis pri la malsano, kiu venkis la homojn en ŝiaj landoj, kaj, fininte la rakonton, ekploris, ne leviĝante de siaj genuoj.

Jaga tre atente aŭskultis ŝin, ŝi kredis la virinon. Aŭskultinte la tutan rakonton de la gastino ĝis la fino, ŝi iris al Iva kaj levis ŝin de ŝiaj genuoj. La virino estis tre malforta, ŝajne ŝi tute eluzis siajn fortojn por trovi la vojon al Jaga; Kaj nun ŝi simple ne povis stari sur siaj piedoj.

Singarde tenante Ivan, Jaga kondukis ŝin en la domon. Antaŭ la verando, virino haltis kaj diris: "Mi estas malpura eniri tiajn helajn ĉambrojn!"

Kaj sen forto ŝi sidiĝis sur la malsupran ŝtupon. Jaga, pripensinte iomete, faris al iu apenaŭ rimarkeblan signon. Iva ne havis tempon por kapti ĝuste al kiu. Sed post kelkaj minutoj ekflugis fumo el la banejo situanta malproksime de la turo. La laca virino kaptis sin pensante, ke ŝi eĉ ne estas surprizita, ĉar ŝi komprenis, ke ŝi vizitas neordinaran sorĉistinon.

Jaga donis al Iva iom da tempon por ripozi, poste helpis ŝin leviĝi denove kaj kondukis ŝin al la banejo, kiu staris sufiĉe malproksime de la domo sur la bordo de la lago, barita de arbustoj kreskantaj laŭ la akvo. Iva ne rezistis. Unue, ŝi ne havis forton, kaj due, ŝi kredis tiun, al kiu ŝi iris tiel longe. Kaj subite ŝi komprenis, ke la gastigantino ne diris sian nomon, kaj decidis demandi, sed ne havis tempon. "Nomu min Jaga!" — la granda sorĉistino antaŭis ŝin. Kaj, kolektinte la ceterajn fortojn, Iva riverencis al Jaga.

Kiam ili eniris la vestĉambron, Iva rimarkis, ke la banejo jam estas preta, sed ŝi ne estis surprizita de tiu fakto. Ŝi nur ĝojis denove, ke ŝi venis ĝuste al la ĝusta adreso, kaj ke ili certe helpos ŝin ĉi tie.

Jaga helpis al Iva senvestiĝi kaj kondukis ŝin al la banejo. Iva konvinkis ŝin, ke ŝi povas fari la pluon mem, kaj Jaga iris reen en la vestĉambron kaj metis la malpurajn ĉifonojn de Iva for de vido. Poste ŝi iris al la domo kaj alportis siajn vestaĵojn kaj kruĉon da malvarma kvaso. Laŭ staturo, ŝi kaj Iva estis proksimume la samaj, kaj la kostumo de Jaga devus esti konveninta al ŝia gastino. Jaga metis ŝiajn vestaĵojn kaj trinkaĵon sur la benkon kaj iris en la domon, ne volante malhelpi la resaniĝon de Iva.

Kiam Jaga eniris siajn ĉambrojn, ŝi denove estis surprizita ĉe la efikeco de la koboldinoj-ĝemelinoj. Sta kaj Msa konis sian aferon, kaj Jaga mense dankis Vodjanoj-on pro tiaj lertaj kaj rapidaj asistantoj. La tablo jam estis primetita.

Iva tre singarde eniris la domegon, timeme ĉirkaŭrigardante. Tian grandegon ŝi neniam antaŭe vidis. Oni diras, ke la princo havas la plej belan turon en la mondo, sed nun Iva dubis pri tio. Ŝi plaŭdis siajn nudajn piedojn sur la perfekte blankigita planko kaj poste trafis en la manĝoĉambron. Jaga sidis ĉe la primitita tablo kaj bonvenige ridetis al sia gastino, montrante lokon dekstre de si. Iva denove kliniĝis de la talio kaj zorge sidiĝis sur la benkon.

La gastino estis nerekonebla. La rusa banejo estas vere unu el la mirindaĵoj de la mondo. Iva aspektas dek kvin jarojn pli juna. Kaj ŝi estis vestita per la vestaĵoj de Jaga mem, kio ankaŭ igis ŝin aspekti nekredeble bela.

La tablo ŝajnis al Iva ne malpli luksa ol la ĉambroj mem, kaj ŝi ne kuraĝis tuŝi la manĝaĵon, kvankam ŝi de multaj tagoj ne multe manĝis. Jaga, vidante la embarason de sia gasto, donis al ŝi ekzemplon kaj estis la unua, kiu komencis la manĝon. Iva, unue timeme, kaj poste pli kaj pli memfide, komencis engluti la frandaĵojn. Ŝi precipe ekŝatis la fiŝon, sed Iva ne povis eltrovi, per kio ĝi estas spicita, kaj ne kuraĝis demandi.

Permesinte al la gastino tute kontentigi ŝian malsaton, Jaga zorge (sed sen ĝeni Iva) ekzamenis la gastinon. Ŝi certe ŝatis ŝin. Estis io konata kaj longe forgesita en ŝi.

Nun Iva finis manĝi, kaj Jaga refoje decidis demandi ŝin pri la malsano, kiu devigis la gastinon ekiri tiel danĝeran vojaĝon. Ilia konversacio estis longa, kaj ili maldormis longe post noktomezo. Jaga eksciis multon de Iva, ne nur pri la malfeliĉo, kiu trafis ŝian popolon. Ŝi eksciis, ke en la areo, kie Iva loĝis, en la lastaj jaroj oni ofte vidis suspektindan homon, ke li estis tre malagraba; Li portis malpuran nigran robon kun profunda kapuĉo, havis maldensan longan barbon kaj la saman liphararon. Lia maldekstra okulo strabiĝis, kaj lia dekstra okulo, se oni rigardis ĝin atente, ŝajnis bruli per blanka fajro. Neniu volis komuniki kun li, kaj la fremdulo ŝajnis elflari ion.

Jaga, kompreneble, ne montris vidon, sed tuj eksciis, al kiu apartenas la portreto priskribita de Iva - Seas Soos Sopbull persone! Ve, li sukcesis resanigi sian okulon! Eh, Soj devintus meti la tranĉilon de sia patro pli profunde en ĉi tiun aĉan serviston de Sur! Ŝi aŭskultis la rakonton de la gastino kaj faris konkludojn: Sur ne trankviliĝis kaj pli kaj pli proksimiĝis al ŝi. Ho, kie estas Alaj, kiel ni bezonas lin nun!

Vidante, ke la gastino komencas endormiĝi, Jaga eskortis ŝin al la gastoĉambro, kaj ŝi mem iris prepari pocion por resanigi la parencojn de Iva.

Jaga perfekte komprenis, ke la malsano de homoj rekte rilatas al la ruzoj de Seas. Kaj ŝi ne dubis, kion precize necesas prepari. Ŝi supreniris al subtegmento, kie, sub la tegmento mem, ŝi sekigis kaj konservis kuracajn kaj magiajn herbojn. Nun, se ni scius almenaŭ unu el la receptoj de Jaga, kiom da homoj ni povus resanigi nun, en niaj turbulaj tempoj. Kvankam, aliflanke, ĉu iam estis tempo de paco en Rus' (eĉ kiam nia popolo ne estis nomita tiel)?

Al vekiĝo de Iva la pocio estis preta. "Mi ne proponos gastu ĉe mi, ĉar mi scias, ke vi ne konsentos. Kaj vi faros ĝuste! Vi ne havas multe da tempo, rapidu!" - diris Jaga kaj donis al la gastino grandan ledan botelon kun du rimenoj por oportune porti ĝin sur dorso.

"Kiam vi revenos, komencu doni al ĉiuj ion por trinki unu post la alia! Kiu unue malsaniĝis, ricevas la trinkaĵon unua! Ne donu tro multe, dek gutoj sufiĉas! Kio restas, verŝu en la lagojn kaj putojn, kiuj ĉirkaŭas viajn terojn. Por longe la akvo tie fariĝos resaniga, kaj eĉ ne unu malsano minacos vin! Kaj ankaŭ mi helpis vin, kaj la prezo por mia helpo estos silento! Neniu devus scii kie vi estis! Donu al mi vian vorton! - Jaga finis sian monologon postuleme.



Iva, same kiel ĉe la unua renkontiĝo kun Jaga, falis sur la genuojn: "Mi ĵuras, mi diros al neniu, kie mi estis, eĉ sub torturo mi ne perfidos vin, sinjorino!"

Jaga helpis la virinon leviĝi kaj eskortis ŝin al la pado laŭ kiu Iva venis. Tiam ŝi staris kaj rigardis kiel Iva malaperis post la vojturno, kaj, sen retrorigardi, diris laŭte: "Skor, invitu Vodjanoj-on al mi!"

Vodjanoj aperis rapide, sekve estis ie proksime. Li la unua komencis la parolon: "Estas tre interese, kiom longe mi loĝas en ĉi tiuj lokoj, sed mi neniam vidis tian aferon, ke homoj tiel facile alvenas ĉi tien!"

"Jen pri tio mi volis paroli kun vi!" - respondis Jaga.

"Ĉu ne ŝajnas al vi, ke iu metis manon en ĉi tio," ŝi demandis.

"Mi longe pensis pri tio. Nur Leŝij, aŭ mi, povas nuligi la malpermeson de mortemuloj eniri ĉi tiujn lokojn. Sed mi ĝuste ne faris tion. Kaj Leŝij preferus morti ol permesi al homoj piediri en la Koro de la Arbaro! Estas io malĝusta ĉi tie!" - diris Vodjanoj kaj eksilentis.

Jaga ankaŭ silentis. Kaj la penso, kiu venis en ŝian kapon, ne estis sola. Ĝuste la sama estas sur la pinto de la lango de Vodjanoj dum longa tempo.

Jaga la unua esprimis ĝin: "Aŭ eble ĉi tio ne estas hazardo? Estaĵoj el antikvaj epokoj vekiĝis. La Leŝij iris por vekti la gigantojn de la samaj tempoj kaj restis viva. La defendo de la Koro de la Arbaro lasas homojn trairi, kaj ankaŭ mi. Ja vi diris, ke homoj kiel mi ne naskiĝis en antaŭaj civilizacioj. Estas timige diri, sed..."

"Sed ŝajnas, ke la Plejaltulo intervenis en la aferoj de la nuna epoko!" - Vodjanoj finis la frazon post ŝi.

Kaj ili denove silentis. La konkludo estis evidenta, sed estis tre malfacile kredi je ĝi. ♦

daŭrigota

Aperis la plej nova libro de la talenta verkema esperantistino el Dobrich Elena Popova

Erika Godó



Aperis la plej nova libro de la talenta kaj verkema esperantistino el Dobrich, Elena Popova, “Resonoj de la tempo”, en Bulgario. Ĝi enhavas mallongajn kaj pli longajn prozajn verkojn: eseojn, rakontojn, legendojn, pripensojn, priskribojn kaj fine prezentojn de la “flugantaj” homoj – elstaraj kaj famaj esperantistoj, verkistoj, tradukistoj, artistoj, kantistoj k.t.p. Ekzemple: la fama bulgara esperantisto kaj verkisto Georgi Mihalkov, la elstara rusa esperantisto, verkisto kaj tradukisto Valentin Melnikov, kaj la fama belga esperantisto kaj eldonisto Lode Van de Velde.

Vere, estas malfacile difini la ĝenron de la prozaĵoj. Mi difinas ilin kiel lecionojn pri bonfarado (“Leciono de la malsatulo”), amo, moralo (“La rakonto de la fontano”, “Ŝercridoj” – “moki la aliajn sen rigardi vin mem estas malbone”), sindono, la propra vera vojo kaj misio en la vivo. Plej gravas trovi kaj elekti sian veran vojon en la vivo. La vojo estas grava simbolo en la verkoj de la aŭtorino.

Resonoj de la tempo

ne estas libro por
hasteme legi en unu fojo

estas kolekto de rakontoj
meditaj, poeziaj, pensigaj, spiritaj
foje mallongaj kiel hajko

ĉiam sinceraj, profundaj
kiuj parolas de koro al koro,
de animo al animo

Eldonejo Libera 2026



Resonoj de la tempo

Elena Popova

Resonoj de la tempo



Elena Popova

Ŝia obstino, mia vivo

Arko Gong



En la 4-a de decembro 1978, mi alvenis al la universitato kun mia sciigo pri akcepto en la mano. Sed ĉe la aliĝo okazis io tute neatendita: la kuracista oficejo rifuzis aprobi mian sanraporton.

— Tiu ĉi universitato neniam akceptis handikapitan studenton, — oni diris al mi.

Mi sidis sur benko en la koridoro, rigardante mian patron, kiu interparolis kun la oficistoj. En tiu momento mi rememoris la ĵus pasintan someron — kaj mian patrinon.

En julio, kiam estis publikigitaj la rezultoj de la universitata enirekzameno, mi ĝoje konstatis, ke mia poentaro superis la akceptan limon. Sed pro mia handikapo, la oficiala respondo estis:

— Ne akceptita.

Mia patro provis trovi iun ajn konaton, kiu povus helpi. Sed vane. Baldaŭ li rezignis.

— Tiaj estas la reguloj, — li diris. — Reprovu venontjare.

Ankaŭ mi komencis prepariĝi por la venontjara ekzameno. Mi elprenis miajn malnovajn lernolibrojn kaj faris novan studhoraron. La mondo ŝajne diris al mi: “Vi ne estas bonvena.” Kaj mi preskaŭ kredis tion.

Sed mia patrino — bazlerneja instruistino, kiu jam instruis pli ol dek jarojn — rifuzis akcepti tiun respondon.

— Mia filino gajnis tiel altan poentaron, — ŝi diris. — Kial ŝi ne rajtas eniri universitaton?

Tiu somero en Nanĉang estis terure varma. Ĉiutage, dum mi sidis hejme kun miaj malnovaj lernolibroj, mia patrino unue longe piediris de nia kvartalo en la antaŭurbo ĝis la bushaltejo, poste veturis per la urba buso pli ol dek kilometrojn ĝis la urbocentro, kaj fine alvenis al la Oficejo pri Altlerneja Akcepto.

La tuta vojo daŭris preskaŭ unu horon en unu direkto.

Ŝi ne iris por kvereli. Ŝi kunportis miajn dokumentojn kaj trankvile, sed firme, interparolis kun la respondeculoj. Ŝi eĉ zorge studis la tiutempajn politikajn dokumentojn pri la ĵus restarigita universitata enirekzameno. Ŝi volis trovi pruvon, ke neniuj regulo eksplicite diras, ke handikapuloj ne rajtas esti akceptitaj en universitato.

La oficistoj rigardis miajn dokumentojn kaj kapjesis kun kompato. Ili ankaŭ sentis bedaŭron pro tio, ke knabino kun tiel alta poentaro estis malakceptita nur pro handikapo. Sed ili mem nenion povis fari.

— Tiaj estas la reguloj, — ili diris al mia patrino. — La superaj instancoj difinis la postulojn. Ni nur plenumas la ordonojn.

Tamen ili ne povis ne rimarki la virinon, kiu ĉiutage, en la plej varmaj tagoj de la jaro, venis el la antaŭurbo, post longa piediro kaj busveturo, staris antaŭ iliaj tabloj kaj ĉiam parolis trankvile kaj respektplene.

Ŝi ne plendis, nek kriis. Ŝi nur ree prezentis siajn dokumentojn kaj ripetis la saman demandon:

— Ĉu vere ne ekzistas eĉ unu escepto?

Ili povis diri nur:

— Ni vere kompatas vian filinon, sed ni ne povas ŝanĝi la regularon.

Foje, ŝi revenis hejmen kun malplenaj manoj.

— Panjo, ne plu iru, — mi diris. — Mi reprovos venontjare.

Ŝi skuis la kapon.

— Ne. Vi bone faris ĉi-jare. Kial vi perdu tutan jaron? Kaj se venontjare oni rifuzos vin pro alia kialo? Mi ne ĉesos, ĝis mi ricevos klaran respondon.

Kiom da fojoj ŝi iris tien, mi jam ne memoras. Mi nur memoras, ke ĉiufoje, kiam ŝi revenis, ŝiaj vestoj estis malsekaj de ŝvito kaj ŝia vizaĝo ruĝa pro la suno. Ŝi unue ripozis iom, trinkis malvarman teon, kaj poste diris:

— Hodiaŭ ankoraŭ nenio. Morgaŭ mi iros denove.

Mi rigardis ŝin, kaj por la unua fojo en mia vivo mi komprenis, kio estas vera obstino.

Ne tiu obstino, kiu diras: "Mi provis."

Sed tiu, kiu diras: "Mi ne ĉesos."

Kaj subite venis turnopunkto.

Tiutempe la ŝtato ĵus restarigis la universitatan enirekzamenon post la dekjara interrompo kaŭzita de la Kultura Revolucio, kaj la universitatoj urĝe bezonis trejni laboratoriajn teknikistojn. Estis kreitaj dujaraj studprogramoj, post kies fino la diplomiĝintoj restus labori en la universitato. Unu universitato decidis pligrandigi sian varbadon je 25 studentoj.

La estro de la Oficejo pri Altlerneja Akcepto rememoris la virinon, kiu ĉiutage venis el la antaŭurbo. Li relegis miajn dokumentojn. Li vidis mian poentaron — precipe la preskaŭ perfektan noton en kemio.

Eble li pensis:

"Tiu ĉi knabino havas handikapon, sed ŝia kapablo estas evidenta. La universitato bezonas laboratoriajn teknikistojn. Kiu pli taŭgus ol iu, kiu preskaŭ perfekte scipovas kemion?"

Li decidis doni al mi ŝancon.

Tiel mi estis akceptita en la dujaran programon por laboratoria teknikisto en la kemia fakto.

Kiam mia patrino revenis hejmen, ŝi ankoraŭ ne havis la oficialan sciigon en la mano. Oni diris, ke ĝi venos poŝte.

Sed ŝia vizaĝo — tiu vizaĝo, kiu dum tiom da tagoj estis laca, sunbruligita kaj premata de silentaj frustrigoj — nun havis alian esprimon. La streĉiĝo malaperis. La ĉagreno foriris. Anstataŭe aperis io, kion mi ne vidis dum longa tempo: malpeza rideto. En ŝiaj okuloj brilis ĝojo.

Ŝi sidiĝis apud mi, ripozis momenton, kaj diris per trankvila voĉo, kiu tamen iomete tremis:

— Vi estas akceptita. La sciigo pri akcepto venos poste.

Tion ŝi diris. Nenion pli.

Sed en tiuj kelkaj vortoj estis la pezo de tuta somero — de ĉiu varmega tago, de ĉiu longa vojaĝo, de ĉiu "revenu morgaŭ", kiun ŝi aŭdis.

Tiu sciigo pri akcepto ŝanĝis mian vivon.

Sed mia vojo al la universitato ankoraŭ ne finiĝis.

Revenu al tiu tago en la koridoro, kiam mi sidis sur la benko. La kuracista oficejo rifuzis aprobi mian sanraporton. La universitato volis resendi min al la Oficejo pri Altlerneja Akcepto. Sed tie oni respondis:

— Ŝi jam estas akceptita. Ni ne povas repreni nian decidon.

La du flankoj ĵetis la respondecon unu al la alia.

Tiam elpaŝis mia patro.

Li ne estis tiel obstina kiel mia patrino. Li estis ĉefingeneriero, viro de malmultaj vortoj. Li iris al la supera instanco de sia fabriko kaj petis oficialan atestilon. Poste li transdonis ĝin al la universitato.



La mesaĝo de la atestilo estis simpla:

"Se via universitato ne povas reteni ŝin post diplomiĝo, nia unuo pretas akcepti ŝin."

Tiu simpla papero solvis la problemon.

La universitato fine cedis, ĉar nun estis garantiita laborposteno por mi post la diplomiĝo. Mi ricevis la aprobitan sanraporton kaj povis oficiale enmatrikuliĝi.

Kaj tiel, post ĉiuj tiuj obstakloj, mi finfine fariĝis universitata studentino.

Tiu pordo — kiun mia patrino malfermis per sia obstino — kondukis min al vojo, pri kiu mi antaŭe ne kuraĝis eĉ revi. Poste mi daŭrigis miajn studojn post dek jaroj da laboro en la fabriko, akiris magistrecon kaj doktorecon kaj fariĝis universitata profesoro.

Kiam mi retrorigardas mian vivon, mi konstatas, ke mia vojo al la universitato ne estis nur vojo de kelkaj kilometroj. Ĝi estis vojo tra malakcepto, duboj, reguloj, burokrataj baroj kaj la propra timo rezigni.

Ĉio komenciĝis de tiu somero, kiam mia patrino rifuzis akcepti la vorton "Ne" kiel finan respondon.

Multajn jarojn poste, mi demandis ŝin:

— Panjo, kial vi estis tiel obstina?

Ŝi respondis:

— Mi estas instruistino. Mi vidis tro multajn studentojn rezigni, ĉar iu diris al ili: "Forlasu". Mi ne volis, ke mia filino rezignu.

Mi dankas mian patrinon.

Ne nur ĉar ŝi malfermis por mi la pordon al la universitato, sed ankaŭ ĉar ŝi instruis al mi la plej gravan lecionon de mia vivo:

Alfrontante maljustaĵon, ne tro facile diru: "Mi rezignas".

Foje unu homo povas ŝanĝi la direkton de alia homo.

Por mi, tiu homo estis mia patrino.

Ŝia obstino ŝanĝis mian vivon. Kaj tion mi neniam forgesos. ♦

Bagatelo influas la rezulton

Yin Jiaxin



Kiam la matena lumo ektuŝis la planton sur mia fenestrobreto, la rosogutoj glitis laŭ la folioj. Mi vidis, ke akvoguto pendis momenton sur la pinteto de la folio, spegulante la tutan mondon en si, kaj poste silente falis surteren. Subite mi ekmemoris la antikvan diraĵon: “El etoj oni konas la grandon.” Efektive, la plej profundaj veroj de la mondo ofte kaŝiĝas en tiuj nekonsiderindaj bagateloj.

Iun printempon, fama entreprenisto alvenis en iun urbon. Li alportis intencon pri grandega investo, kaj la tuta urbo ĝojis pro la novaĵo. La bonveniga ceremonio estis solena kaj entuziasma, kaj floroj kaj aplaŭdoj ĉirkaŭis la Mamonon. La entreprenisto, ridetante, donacis al ĉiu ĉeestinto oran medaleton, ne pli grandan ol dikfingra ungo, kiu brilis per mola lumo sub la lampoj. Ĉiu ĝojis akcepti la neatenditan donacon.

La sekvan matenon, la akcepta oficisto zorge demandis la entrepreniston: “Sinjoro, ĉu vi eble havas pliajn orajn medaletojn? Hieraŭ kelkaj gvidantoj ne povis ĉeesti pro kialoj...” La entreprenisto tuj komprenis kaj jesis. Baldaŭ, la aldonaj medaletoj estis transdonitaj al tiuj gvidantoj. Tamen, en la sama posttagmezo, la entreprenisto nuligis la vizitan planon kaj rekte sin returnis. Lia investo de pluraj miliardoj da juanoj realiĝis fine en alia urbo.

Oni komprenis, ke la aldone senditaj oraj medaletoj funkciis kiel spegulo, kiu montris la avidecon en homa koro. La entreprenisto poste diris: “Al urbo, kie oni avidas eĉ etan favoron, mi ne kuraĝas konfidi grandan entreprenon.” Unu ora medaleto fariĝis la noto de la tuta urbo. Detaloj ne mensogas. La gvidantoj, kiuj montras avidecon eĉ en malgranda afero, malfacile restos honestaj kaj nekorupteblaj en grandaj aferoj, kaj kiel ilia urbo povas stari sur la granda ekonomia mapo?

Tio rememorigas min pri alia bagatelo. En mia hejmurbeto troviĝas amiko, kun kiu mi amikiĝis jam kvardek jarojn. Lia filino kaj mia filo havas la saman aĝon, kaj ambaŭ studis en Vuhano. Mi kaj la amiko intencis gefianĉigi ilin, kaj la du gejunuloj ŝajnis havi simpanion reciproke. Iun someron, ni du familioj interkonsentis renkontiĝi en Vuhano. Ĉe la tablo en restoracio, la etoso estis tiel harmonia, kvazaŭ ni jam estus boparencoj. Post la manĝo, mi proponis fari komunan foton kun mia intima amiko. Lia filino tuj elpoŝigis sian telefonon: “Onklo, mi fotos vin ambaŭ.”

Post kiam la foto sendiĝis en mian telefonon, mi fiksigardis la ekranon, kaj la koro subite “klakis”: evidente mi estas duonan kapon pli alta ol mia amiko, sed en la foto estis male. La knabino lerte alĝustigis la angulon kaj distancon, por ke ŝia patro aspektu pli alta. Mi silente transdonis la telefonon al mia filo. Rigardinte la foton longe, li ridetis signifoplene, dirante: “Paĉjo, artifika knabino ne plaĉas al mi.” Ekde tiam, mia filo iom post iom malproksimiĝis de ŝi. La amfloro, kiu eble povus flori, velkis pro la detalo de fotado.



Eble iuj opinias, ke mi kaj la filo estas tro sentemaj. Sed detaloj neniam ekzistas izolate; ili estas la pinto de la glaci-monto de la karaktero. La knabino eble opiniis, ke tio estas nur senkulpa ruzaĵo, sed ŝi ne sciis, ke en la okuloj de observemaj homoj, tio estas kiel ŝtono ĵetita en akvon, kaj ĉiu disvastiĝanta ondeto rakontas pri la profunda fluo sube. Ĉu honesta kaj fidinda estas tiu, kiu kalkulas kontraŭ sia konato eĉ pri unu foto? Ĉina proverbo diras: “Rigardante la agojn, oni konas la koron.” Tiuj ŝajne negravaj detaloj estas ĝuste la spegulo, kiu reflektas la veran koron.

Kelkaj oraj medaletoj ŝajnas tute ne rilataj al ordinara foto, tamen ili ĉiuj atestas la saman simplan fakton: bagatelo influas rezulton. La rezulto ne nur rilatas al kariero, sed ankaŭ al la juĝo de karaktero kaj la starigo de fido. En la nuna epoko de troa avido al tuja profito, ni tro facile direktas la rigardon al grandaj okazoj, sed forgesas, ke alta konstruaĵo komenciĝas de teramaso, kaj longa vojaĝo ekas per la unua paŝo. Tiuj detaloj, kiujn ni preteratentas, ofte estas la veraj motoroj de la sorto.

Kiam la vesperkrepusko densiĝis, mi denove rigardis la planton sur la fenestrobreto. La matena roso jam vaporigis, sed sur la folio postrestis svaga akvomakulo. La spuro estas tiel svaga, ke eĉ venteto povus forviŝi ĝin; tamen ĝi estas ankaŭ tre klara, ĉar ĝi iam portis la lumon de tuta mateno. Mi pensas, ke ankaŭ la homa karaktero estas tia: ĝi ne troviĝas en la brilaj deklaroj, nek en la artefaritaj prezentoj, sed en ĉiu neatentita momento, kaj en ĉiu neglektita angulo. ♦

Azeno kaj Hundo

Yin Jiaxin



Troviĝis juna vidvino en la vilaĝo. En ŝia korto staris du maljunaj persikarboj. Ĉiun frusomeron ili disetendis densan ombron, kun rozkoloraj fruktoj peze pendantaj sur la branĉoj. Iun matenon la vidvino frue deŝiris du korbegojn da persikoj, ĉiu el kiuj estis ruĝete brilanta kaj granda kiel pugno. Ŝi solide surmetis la du korbojn sur la dorson de la azeno, kiu havis obeeman karakteron, kun la korpo grizblanka kaj la kvar hufoj nigraj. La azeno estis la sola vivanta estaĵo lasita de ŝia mortinta edzo. Ŝi kondukis ĝin ekster la pordon. La nigra hundo sciis, ke ĝi ne devas sekvi la mastrinon dum ŝi vizitas foiron, kaj ĝia tasko estis gardi la domon. Do, kuŝante en sia nesto ĉe angulo de la korto, ĝi simple levis la palpebrojn, kaj svingis la voston ritme plurfoje, kvazaŭ adiaŭante la mastrinon kaj la azenon.

Sur la foiro estis multaj homoj, kaj la persikoj estis tre dolĉaj, do antaŭ tagmezo ili jam elvendiĝis. La vidvino rajdis la azenon hejmen, kun la du malplenaj korbegoj balanciĝantaj ambaŭflanke de la azenpugo. Ŝia vizaĝo ruĝis, kaj sur ŝia frunto aperis ŝviteroj. Kiam ŝi malŝilosis la pordon de la korto, la hundo elĵetiĝis kiel sago, ĝia vosto svingiĝis kiel floro en vento, kaj ĝi pro ĝojo frotadis sian kapon al la kruroj de la mastrino. Klininte sin, ŝi karesis la kapon de la hundo, kaj per la fingroj gratis ĝian dorson, dume la hundo ĝue fermis la okulojn, kaj el ĝia gorgo eliĝis zumantaj sonoj.

La vidvino alligis la azenon ĉe la trogo, kiun ŝi plenigis per sufiĉe da furaĝo kaj iom da brano. La azeno kliniĝis por manĝi, kun la vosto foj-foje skuata por forpeli muŝojn. La vidvino frapis la branerojn for de la manoj kaj eniris la domon. La hundo, svingante la voston, sekvis ŝin de la kuirejo al la salono, kaj de la salono al la dormoĉambro. Kien ajn la mastrino iris, ĝi tuj sekvis ŝin.

Posttagmeze la suno brulis forte. La vidvino ekiris al la kampo, kun la pajla ĉapelo sur la kapo kaj la hojo sur la ŝultro. La hundo volis sekvi ŝin por petoli sur la kampo. Ŝi sin turnis kaj ordonis al ĝi: “Ne sekvu min! Restu hejme por gardi la korton, atentu ke neniu ŝtelu la persikojn.” La hundo silente retiriĝis al sia nesto, metis sian mentonon sur la antaŭajn piedojn, kaj rigardadis la fermitan kortopordon.

Post malpli ol duonhoru, malgrasa figuro ekaperis sur la orienta muro, kaj subrigardis en la korton. La hundo elanis ĉe la piedon de la muro, kaj el ĝia gorgo ruliĝis serio da malaltaj muĝoj, tuj sekvataj de bojado, kiu sonis tiom furioza kaj sovaĝa, kvazaŭ ĝi volus disŝiri la homon sur la muro. La figuro retiriĝis, kaj aŭdiĝis la bruo de forkurantaj paŝoj.

Post la vespermanĝo, kiam la ĉielo malheliĝis, la vidvino varmigis akvon en la kuirejo por sin bani, kaj la vaporo el la ligna pelvo nebuligis la vitron de la fenestro. Kelkaj infanoj alpremiĝis al la pordo de la korto kaj rigardis tra la fendo, tenante ŝtalforkojn, per kiuj ili volis piki kelkajn persikojn por gustumi. La hundo en ili rekonis la najbarajn infanojn, do ĝi kuris al la pordo kaj graŭladis eskteren. Je tio, la infanoj ridante disiĝis.

Densiĝis la nokto iom post iom. La vidvino riglis la kortopordon, eniris la domon kaj estingis la lampon. La lunlumo trafiltiriĝis tra la persikfolioj, disjetante arĝentajn makulojn sur la teron. La azeno lante maĉadis sian manĝaĵon, kaj la hundo kuŝis en sia nesto, kun la okuloj duonfermitaj kaj la oreloj rekte starigitaj, ĉiam atente pri la situacio en kaj ekster la korto. En la korto regis nur la bruo de insektoj.

Subite, nigra silueto aperis sur la muro. La lunlumo desegnis la konturon de tiu homo: granda kapo kaj larĝaj ŝultroj. La movoj de la silueto estis tiel lertaj kvazaŭ li transirus sian propran muron. La hundo tute ne moviĝis, ankoraŭ tenante siajn okulojn duonfermitaj. La azeno tamen starigis la orelojn, kaj ĝiaj naztruoj moviĝis por flari la aeron. Ĝi turnis la kapon al la nesto kaj flustris: “Hundo, estas ŝtelisto.”

La hundo ne respondis, kaj ĝia spirado estis egala, kvazaŭ ĝi dormus profunde.

La silueto lerte surteriĝis en la korto, kaj rekte iris al la domo. La azeno maltrankviliĝis, fosis la teron per la antaŭaj hufoj, kaj kolerete vokis: “Hundaĉo! Ŝtelisto envenis! Kial vi ne atentis?”

La hundo ignoris la azenon, kaj tute fermis la okulojn.

Vidinte, ke la silueto malpeze puŝmalfermis la pordon de la domo, kaj tuj fermis ĝin post si, la azeno ne plu povis sin deteni, etendis sian kolon kaj eligis la akran kaj longan iaon: “I-a! I-a—”

La noktan silenton disŝiris la iaado, kiu estis tiel laŭta ke ĝi povus eĉ vekti mortinton. Post momento, la pordo kun knaro malfermiĝis, kaj la vidvino, nur en subvesto, elkuris al la azeno, tenante dikan lignan bastonon. La lunlumo prilumis ŝian grizan vizaĝon. “Vi fuŝe iaas! Mi lasos vin iai, vi azenaĉo!” Ŝi per la bastono draŝis la azenon senkompare. Tiu ĉi timiĝite flankenŝoviĝis jen maldekstre kaj jen dekstre, sed tamen ĝi ne povis eviti la batadon, ĉar la bridrimeno estis ligita al la trogo. Ricevinte kelkajn batojn sur la dorso kaj postaĵo, la azeno tremetis tutkorpe pro doloro.

“Ĉesu! Ne iau!” Kiam la vidvino laciĝis de la batado, ŝi forĵetis la bastonon, returnis sin kaj fermis la pordon kun pafilo.

Apude la hundo observis la okazon indiferece kaj senbrue.



En la korto restis nur la spiraĵo de la azeno, miksitaj kun ĝemoj de maljusteco kaj doloro. Ĝi turnis la kapon al la nesto kaj ekplendis al la hundo: “Vi hundaĉo, vi jam vidis la ŝteliston, sed vi ne mordis lin! Mi bonintence avertis la mastrinon, kaj ŝi batis min tiel kruele!”

La hundo malvarme ekridis en la mallumo, kaj elpremis vorton inter la dentoj, malpeze kiel roso sur persikfolio: “Merite!”

Aŭdinte tion, la azeno surpriziĝis kaj fariĝis konfuzita. La hundo malrapide levis la kapon, kaj la lunlumo eniris ĝiajn okulojn, en kiuj speguliĝis iom da sarkasmo: “Vi, stulta azeno! Ĉu vi kredas, ke ĉiuj, kiuj transgrimpas la muron, estas ŝtelistoj?”

La lunlumo kviete prilumis la azenan stalon, la hunda neston, kaj la du maljunajn persikarbojn. En la korto regis nur la bruo de insektoj, kvazaŭ nenio ĵus okazus. ♦

Ŝi estas akvo



Verkis: *Adrian Michael*

Tradukis: *John Huang*

Ŝi estas akvo

potenca sufiĉe por dronigi vin,

milda sufiĉe por purigi vin,

profunda sufiĉe por savi vin.



Sokolsky arbaro



Verkis: Kang Li

Trad.: John Huang

Vi estas mia frato.
 Mi volas trovi vin por planti arbon.
 Birdo, arbo, arbaro — pli kaj pli.
 Reen al la dudek-tria de aŭgusto, dumil dudek ses,
 mi revenis.
 Mi plantos arbon por vi.
 La tombo de mia amiko restas tie ĉi.
 Kvin mil dolaroj fariĝis granda arbaro.
 Granda brakumo atendis dudek sep jarojn.
 Nun ĉio estas en ordo.
 De morto al reviviĝo — nuboj kaj sabloj memoras
 ĉiun piedsignon.
 La vento senĉese blovas.
 Sen laco, sen bedaŭro, kun amo en la kor',
 por mondo pli bela, por vivo en flor',
 por mondo pli bela, por vivo en flor'.



Senvorta Fino

Verkis: Kasi

Tradukis: John Huang



Iam diris mi al vi,
jen estas senvorta fin'.
Kun la jaroj ĝi forflugas for de ni.
Iam diris mi: se venos tiu tag',
mi devos for de vi,
sen larmoj sur la vizaĝ'.

Sed kiel povas mi,
kiel ĉesi ree pensi pri vi?
Kiel povas mi,
kiel enterigi ĉion en mi?
Ho, lasu min revidi vin,
lasu min diri: "Mi amas vin!"
Ne turnu vin por foriri.

Ĉe disiĝo — do, ĝis revid',
ne plu diru: "Ne forgesu min."
Lasu la memorojn kun la vento foriri.

Eble forgesos mi,
eble pli sopiros mi,
eble jam ne estas "eble" pli.

Iam diris mi al vi,
jen estas senvorta fin'.
Kun la jaroj ĝi forflugas for de ni.

Iam diris mi: se venos tiu tag',
mi devos for de vi,
sen larmoj sur la vizaĝ'.

Sed kiel povas mi,
kiel ĉesi ree pensi pri vi?
Kiel povas mi,
kiel enterigi ĉion en mi?
Ho, lasu min revidi vin,
lasu min diri: "Mi amas vin!"
Ne turnu vin por foriri.

Ĉe disiĝo — do, ĝis revid',
ne plu diru: "Ne forgesu min."
Lasu la memorojn kun la vento foriri.

Eble forgesos mi,
eble pli sopiros mi,
eble jam ne estas "eble" pli.

Ĉe disiĝo — do, ĝis revid',
ne plu diru: "Ne forgesu min."
Lasu la memorojn kun la vento foriri.

Eble forgesos mi,
eble pli sopiros mi,
eble jam ne estas "eble" pli.

无言的结局

词：卡斯 曲：刘明瑞

曾经是对你说过，
这是个无言的结局。
随着那岁月，淡淡而去。
我曾经说过，如果有一天，
我将会离开你，
脸上不会有泪滴。

.....

但我要如何，
如何能停止再次想你？
我怎么能够，
怎么能够埋葬一切回忆？
啊，让我再看看你，
让我再说爱你，
别将你背影离去。

分手时候说分手，
请不要说难忘记，
就让那回忆淡淡地随风去。

.....

也许我会忘记，
也许会更想你，
也许已没有也许。

.....

曾经是对你说过，
这是个无言的结局。
随着那岁月，淡淡而去。
我曾经说过，如果有一天，
我将会离开你，
脸上不会有泪滴。

.....

但我要如何，
如何能停止再次想你？
我怎么能够，
怎么能够埋葬一切回忆？
啊，让我再看看你，
让我再说爱你，
别将你背影离去。

分手时候说分手，
请不要说难忘记，
就让那回忆淡淡地随风去。

.....

也许我会忘记，
也许会更想你，
也许已没有也许。

.....

分手时候说分手，
请不要说难忘记，
就让那回忆淡淡地随风去。

.....

也许我会忘记，
也许会更想你，
也许已没有也许。

Papertondado montras varmecon en la mondo

Verkis: *Fenestro de la Ĉefurbo*

Tradukis: *Sheng Min*



Papertondado estas unu el la plej fruaj tradiciaj artoj de Ĉinio. Ĝiaj materialoj povas esti papero, inkluzive de orpapero, arĝentpapero, arboŝelo, folio, tolo, ledο kaj aliaj. En majo 2006, papertondado estis enlistigita kiel unu el la unuaj ŝtatnivelaĵoj nemateriaj kulturaj heredaĵoj. En 2009, ĉina papertondado estis enlistigita kiel nemateria heredaĵo de la homaro de Unesko.

Su Jiadi estas la kvinageneracia heredantino de la papertondado de sia familio. Ŝi lernas tion ekde sia infanaĝo. Sub la zorgema instruado de siaj avino kaj patro, ŝi fasciniĝis pri la "tondilo" en iliaj manoj kaj "peco da ĉiam ŝanĝiĝanta ruĝa papero".

Ĉiujare dum la Drakboata Festo kaj la Printempa Festo, Su Jiadi povas eltranĉi simplajn paperajn eltondaĵojn kiel "Bonŝancon" kaj "Multajn infanojn kaj benojn". En mezlernejo, ŝi kapablis eltranĉi pli kompleksajn desegnojn kaj enkadrigi ilin en novjarajn pentraĵojn aŭ fari fenestrajn paperajn eltondaĵojn. Kiam ŝi estis en universitato, ŝi gajnis plurajn premiojn en universitataj artekspozicioj.

Dum la lernado, Su Jiadi estis multe inspirita de la delikataj kaj unikaj papertondaj verkoj de siaj prapatroj kaj gepatroj! Ĉu roluloj sur la scenejo, ĉu floroj, plantoj, fiŝoj kaj insektoj ĉirkaŭ ŝi, ili ĉiuj fariĝis novaj stilaĵoj. Post jaroj da esplorado, ŝi realigis la bonegan artan koncepton de papertondada arto.

La verkoj de Su Jiadi fariĝis pli kaj pli popularaj pro ŝia diligenta tranĉado en pli ol 40 jaroj kaj la dinamika kaj persista praktiko, en kiu ŝi havis siajn proprajn unikajn kapablojn "tranĉi sub papero" kaj "tranĉi formojn laŭvole".

Por transdoni la arton, Su Jiadi nun instruas papertondadon en pli ol dek infanĝardenoj, bazlernejoj kaj mezlernejoj en la distrikto Miyun de la urbo Pekino. Ŝi faris sennombrajn papertondajn verkojn, kaj malantaŭ ĉiu el ili estas rakonto kun profunda popolkultura enhavo.

Su Jiadi diris: "Papertondado estas projekto de nemateria kultura heredaĵo, kiu permesas al infanoj disvolvi memfidon kaj propran imagopovon. Krom trejni la praktikan kapablon kaj spacan imagon de infanoj, ĝi ankaŭ povas stimuli ilian novigan pensadon kaj imagon per la dezajnado kaj kreado de papertondaj desegnoj."

La rakonto montras al ni, ke papertranĉado kiel nemateria kultura heredaĵo povas ne nur heredi tradician kulturon, sed ankaŭ kombini la modernan socion por krei pli artan kaj socian valoron. Per sia talento kaj entuziasmo, ŝi antaŭenigis la arton de papertranĉado kaj lasis valoran kulturan heredaĵon por la estonteco. ♦

El: *El Popola Ĉinio*



Ole-ŝpigitaj Nudeloj

Viktoria



S-ro Vej, nia gastiganto kaj gvidisto de la kultura vojaĝo, estis klera kaj ĝentila. Tiun matenon, li gvidis nian grupon tra la historia urbo, paŝon post paŝo, priskribante la kulturajn riĉaĵojn. Li rakontis historiajn anekdotojn kun granda scipovo, kaj ni ĉiuj profunde admiris lin.

Ĉirkaŭ tagmezo, S-ro Vej grandanime anoncis: "Venu, mi kondukos vin al la plej fama loka restoracio por gustumi iliajn ĉefajn ole-ŝpigitajn nudelojn – ili estas absolute bonegaj!"

La malnova restoracio estis vigla kaj plena je viva atmosfero. La tablo rapide pleniĝis per diversaj delikataj malvarmaj manĝetoj, sed ni ĉiuj ankoraŭ atendis la fabelajn nudelojn. Kiam fine alvenis la teleroj kun dikaj, fortikaj nudeloj, ĉiuj unuvoĉe ekkriis kun miro. La larĝaj nudeloj kuŝis en la fundo, kovritaj per pulvora kapsiketo kaj hakita cepo. Ĝus verŝita bolanta oleo sibligis, kaj aromo miksit kun vapore leviĝis, kiu igis niajn internojn frandiĝi.

Dum la manĝo, S-ino Lin kaj S-ino Wang plene elmontris la tradician ĉinan gastamecon, konstante instigante: "Rapide manĝu, ne hezitu!" "Ĉi tiu malvarma plado estas tre bongusta!" "S-ro Vej, vi laboris tre malfacile, manĝu pli!"

La etoso estis agrabla, kaj gastoj kaj gastiganto ĝuis. Precipe S-ino Lin, kiu vidis, ke la telerpleno da ole-ŝpigitaj nudeloj antaŭ S-ro Vej ŝajne malpleniĝis (fakte eble nur bone miksiĝis), kaj ŝia entuziasmo atingis sian pinton. Ŝi stariĝis, prenis sian propran telerplenon da nudeloj, kiuj apenaŭ estis tuŝitaj kaj brilis pro oleo, kaj ĉirkaŭirante duonon de la tablo, entuziasme prezentis ĝin al S-ro Vej.

"S-ro Vej, manĝu pli! Vi hodiaŭ laboris la plej malfacile, vi devas manĝi pli!" S-ino Lin ridetis kaj parolis sincere.



S-ro Vej, kiu estis absorbita en la rakonto pri la historio de la ole-ŝpigitaj nudeloj, estis surprizita de la subita "manĝigado" kaj tuj mane gestis rifuzante, korpe iomete malantaŭen klinante sin: "Ne, ne! Vere ne necesas! Mi sufiĉe manĝis, vi manĝu, vi bone manĝu!"

"He, ne modeste rifuzu!"

"Vere ne estas modesto, mi jam satiĝis, vi manĝu pli!"

"Nur ĉi tiun telerplenton, vi devas gustumi!"

Unu flameme volis doni; la alia modeste rifuzis. Tiu telerpleno da ole-ŝpigitaj nudeloj, ŝarĝita per tro da zorgo, danĝere ŝanceliĝis inter ili dum ilia reciproka ĝentila insistado, simila al antaŭenpuŝaj movoj en Tajĝiĉuano.



Subite, ĉu la mano de S-rino Lin ekglitis, aŭ estis tuŝita de la rifuzaj gestoj de S-ro Vej – ĉiukaze, tragedio okazis!

La tempo ŝajnis frostiĝi en tiu momento. La peza porcelana telerpleno, laŭ eleganta sed decida arko, glitis el la mano de S-ino Lin. La nudeloj, kapsiketa oleo, hakita cepo... per treege senĝena, senrezerva sinteno, precize kaj komplete, "ŝpiciĝis" sur la malhelblua jako de S-ro Vej.

"Fliŝ—"

La tempo haltis.

La tuta ĉambro falis en silenton. Ĉiuj rigardis kun larĝigitaj okuloj la imponan "abstraktan arton" sur la jako de S-ro Vej – nudeloj pendis kiel akvofalo sur liaj vestoj, ruĝa kapsiketa oleo rapide penetris la teksaĵon, desegnante neregulan mapon, kelkaj cepetoj obstine algluiĝis al lia kolumo.

S-ro Vej mem ankaŭ rigidiĝis, subrigardante sian propran kaosaĵon kun esprimo malfacile priskribebla.

Dum tuta minuto, la aero ŝajnis frosti.

Subite, en angulo, iu – eble ne povante plu deteni sin – eligis mallongan, laŭtan ekridon, kiel ekbruligante meĉon.

"Pu – hahaha!"

Tiu sono estis kiel malŝlosilo, subite rompante la malviglecon. Ĉiuj rigardis la konsternitan S-ino Lin, poste S-ron Vej kovritan je "medaloj", kaj poste rememorante la ĵus "fluan" scenon, ne plu povis deteni sin.

"Hahahaha!"

"Ho mia dio!"

"Jen la... jen la plej bona interpretado de ole-ŝplicitaj nudeloj!" iu kriis, ridante kaj viŝante la okulangulojn, donante la trafan rimarkon.

S-ino Lin, revenante al si el granda embaraso, ruĝiĝis kaj senĉese pardonpetis: "S-ro Vej, pardonon, pardonon! Mi... mi estis tro malzorga!"

S-ro Vej, subrigardante, vane viŝis per papera tuko kelkfoje, fine ankaŭ ne povis ne ridi – estis rideto de rezigno kaj liberiĝo. Li mane gestis kaj humure mem-ironiis: "Ne gravas, ne gravas! Ŝajne la ole-ŝplicitaj nudeloj de ĉi tiu malnova restoracio ne nur estas aŭtentikaj laŭ gusto, sed ankaŭ la signifo de 'ŝpici' devas image doni al la forvojaĝaj gastoj pli vivan impreson. Nu, mi kredas, ke la kompreno de ĉiuj pri ĉi tiu plado vere penetris la 'teksaĵon'!"

Neatendita "olea katastrofo" solviĝis per eksploda rido kaj la mem-ironio de S-ro Vej. Poste ni ĉiuj diris, ke kio vere restis en nia memoro pri tiu tago, ne estis la historio de la malnova urbo, nek la bongusto de la ole-ŝplicitaj nudeloj, sed la "ĉefverko" sur la korpo de S-ro Vej, pentrita per kapsiketa oleo, plena je homa varmeco kaj humuro.

Kaj tiu telerpleno da ole-ŝplicitaj nudeloj, verŝita kun plena entuziasmo, per sia plej intensa, plej rekta maniero, donis al ni ĉiuj vivan lecionon pri kiel "entuziasmo" kaj "akcidento" povas esti apartitaj per nur tre maldika linio. ♦

(1 Originala novelo de Viktoria (Chen Weiqin), kiu devenas el Chaozhou, Guangdong-provinco, Ĉinio.)

Ĉi-vespere ni restu kune

Verkis: Jia Mi

Trad.: Batalanto



Ĉi-vespere ni restu kune,

lampoj paliĝas en la nokt'.

Festo finiĝas scene,

gastoj iras, fluas for la nokt'.

Pluvo flustras, vento ploras,

sub luno ni konfidas.

Malfermu koron, kara, kaj plendu

— la lun' aŭskultas, silente atendas.

Maroj sekiĝos, ŝtonoj disfalos,

sed nia amo ne ŝanĝiĝos;

ni kune restos, am' eternos

ĝis la steloj ne plu lumos.

Vivo estas sonĝo, malnovaj vundoj,

pasint' vekiĝas, kor' respondas.

Ĉe l' horizont' ni iam disiĝos,

adiaŭ, kara — rev' nin renkontas.



Ĉarma rozeto bela

Verkis: Wang Luobin

Trad.: Batalanto



Ĉarma rozeto bela,

Sajdi Maria.

Sur monto mi rajdis por ĉasi kun ĉevalo,

Sube vi kantis, kant' kiel rozkolora nuboj.

Via kant' min devojigis,

De l' deklivo mi ruliĝis.

Aja ja!

Via kant' sonis kiel rozkolora nuboj.

Forta juna Kazaĥo,

Ivan Dudar.

Venu trans riveron hejmen ĉi-vespere,

Nutru vian ĉevalon, kunportu dombron vere.

Kiam la luno supren leviĝos,

Pluku viajn kordojn milde.

Aja ja!

Ni du, brak' en brak', kantos sub la arbo.



Sub la Montoj, Paco Revenis

Ĉiamĝoja



Antaŭe en la hejmo aperis malpac',

Glacio vintra venis el akraj vortoj.

Sufera edzino lante estis en lac',

Ekstere juna paro serĉis komforton.

La Norda Vilaĝo, kiu staras ĉe la piedoj de montoj kaj apud la rivero, havas belan pejzaĝon kaj agrablan klimaton. Plejparto de la vilaĝanoj estas bonkoraj, do la vilaĝo estas bonega loko por loĝi. Tamen estis unu familio de Wang-oj en la vilaĝo, kies vivo estis plena de disputoj, kio vekis diversajn malbonajn komentojn en la vilaĝo.

Wang Niu estis honesta kaj laborema kaj ĉiutage li laboris sur sia kampo. Aŭtune li edziĝis. Lia novedzino Verdfolio estis tre diligenta kaj havis lertajn manojn. La amo inter la juna paro estis pli dolĉa ol mielo. Ili estis plene prizorgemaj unu al alia, kaj montris komprenon kaj simpatian. Sed bedaŭrinde, ŝia bopatrino — la patrino de ŝia edzo, — estis tro malica kaj mallaborema. Ĉiutage la bopatrino donis ĉiun hejman laboron al sia bofilino. Krome, ŝi ĉikanis sian bofilinon, plendante: jen ke ŝi preparis manĝaĵon tro sala, jen sengusta, jen malfrue. Kiam ŝi portis al ŝi varman supon, ŝi kulpigis ŝin, ke ŝi intencis bruligi kaj mortigi ŝin. Se la manĝaĵo iom malvarmiĝis, ŝi diris kun malbona mieno, ke la bofilino volis malsanigi ŝin intence. Kiel ajn zorgeme la bofilino flegis ŝin, ŝi ĉiam trovis pretekstojn. Iom post iom la malbonaj kondutoj de la bopatrino pligraviĝis. Ŝi ne nur plendadis senhalte, sed kelkfoje eĉ batis la bofilinon.

Tagon post tago, ŝia vizaĝo perdis ruĝon kaj freŝon, kaj ŝi iom post iom maldikiĝis. Kompreneble ŝia edzo ankaŭ rimarkis ŝian grandan suferon. Li fariĝis tre afliktita. Multfoje li klopodis haltigi la malbonajn agojn de sia patrino, tamen ŝi ne volis obei lin. Verdfolio toleris tre longtempe, sed fine ŝia pacienco tute elĉerpiĝis.

Iutage Wang suspiris kaj diris kun larmoj al sia edzino, sidante sur la rando de la lito: “Laŭ mia sento, viaj suferoj neniam finiĝos, se ni restos ĉe mia patrino. La plej bona metodo estas, ke ni ambaŭ iros aliloken por nia estonta vivo.”

La bona kaj milda Verdfolio aŭskultis liajn vortojn. Unue ŝi zorgeme demandis sian edzon: “Se ni foriros, kio okazos pri via patrino? Ja ŝi estas via patrino, la maljuna parenco de nia familio!” Aŭdinte tion, Wang respondis kun firma decido: “Ne zorgu pri ŝi. Ŝi estas ankoraŭ sana kaj kapablas fari siajn proprajn aferojn.”

Aŭskultinte lian decidon, Verdfolio fine konsentis kun li trankvile.

La sekvan tagon, Wang Niu informis sian patrinon, ke ili foriros por labori en la Sudo. Komence la patrino kontraŭis la planon. Tamen Wang estis firme decidita, kaj ŝi ne povis malhelpi ilin. La juna paro aĉetis vojaĝbiletojn al la Sudo, por serĉi laboron tie.

Dum ili veturis per trajno, ili rigardis tra la fenestro la eksteran mondon. La pejzaĝo estis ekstreme bela. La trajno kuris inter verdaj montaroj kaj transiris larĝajn, fluantajn riverojn. Ĉio ĉirkaŭe estis plena de vivo, la naturo montris sian viglan belecon.

Ĉiuj tiuj vidindaĵoj malpezigis la antaŭan premitan animon de la edzino. Ŝia koro iom post iom liberiĝis de la peza premo, kaj rideto aperis sur ŝia vizaĝo.

Post alveno en la fremdan urbon, Wang Niu trovis laboron en konstrua loko. Li laboris fideme kaj diligente sub vento kaj suno, gajnante vivrimedon per sia forto. Lia edzino Verdfolio, per konata rekomendo, dungiĝis kiel hejma helpantino ĉe riĉa familio. Ŝia enspezo estis sufiĉe bona. Ĉar ŝi zorgis pri ĉiuj aferoj singarde kaj afable, kaj la manĝaĵoj preparitaj estis tre bongustaj, la mastroj de la domo ĉiumonate plialtigis ŝian salajron.

For de la senfinaj hejmaj disputoj, Verdfolio ne plu estis en la senbazaj riproĉoj kaj ĉikanoj. Ŝi ne plu devis konduti singardeme por plaĉi al aliaj. Kvankam ilia vivo estis okupita kaj simpla, ŝia koro sentis eksterordinaran trankvilon. La juna paro vivis feliĉe ekster hejmo. El la gajnita mono Wang Niu aĉetis belajn vestojn por ŝi. Kiam ŝi surmetis ilin, ŝi aspektis bela kiel feino el la ĉielo.

Per longedaŭra laboremo, la juna paro akumulis sufiĉan monsumon.

Post la foriro de sia filo kaj bofilino, la maljuna patrino sentis, ke la domo fariĝis silenta kaj malplena. Neniu plu movadis en la korto, neniu plu preparis manĝaĵon aŭ purigis la ĉambrojn. La maljuna patrino sentis pezan malĝojon en sia koro. De tiam ŝi devis sola plenumi ĉiujn hejmajn taskojn, kiujn antaŭe ĉiam faris la bofilino. Kiam ŝi koleris, ŝi ne plu havis iun, al kiu elverŝi sian malbonan humoron. Ĉiutage ŝi laciĝis pro la senĉesa hejma laboro, kiun ŝi iam malestimis.

Restante l' bopatrino en la hejmo sola,
Ŝi sentas taskan pezon kun doloro kola,
Sen plua ordono al alia parola,
Post penso ŝi vidis sian kulpan koloron,
La pento plenigis sian malĝojan koron,
Ŝi naskis peti ja pardonon vere volan

Iun tagon, dum ŝi sidis sola en la malplena ĉambro, ŝi komencis mediti pri la pasintaj aferoj. Ŝia edzo forpasis tre frue kaj postlasis ŝin kaj sian filon. En la nuna tempo, filo kaj bofilino laboris fore. Subite, ŝi levis sian kapon kaj rigardis tra la fenestro, ke en la angulo de la korto la herbetoj verdis, la floroj prosperis, paroj kaj paroj da belaj birdoj kantis belsonore sur la arbbranĉoj. Ŝi murmuris: “Eĉ la plantoj kaj birdoj ne estas solaj.” Ŝia menso rememorigis al ŝi ĉiujn maljustajn riproĉojn, senbazajn kolerojn kaj kruelajn kondutojn kontraŭ sia pacienca bofilino.

Subite ŝi larĝe malfermis la okulojn, forte batis sian bruston per la manoj kaj kriis laŭte: “Mi eraris! Ĉio estas mia kulpo! Mi traktis mian bofilinon tro malbone, kaj mi mem forpelis ilin de la hejmo!

Ŝi do telefonis al sia filo kaj diris per voĉo sufokita de plorsingulto: “Nun mi komprenas, kial vi decidis foriri por labori ekstere. Mi kulpas. Mi estis tro severa al via edzino. Fine mi konsciiĝis pri ĉio. Mi volas peti pardonon de mia kara bofilino.”

Kiam la filo aŭskultis la vortojn de sia patrino, li estis tre surprizita. Vespere, post la laboro, li revenis hejmen kaj rakontis ĉion al sia edzino, ke ilia patrino volis peti pardonon. Aŭskultinte tiun novaĵon, rideto aperis sur ŝia vizaĝo. Tiu rideto similis al milda printempa pluvo, kiu forlavas ĉiujn longdaŭrajn malĝojojn en la koro.

La sekvan tagon, la maljuna patrino vizitis siajn najbarojn. Ŝi diris al ili kun honta rideto: “Mi finfine konsciiĝis. Mia bofilino vere estas bona kaj bonkora al mi. Ĉio estis mia kulpo!”

La najbaroj ĝoje aŭskultis ŝiajn vortojn kaj laŭdis ŝin: “Vi ne plu estas tiu obstina kaj malafabla bopatrino. Rapide iru peti pardonon de via bofilino!

Kun lokaj donacoj ŝi veturis suden,

Por peti pardonon de la suferintino.

Malaperis la longa anima vundo,

En la familio floras paco finfine.

Poste ŝi telefonis al sia filo por peti ilian adreson. Ŝi preparis lokajn specialaĵojn de hejmloko kaj sola veturis suden.

Kiam ŝi renkontis sian bofilinon, la maljuna virino humile kaj sincere petis pardonon: “Mi estis malsaĝa antaŭe, kaj ĉiam malfaciligis vian vivon. Ĉio estas mia kulpo. Mi esperas, ke vi ne konservos malamon kontraŭ mi, mia kara bofilino.

En tiu momento la longdaŭraj animaj malpaciĝoj iom post iom malaperis. Wang Niu, vidante, ke lia patrino fariĝis bona al lia edzino, havis la koron plenan de ĝojo kaj multaj miksitaj sentoj.

De tiam la vivo de la tuta familio pliboniĝis paŝon post paŝo, same kiel la sezama tigo, kies floroj ekaperas ĉiam pli alte. Ĉiujare dum festotagoj ili povis trankvile kunveni. La rakonto atingis feliĉan finon. ♦



La Magio de la Mondo

Ĉiamĝoja



Mistera voĉo

paŝo
post paŝo
proksime
al vi
venas.

Granda lingvo
dolĉa
tiel
silente
en vi
naskiĝis.

Esperanto
foje
refoje
esperon
al vi
donacas.

Miraklo
ĉiam
denove
doloron
de vi
forpelas.

De energio
tago
post tago
vi vere
freŝe
plenplenas.

Instruadon
ĉiufoje
senlace
vi zorge
bone
plenumas.

Ĝoja magio,
jaro
post jaro
en via koro
firme
restas.



Lastnokte vento hurlis kun pluveto

verk. Luna Li (Li Qingzhao)

trad. Gajo



Lastnokte vento hurlis kun pluveto,

Post dormo dronas mi en ebrieto.

- La floroj nun ankoraŭ samas!

Respondas al mi domsubreto.

- Ĉu ne?

Ĉu ne?

Ke verdo densas pli ol floruĝeto!



如梦令·昨夜雨疏风骤

李清照 (宋)

昨夜雨疏风骤，
浓睡不消残酒。
试问卷帘人，
却道海棠依旧！
知否？
知否？
应是绿肥红瘦！

清照

Klarigo

Luna Li (Li Qingzhao) (1084–1155 p.K.), estis fama poetino de Song-dinastio en la antikva Ĉinio.

Songesko

verk. Luna Li(Li Qingzhao)

trad. Gajo

Iam ĉe l'altano roĝa
tempis vesperen
satebrie perdis mi la vojon alhejmen!
Ĝufininte tarde remis mi reveni
kaj misiris en lotusfloran densejon
Kion fari?
Kion fari?
Ardearo flugis timigite aeren.



Mezaŭtuna Festo

Luo Shuigen




Luna rond' pendas en ĉiela dom',
Aŭtuna vento skuas salikojn kiel bild'.
Por kiu Ĉang-E svingas siajn vastajn manikojn?
Familia kunest' ĝuas la jad-lumon.



La Numero 1 Zoroastra-Esperantista Detektiv-Agentejo

Anand Manikutty



Rakonto Unu: *La Kazo de la Malaperintaj Navĵotaj Diamantoj*

Ĉapitro Tri

[+]

La Knabo, kiun Neniu Pridemandis

La sekvan matenon K alvenis al la oficejo portante tri kajerojn, tekkomputilon, du tasojn da teo kaj vizaĝesprimon, kiu sugestis, ke li malkovris ion gravan.

A malfidis tiun esprimon.

Ĝi kutime signifis paperlaboron.

"Mi havas novaĵojn," anoncis K.

"Bonajn novaĵojn aŭ enketajn novaĵojn?"

"Enketajn."

"Do temas pri malbonaj novaĵoj."

K sidiĝis.

"Mi pasigis hieraŭon ekzamenante la financajn dokumentojn."

A suspiris.

Nenio bona iam komenciĝis per tiuj vortoj.

"Kaj?"

"Kaj neniu bezonas la monon."

Tio kaptis la atenton de A.

Ĉiuj suspektatoj estis ekzamenitaj.

Rustom Contractor estis komforte riĉa.

Farah administris plurajn bonfarajn fondaĵojn.

Shernaaz havis sukcesan juristan praktikon.

Eĉ Jamshed, malgraŭ sia alarma entuziasmo pri kriptovalutoj, ŝajnis finance sekura.

"Neniu ŝuldoj?"

"Neniu gravaj ŝuldoj."

"Neniu hazardludo?"

"Ne."

"Neniu sekreta jakto?"

"Ne laŭ tio, kion mi trovis."

A aspektis seniluziigita.

Sekretaj jaktoj ofte plibonigis enketojn.

"Interese," li diris.

K kapjesis.

"La diamantoj estas valoraj."

"Jes."

"Sed ne tiel valoraj, ke ili ŝanĝus la vivon de iu el tiuj homoj."

"Ĝuste."

A rigardis tra la fenestro.

Sube, trafiko moviĝis kun la disciplinita kaoso unika al Mumbajo.

Kiam neniu bezonas la monon, ŝtelo fariĝas pli interesa.

Ne malpli.

La oficeja telefono sonoris.

A ignoris ĝin.

K respondis.

Post mallonga konversacio, li kovris la aŭskultilon per la mano.

"Sinjorino Contractor."

A ĝemis.

"Kio nun?"

"Ŝi rememoris ion."

Tiun posttagmezon ili denove troviĝis ĉe Malabar Hill.

Sinjorino Contractor salutis ilin kun videbla embaraso.

"Mi devintus mencii tion pli frue."

"Jes, vi devintus," konsentis A.

Ŝi donis al li presitan ekranbildon.

"Ĝi ŝajnis sensignifa."

A legis la mesaĝon.

Male al la anonima akuzo ricevita pli frue, ĉi tiu estis multe pli stranga.

Ĝi alvenis proksimume du semajnojn antaŭ la malapero.

La sendinto estis nekonata.

La mesaĝo tekstis:

Ĉu iu demandis la knabon, kion li volas?

Nenio alia.

Neniu akuzo.

Neniu minaco.

Neniu postulo.

Nur tio.

A legis ĝin dufoje.

Poste trian fojon.

"Kial vi opiniis tion sensignifa?"

Sinjorino Contractor aspektis malkomforta.

"Ĉar ĝi estis absurda."

"Kial?"

"Ĉar ĉiuj scias, kion li volas."

A malrapide mallevis la paperon.

"Ĉu vere?"

Unuafoje sinjorino Contractor hezitis.

Poste tiun vesperon, A kaj K sidis en irana kafejo reviziantes siajn notojn.

Pluvo mallaŭte frapetis kontraŭ la fenestroj.

K manĝis ion kun kustardo.

A suspektis, ke ĝi malobservas plurajn leĝojn de nutrado.

"Ĉu vi scias, kio ĝenas min?" diris K.

"Pluraj aferoj."

"La mesaĝo."

"Kiun mesaĝon?"

"La duan."

A kapjesis.

"Nu?"

"Ĝi ne sonas kiel ŝtelisto."

"Ne."

"Ĝi sonas kiel instruisto."

"Eble."

"Aŭ terapiisto."

A aspektis terurigita.

"Ni esperu, ke ne."

K ignoris lin.

La dua mesaĝo sentebulis fundamente malsama.

La unua mesaĝo kreis suspekton.

La dua invitis pripenson.

La tono estis malĝusta.

La celo estis malĝusta.

La psikologio estis malĝusta.

Ili ŝajnis veni de malsamaj homoj.

Kaj eble ili vere venis.

La grava malkovro alvenis du tagojn poste.

Tute hazarde.

Kiel plej multaj gravaj malkovroj.

K aranĝis renkontiĝon kun Ardeŝir post la lernejo.

La nepo montriĝis ĝentila, inteligenta kaj profunde malkomforta.

A tuj rekonis la simptomojn.

Tio estis la rigardo de homo, kiu tre penas ne seniluziigi ĉiujn ĉirkaŭ si.

Ili sidis kune en kafejo.

Ardeŝir movis pajlon tra laktofrapo.

K parolis pri kriketo.

A parolis pri nenio.

Fine la knabo malstreĉiĝis.

Kaj tiam li faris eraron.

La plej ŝatatan specon de eraro de A.

"Mi supozas, ke ĉio estos pli facila post la navĵoto."

A levis la rigardon.

"Pli facila?"

Ardeŝir rigidiĝis.

"Vi ne ŝajnas entuziasma pri tio."

"Ne, mi ne estas."

Poste, li hezitis.

"Ne, ne, mi estas. Mi volis diri, ke mi estas," diris Ardeŝir.

"Vi ĵus priskribis ĝian finiĝon kiel krizhelpon."

La knabo diris nenion.

A atendis.

Silento estis utila enketilo.

Homoj hastis plenigi ĝin.

Fine Ardeŝir suspiris.

"Ĝi estas komplika."

"La plej interesaj aferoj kutime estas."

Alia silento.

Kaj poste la vortoj aperis.

Ne rapide.

Ne dramece.

Simple honeste.

"Mi ne scias, ĉu mi pretas."

A interŝanĝis rigardon kun K.

"Pretas por kio?"

"Por ĉio ĉi."

La knabo neklare gestis.

"La ceremonio. La atendoj. Ĉiuj jam parolas kvazaŭ la decido estus farita."

A kapjesis.

Ĉar kompreneble ĉiuj tiel faris.

"Ili planas ĝin jam de jaroj."

"Jes."

"Kaj neniuj demandis vin?"

Ardeŝir ridetis.

Sed ne feliĉe.

"Ne."

Tiun vesperon A sidis sola en la oficejo.

La lumoj de la urbo flagretis preter la fenestro.

Sur lia skribotablo kuŝis fotoj de generacioj da navĵotoj.

Infanoj ridetantaj.

Familioj festantaj.

Tradicioj daŭrantaj.

Li pensis pri la anonima mesaĝo.

Ĉu iu demandis la knabon, kion li volas?

Poste li pensis pri io alia.
 La ŝranko.
 La malaperintaj diamantoj.
 La selektema naturo de la ŝtelo.
 Kaj subite la pecoj ekordiĝis.
 Ne ĉiuj.
 Sed sufiĉe.
 A ridetis.
 Danĝera rideto.
 Tia, kiun K jam lernis timi.
 La sekvan matenon K eniris la oficejon portante teon.
 Unu rigardo al la vizaĝo de A, kaj li haltis.
 "Vi scias."
 "Mi scias la plej grandan parton."
 "La ŝteliston?"
 "Preskaŭ certe."
 "La diamantojn?"
 "Verŝajne."
 K metis la teon sur la skribotablon.
 "Kio perfidis la solvon?"
 A prenis foton de antaŭa navfoto.
 "Oni demandis la malĝustan demandon."
 "Kio estis la malĝusta demando?"
 Ĉiuj demandis:
Kiu ŝtelis la diamantojn?
 A frapetis la foton.
 "La ĝusta demando, sinjoro K, estas ĉi tiu."
 Li glitis la foton trans la skribotablon.
Kial iu bezonus, ke la diamantoj malaperu?
 Kaj unuafoje la respondo ŝajnis evidenta. ♦
daŭrigota



LA SEKRETO DE LA BAOBABO

Ngalamulume Christopher

Tradukis: Honoré Sebuho



Unu vesperon, juna knabo demandis al sia avo:

« Avo, kial la baobabo restas staranta malgraŭ la longaj sekecoj? »

La maljunulo ridetis kaj respondis:

« Ĉar ĝi ne nur serĉas kreski al la ĉielo. Ĝi ankaŭ profunde enplantas siajn radikojn en la teron. »

La knabo rigardis la grandan arbon silente.

Lia avo aldonis:

« En la vivo, tiu kiu volas iri malproksimen devas unue scii de kie li venas. »

Ekde tiu tago, ĉiun fojon kiam la knabo renkontis malfacilaĵon, li rigardis la baobabon kaj memoris tiun parolon.

Morala instruo:

Tiu kiu konas siajn radikojn pli bone rezistas al la ŝtormoj de la vivo. ♦



Solidareco de Orienta Timoro al Kongo

— Matias Araújo



En la fora kontinento Afriko,
En tero skuita de larmoj,
Ni vidas vin, Kongo,
Meze de malĝojo kaj doloro sen nomo.

El Orienta Timoro, malgranda sed zorgema,
Ni etendas nian koron, ne nur vortojn,
Sendante preĝojn, esperon, kaj solidarecon,
Al vi, kiu batalas en malluma nokto sen lumo.


Eble la tero malsamas, distanco disigas,
Sed humaneco ne konas limojn.
Ni sentas vian doloron, viajn larmojn, kaj viajn kuraĝojn,
Kune, en preĝo kaj penso, ni staras firme.

Ke paco denove fluas,
Kiel rivero malvarmetiganta sekan teron.
Ke viaj infanoj ridetu sen timo,
Kaj via estonteco kresku el la cindro de malĝojo.

“Vi ne estas sola. Ni staras kun vi.”

Muziko

— *Hérítier Barasebanya*



Muziko estas afero de konsolo en multaj aferoj, precipe la funebruloj,...

En silento naskiĝas tono,
fingro tuŝas kordon, kiel preĝon.
Ne vorto, sed spiro,
ne bruo, sed vojo.

Muziko ne demandadas,
de kie vi venas.
Ĝi nur malfermas pordon,
kaj diras: restu.

Kiam la mondo tro laŭtas,
mi fermas la okulojn.
Unu noto sufiĉas
por memori, kiu mi estas.



DRKONGO cd/Norda kivuo.

Dankesprimio el Kongo al la mondo de literaturo

— Jeroubbaal Banyanga



Hodiaŭ mia koro kantas kun ĝojo kaj humileco.

Kun granda dankemo mi ricevas la honoron aperi en la listo de la Kálmán Kalocsay Literatura Konkurso 2026 kiel juna talento per mia poemo “Kiam la jaro endormiĝas”.

Tiu momento ne estas nur persona ĝojo; ĝi estas signo, ke la voĉo de Afriko, la voĉo de Kongo, povas atingi la korojn de homoj tra la mondo per la potenco de Esperanto kaj literaturo.

Mi dankas sincere la *Literatura Vivo*-Redakcion kaj ĉiujn, kiuj laboras por subteni la belecon de la Esperanta literaturo. Dankon al la legantoj, verkistoj, instruantoj kaj amikoj de Esperanto, kiuj kredas je la forto de vortoj.

Ĉiu poemo estas semo.

Se ĝi estas plantita kun amo, ĝi povas flori en alia koro malproksime.

Mi daŭrigos skribi kun espero, portante en miaj vortoj la historion, la kulturon kaj la revojn de mia popolo.

Dankon pro ĉi tiu privilegio.

La voĉo de Kongo daŭre kantos en Esperanto.

— Jeroubbaal Banyanga

Voĉo de Kongo



Kiam la jaro endormiĝas

— Jeroubbaal Banyanga

La jaro endormiĝas sur lito de memoroj,
Kun siaj oraĵoj de ridado kaj spiroj.
Ĝi spertis niajn fortojn, silenton kaj batalojn,
Ĝi foriras kviete, sed ne forviŝiĝas.

Larmoj fluis, revoj ekfloris,
Nekonataj vojoj, kiujn ni devis ami.
Amikoj, forestantoj, neatenditaj momentoj,
Skribis en niaj koroj vivitajn ĉapitrojn.

La ĉielo ŝanĝiĝis mil fojojn de koloroj,
Kaj ĉiu tagiĝo portis sian lumon.
Foje ni dubis, falis, rezistis,
Sed ĉiu tago estis brilo.

Je la lasta vespero ni fermas la kurtenon,
Ni lasas bedaŭrojn degeli kiel haŭto
De frukto gustumita ĝis la lasta guto,
Kaj ni benas la jaron por ĝiaj defioj.

Ĉar eĉ se tagoj foje doloris,
Ili instruis nin pli bone ami kaj pensi.
Do rigardante la novan jaron alveni,
Ni paŝas pli fortaj, pretaj rekomenci.



ĜI FARIĜOS REAL'

Nasandratra Patrick



Multaj noktoj sen sufiĉa dorm',
Kurado dum la tuta tag-transform',
Brile de steloj kaj de l' okul-lum',
Vespere laciĝo, frumatene eklum'.

Iuj libroj malfermitaj en la nokta hor',
Iuj ekzercoj faritaj kun granda fervor',
Sed kiam la rezultoj estas anoncitaj,
Ili estas maldolĉaj, larmige ricevitaĵ.

Mi denove ekdubas pri mia kapabl',
Ĉu tio estas la baro por la ir-vojabl'?
Aŭ ĉu ekzistas ia kroma vojo,
Kiun mi ne vidis por atingi kun ĝojo?

Sed mi ne klinos la kapon, mi rigardos al alt',
La falintajn poentojn mi levos sen halt',
La fidon en la menso nenio povos forigi,
Ĉar nur la persisto povos nin venkiigi.

La malfacila vojo gvidas al la venk-honor',
Ne senkuraĝiĝas la koro, eĉ kun korp-dolor',
Ĝis nun la strebado daŭras sen hezit',
Ankoraŭ venos la tago de nia merit'!



Eta poemo por maljunuloj

Muhammad Naeem Javaid



Alia jaro jam forpasis,
kaj ni ĉiuj iom pli maljuniĝis.
La pasinta somero ŝajnis pli varma,
kaj la vintro multe pli malvarma.

Ne estas longe de tiu tempo,
kiam la vivo estis vera ĝuado.
Nun mi plene komprenas,
kion signifas "**vivi en la pasinteco.**"

Iam ni iris al geedziĝoj,
futbalaj matĉoj kaj festaj tagmanĝoj.
Nun ni iras al funebrejoj
kaj al manĝetoj post entombigoj.

Iam ni ofte manĝis en restoracioj
kaj neniam satiĝis.
Nun ni petas pakaĵon por la restaĵoj,
revenas hejmen kaj prenas pilolon.


Iam ni multe vojaĝis
al proksimaj kaj malproksimaj lokoj.
Nun nia postaĵo doloras
jam post veturo en aŭtomobilo.

Iam ni iris al noktokluboj
kaj drinkis iom da alkoholaĵo.
Nun ni restas hejme vespere
kaj spektas la vesperajn novaĵojn.

Tia, mia amiko, estas la vivo,
kaj jen mia rakonto finiĝis.
Do ĝuu ĉiun tagon, vivu ĝin plene,
antaŭ ol vi fariĝos tro, tro maljuna!



La misteraj Kalaŝoj



Muhammad Naeem Javaid

Inter la majestaj montaroj de la Hindukuŝo, en la nordokcidento de Pakistano, troviĝas tri verdaj valoj, kie dum jarcentoj vivas malgranda popolo, kiu konservis sian antikvan religion, kulturon kaj vivmanieron. Temas pri la Kalaŝoj, unu el la plej malgrandaj kaj plej unikaj etnaj komunumoj de Azio. Malgraŭ sia malgranda nombro, ili altiras la atenton de historiistoj, antropologoj kaj vojaĝantoj el la tuta mondo.

Geografie, La Kalaŝoj loĝas en la nordokcidenta parto de Pakistano, en la distrikto Ĉitrulo de la provinco Ĥajber-Paĥtunĥavo (Khyber Pakhtunkhwa). Iliaj vilaĝoj situas en tri pitoreskaj montaraj valoj de la montaro Hindukuŝo: Bumburet, Rumbur kaj Birir. Tiuj valoj troviĝas proksime al la landlimo kun Afganio, je alteco de proksimume 1 700–2 300 metroj super la marnivelo.

La regiono estas fama pro sia impona natura beleco, altaj neĝkovritaj montopintoj, densaj pinarbaroj, kristalklaraj riveretoj kaj fekundaj kampoj. La klimato estas kontinenta, la someroj estas agrable varmetaj, dum la vintroj estas malvarmaj kun abunda neĝado. Tia natura medio dum jarcentoj kontribuis al la relativa izoliteco de la Kalaŝoj kaj helpis al ili konservi sian lingvon, religion kaj tradician vivmanieron.

La origino de la Kalaŝoj estas unu el la plej interesaj kaj samtempe plej misteraj temoj pri la historio de la nordaj regionoj de Pakistano. Dum jarcentoj multaj historiistoj, antropologoj kaj lingvistoj klopodis klarigi ilian devenon, sed ĝis hodiaŭ ne ekzistas unuanima opinio.

La plej konata hipotezo asertas, ke la Kalaŝoj devenas de la soldatoj de Aleksandro la Granda, kiuj restis en la montaro de Hindukuŝ post lia invado de la regiono en la 4-a jarcento a.K. Tiu teorio baziĝas ĉefe sur kelkaj fizikaj trajtoj de la Kalaŝoj, kiel helaj okuloj, blondaj aŭ brunaj haroj ĉe parto de la loĝantaro, kaj sur iuj kulturaj similaĵoj kun antikvaj eŭropaj tradicioj. Tamen ĝis nun ne ekzistas definitiva historia aŭ genetika pruvo por konfirmi tiun opinion.

Laŭ alia, pli vaste akceptata scienca teorio, la Kalaŝoj estas posteuloj de la antikvaj hind-araj popoloj, kiuj migris al la regiono antaŭ pli ol tri mil jaroj. Ili sukcesis konservi sian propran lingvon, religion kaj kulturon malgraŭ la alveno de diversaj popoloj kaj la disvastiĝo de islamo en la ĉirkaŭaj regionoj.

Modernaj genetikaj esploroj montras, ke la Kalaŝoj formas genetike tre apartan loĝantaron. Kvankam ili havas kelkajn komunajn trajtojn kun aliaj popoloj de Suda kaj Centra Azio, ili konservis rimarkindan genetikan izolitecon dum multaj jarcentoj pro sia vivo en malproksimaj montovaloj. Tio klarigas ilian unikan biologian kaj kulturan identecon.

Ankaŭ ilia lingvo, la kalaŝa (Kalasha-mun), apartenas al la darda branĉo de la hind-iranaj lingvoj ene de la hindeŭropa lingvofamilio. La lingvo konservis multajn arkaikajn ecojn kaj estas grava fonto por la studado de la historio de la regiono.

Kvankam la preciza origino de la Kalaŝoj restas diskutata, estas sendube, ke ili reprezentas unu el la plej malnovaj kaj plej unikaj indiĝenaj komunumoj de Pakistano. Ilia riĉa kultura heredaĵo, tradicia religio kaj aparta vivmaniero faras ilin tre valora parto de la historia kaj kultura diverseco de la lando.

La kulturo de la Kalaŝoj estas unu el la plej riĉaj kaj plej originalaj kulturaj heredaĵoj de Pakistano. Dum jarcentoj ili sukcesis konservi siajn tradiciojn, malgraŭ la influo de najbaraj popoloj kaj la rapida moderniĝo de la mondo. Ilia ĉiutaga vivo estas intime ligita kun la naturo, la sezonoj kaj iliaj religiaj kredoj.

La tradiciaj vestoj de la Kalaŝoj estas inter la plej belaj kaj rekoneblaj en la tuta regiono de Hindukuŝ-montaro.

La virinoj portas longajn nigrajn robojn, riĉe ornamitajn per buntaj brodaĵoj ĉirkaŭ la manikoj, la kolumo kaj la malsupra parto de la vesto. La plej karakteriza elemento de ilia kostumo estas la peza kapornamaĵo sushut (aŭ kupas), kovrita per konkoj, buntaj vitraj bidoj, moneroj kaj broditaj ornamaĵoj. Ju pli riĉe ornamita estas la kapvestaĵo, des pli impona estas ĝia aspekto.

La viroj vestas sin multe pli simple. Ili kutime portas la tradician ŝalvar-kamezon, lanan mantelon dum la malvarmaj sezonoj kaj la konatan ĉitralan lanĉapon (pakol), kiu estas vaste uzata en la montaj regionoj de norda Pakistano.

La Kalaŝaj virinoj tre ŝatas juvelaĵojn kaj portas ilin ne nur dum festoj, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo.

Ili ornamas sin per plurvicoj da koloraj vitraj bidoj, kolĉenoj, brakringoj, orelingoj kaj antikvaj moneroj. La ruĝa, oranĝa, flava, verda kaj blua koloroj dominas iliajn ornamaĵojn. Tiuj juvelaĵoj ne estas nur dekoraciaj objektoj; ili ankaŭ simbolas belecon, prosperon kaj apartenon al la komunumo.

Muziko okupas gravan lokon en la vivo de la Kalaŝoj. Preskaŭ ĉiuj religiaj festoj, geedziĝoj kaj komunumaj ceremonioj estas akompanataj de muziko.

La plej oftaj instrumentoj estas tamburoj kaj diversaj blovinstrumentoj el ligno. La melodioj estas viglaj kaj ritmaj, ofte transdonataj buŝe de unu generacio al la sekva. La kantoj rakontas pri amo, naturo, herooj, prapatroj kaj religiaj tradicioj.

Danco estas neapartigebla parto de la Kalaŝa kulturo.

Dum la grandaj festoj viroj kaj virinoj formas cirklojn, tenas sin je la manoj aŭ ŝultroj kaj dancas laŭ la ritmo de tamburoj kaj tradiciaj melodioj. La movoj estas harmoniaj kaj ripetigantaj, simbolante la unuecon de la komunumo kaj la ciklon de la naturo.

Por la Kalaŝoj dancado estas ne nur distraĵo, sed ankaŭ religia kaj socia esprimmaniero, kiu fortigas la senton de komuna identeco.

La Kalaŝoj estas konataj pro sia alta nivelo de lignoprilaborado.

El cedra kaj aliaj lokaj lignoj ili konstruas domojn, grenstokejojn kaj religiajn konstruaĵojn. Pordoj, kolonoj kaj balkonoj ofte estas bele ĉizitaj per geometriaj figuroj, floraj motivoj kaj simboloj ligitaj al ilia tradicia religio.

Ankaŭ memoraj lignaj statuoj kaj tomboornamaĵoj apartenas al ilia malnova arta tradicio, kvankam hodiaŭ tiu kutimo fariĝas ĉiam pli malofta.

Gastamo estas unu el la plej estimataj valoroj en la Kalaŝa socio.

Vizitantoj estas kutime bonvenigataj kun sincera rideto kaj invitataj partopreni en familia manĝo aŭ taso da teo. Dum iliaj tradiciaj festoj la gastoj povas observi aŭ eĉ partopreni la dancojn, muzikon kaj ceremoniojn.

Malgraŭ sia malgranda nombro, la Kalaŝoj estas konataj pro sia malfermiteco kaj afableco al fremduloj. Tiu gastemo kontribuis al ilia bona reputacio inter vojaĝantoj kaj esploristoj el la tuta mondo.



La virino okupas gravan kaj respektatan lokon en la Kalaŝa socio. Kvankam la komunumo konservas tradiciajn kutimojn, la virinoj ĝuas rimarkindan socian liberecon kompare kun multaj aliaj popoloj de la regiono. Kalaŝaj virinoj aktive partoprenas en la familia, ekonomia kaj kultura vivo. Ili zorgas pri la hejmo kaj infanoj, sed samtempe laboras en la kampoj, prizorgas hejmbestojn, kolektas brullignon kaj preparas laktaĵojn kaj aliajn manĝaĵojn. Ilia laboro estas esenca por la bonfarto de la familio. Unu el la plej videblaj trajtoj de ilia socio estas la aktiva partopreno de virinoj en publikaj festoj kaj religiaj ceremonioj. Dum la tradiciaj festoj Joshi, Uchau kaj Chaumos, virinoj kantas, dancas kaj festas kune kun la viroj. Ili ne estas nur spektantoj, sed gravaj partoprenantoj en la komunuma vivo. La Kalaŝaj virinoj ankaŭ ĝuas konsiderindan liberecon rilate al geedziĝo. Tradicie, junulino rajtas esprimi sian opinion pri sia estonta edzo.

En certaj cirkonstancoj ŝi eĉ povas forlasi sian edzon kaj reedziniĝi, kondiĉe ke la tradiciaj reguloj de la komunumo estas respektataj. Tiu kutimo estas tre malofta en la ĉirkaŭaj regionoj kaj montras la apartan karakteron de la Kalaŝa socio. Virinoj ankaŭ estas la ĉefaj gardantoj de la kultura heredaĵo. Ili transdonas al la infanoj la Kalaŝan lingvon, popolajn kantojn, dancojn, legendojn kaj tradiciajn metiojn. Iliaj buntaj vestoj kaj karakterizaj kapornamaĵoj fariĝis simbolo de la tuta Kalaŝa kulturo. Tamen ekzistas ankaŭ religiaj konceptoj pri pureco kaj malpureco, kiuj influas la vivon de virinoj. Dum menstruo kaj akuŝo ili tradicie restas en aparta konstruaĵo, nomata baŝaleni (bashaleni) iom for de la vilaĝo, ĝis ili estas konsiderataj denove rituale puraj. Kvankam tiu kutimo povas ŝajni limiga laŭ moderna vidpunkto, la Kalaŝoj mem komprenas ĝin kiel parton de sia religia tradicio kaj kultura identeco. En la lastaj jardekoj la vivo de Kalaŝaj virinoj iom post iom ŝanĝiĝas. Pli kaj pli da knabinoj frekventas lernejojn, lernas la urduan kaj la anglan lingvojn, kaj kelkaj daŭrigas siajn studojn en universitatoj. Samtempe ili strebas konservi sian lingvon, tradiciojn kaj kulturan identecon. La Kalaŝaj virinoj estas do ne nur patrinoj kaj mastrinoj de la hejmo, sed ankaŭ gardantoj de la kolektiva memoro de sia popolo. Per sia laboro, siaj tradicioj kaj sia kultura aktiveco ili kontribuas decide al la daŭra ekzisto de unu el la plej unikaj etnaj komunumoj de Pakistano.

La tradicia sinteno de la Kalaŝoj al morto diferencas rimarkinde de tiu de la ĉirkaŭaj islamaj komunumoj. Laŭ ilia religia mondkoncepto, morto ne estas absoluta fino, sed natura parto de la ciklo de vivo. Pro tio funebro ne ĉiam havas nur malĝojan karakteron; ĝi ankaŭ estas okazo por honori la vivon de la mortinto. En la pasinteco la Kalaŝoj ne enterigis siajn mortintojn. Anstataŭe ili metis la kadavron en speciale faritan lignan ĉerkon, kiu restis super la grundo en tradicia tombejo. La ĉerkoj estis lokitaj unu apud la alia sur la deklivoj de la montoj aŭ en sanktaj tombejoj. Oni kredis, ke tiel la mortinto restos pli proksima al la naturo kaj al la spirita mondo. Apud la ĉerko oni ofte metis personajn objektojn de la mortinto, ekzemple vestojn, ilojn aŭ aliajn ĉiutagajn aĵojn. Se la mortinto estis viro konata pro sia rajdarto aŭ ĉasado, oni foje starigis apud lia tombo lignaĵojn aŭ skulptaĵojn simbolantajn ĉevalojn aŭ aliajn gravajn elementojn de lia vivo. Tre karakteriza estis ankaŭ la tradicio starigi lignajn homfigurajn statuojn por honori eminentajn virojn de la komunumo. Tiuj ĉizitaj figuroj prezentis la mortinton kaj simbolis lian socian rangon, kuraĝon aŭ meritojn. Hodiaŭ multaj el tiuj statuoj estas konsiderataj grava parto de la kultura heredaĵo de la Kalaŝoj. La funebraj ceremonioj tradicie daŭras plurajn tagojn. Parencoj, amikoj kaj vilaĝanoj kolektiĝas por rememori la mortinton. Oni preparas komunajn manĝojn, ludas muzikon, kantas kaj eĉ dancas. Tio eble ŝajnas nekutima por aliaj kulturoj, sed laŭ la Kalaŝa kredo tia festado esprimas respekton al la vivo de la mortinto kaj lian transiron al alia stato de ekzisto. En la lastaj jardekoj parto de tiuj tradicioj ŝanĝiĝis. Pro naturaj faktoroj, sanitaraj konsideroj kaj kontaktoj kun la ekstera mondo, multaj Kalaŝoj hodiaŭ enterigas siajn mortintojn en la tero. Tamen ili plu konservas multajn elementojn de siaj malnovaj funebraj ceremonioj, kaj iliaj tombejoj ankoraŭ atestas pri la unika spirita kaj kultura heredaĵo de la komunumo. La postmortaj tradicioj de la Kalaŝoj montras ilian profundan ligon kun la naturo, la prapatroj kaj la cikloj de la vivo. Ili memorigas nin, ke diversaj popoloj komprenas morton laŭ malsamaj manieroj, sed ĉie ĝi estas akompanata de respekto kaj amo al tiuj, kiuj foriris. ♦

Taglibro de Pipi



17a, aŭgusto, 2025

Pipi

Proksime al la celo

Ŝli* iam donis al si celon. Ŝli decidis transnaĝi la Esperantan Kanalon. Se ŝli sukcesus, ŝli estus la unua, kiu kovris la Esperantan Kanalon en la mondo.

Tiun tagon, ŝli senhezite plonĝis en la maron kaj sin direktis al la transa bordo.

En la maro, ŝli estis trafita de densa nebulo, forta pluvo kaj furiozaj ondegtoj. Kvankam ŝli estis tre laca, ŝli ankoraŭ senĉese sin puŝis antaŭen.

Sed en la fino ŝli rezignis naĝi. Ŝli tiam tute ne atendis, ke ŝli estas jam proksime al la celo kaj distancas de la transa bordo nur mejlon.

Poste oni demandis ŝlin, pro kio ŝli rezignis. Ŝli diris, "La kaŭzo, ke mi rezignis, estas, ke mi ne povas vidi la celon kiun mi atingos. Mi ne volas erpi la maron!"

Multaj rakontoj pri sukcesintoj instruis al ni kuraĝon kaj persistecon. Tamen ili neniam diris al ni de kie akiri kuraĝon kaj persistecon.

Vi povas havi kuraĝon kaj persistecon nur tiam, kiam vi scias, kie la celo estas.

Kuraĝo kaj persisteco neniam falas el la ĉielo. Ili venas el pesado de enspezo kaj elspezo.

Homa vivo sen celo, kiu, simila al ŝipo sen kompas, atingos nenien. Tute ne ekzistas kuraĝo kaj persisteco en homa vivo sen celo.

*Ŝli = TA = Ŝi aŭ Li.



16a, aŭgusto, 2025

Ansero kaj sovaĝa ansero aspektas same. La ansero ĉiam konsideris la sovaĝajn anserojn kiel samspeculojn. Ili kune ludis ĉe la rivero kaj vivis en perfekta harmonio. Ili kune pasigis la printempon, la someron kaj la aŭtunon. Ili jam fariĝis nedisigeblaj bonaj amikoj.

Kiam la vintro glaciigis la riveron, la sovaĝaj anseroj devis migri suden por vintri. Iutage ili subite forflugis sen diri adiaŭ al la ansero. La ansero havis grandajn flugilojn, sed ili ne funkciis. Ĝi ne povis flugi. Ĝi rapidpaŝe postkuris ilin kaj histerie plorkriegis: "Atendu min, atendu min, karaj sovaĝaj anseroj, kiel mi povu vivi sen vi? Kiel mi povu vivi sen vi?"

Kiaj korŝiraj plorkrioj, similaj al malespera helpopeto de dronanto! Ilin aŭdinte, oni ne povis digi la larmojn.

Kompatinda ansero, vi erare taksis ilin samspeculoj. Ne puŝu vin en la rondon, kiu ne apartenas al vi!

15a, aŭgusto, 2025



Finfine foriris la varmega somero kune kun la peza laboro. Mi finfine povis eligi suspiron de malŝarĝiĝo. La 14-an de aŭgusto 2025, nome hieraŭon, mi feriiis en la ruo. Matene mi aĉetis ŝafaĵon kaj faris el ĝi supon, per kiu mi planis bone min regali. Tagmeze mi lipis du botelojn da biero. Post la tagmanĝo mi faris sieston. Posttagmeze mi iris sur la monton por kolekti avelojn. Proksime al la vesperiĝo mi banis min en la rivero en la valo. La ĝisgenue profunda rivero flustradis sur la ŝtonetoj kaj malhaste veladis uesten laŭ la piedo de la monto. Al mi plaĉegis vadi en la rivero kaj aŭdi la akvomurmuron. Malfruposttagmeze mi iris hejmen por prepari vespermanĝon. Vesperkrepuske mi prenis grandan vespermanĝon. Post kiam la nokto falis, la kvieta vilaĝo estis envolvita en la mantelo de la nokto, kaj tie kaj tie ondadis nokturno. Kion aludas la nokturno? Ĉu vi scias?

7a, aŭgusto, 2025

Mi ĵus vizitis mian legomejon. Armeo da moskitoj sturmatakis min kaj preskaŭ disŝiris min. Mi tamburis sur mia kara melono per mia montra fingro por kontroli, ĉu ĝi jam maturiĝis. Ĉu vi povas kapti tion, kion mi diris en la filmeto?

La cikadoj malagrabla ĉirpadis senfine sur la arbo antaŭ mia domo.

5a, aŭgusto, 2025

La du mezaĝaj viroj, unu kun la brakoj krucitaj kaj la alia kun la manoj post la dorso, renkontiĝis sur la vojeto inter la maizaj kampoj. Ĉu aspekte, ĉu veste, ili neniel diferencis inter si. Ili similis unu la alian kiel du akvogutoj: sama kalva kapo, sama ronda vizaĝo, samaj brovoj kaj okuloj, samaj nazo kaj buŝo, sama staturo, sama jaketo, samaj kulotoj, samaj ŝtrumpetoj kaj samaj ŝuoj.

Ilia sameco estas tiel granda, ke oni eĉ ne povas ilin distingi. La vira duo vizaĝalvizaĝe staris, kaj fiksrigardis unu alian scivoleme, kvazaŭ ili devenus de tute malsamaj planedoj. Sur ilia vizaĝo speguliĝis nek rideto nek kolero nek entuziasmo nek ekscitiĝo. Iliaj brovoj eksulkiĝis, kaj iliaj lipoj estis kunpremitaj. Ambaŭ ŝajne havis ion por diri, sed neniu el ambaŭ povis malfermi la buŝon.

Ili similas unu la alian kiel du ĝemeloj.

4a, aŭgusto, 2025

Regas daŭraj alta temperaturo kaj akvomankego en suda Ĉinio. La maizoj soifmortis vivaj. Sub la malica suno la maizoj langvoris, ŝrumpis, velksekiĝis, mortis ĝisradike. Ili tiel elsekiĝis, ke ili facile brulos se oni metos fajron al ili. Ili estos ne saveblaj, eĉ se nuboj ploregos. Rigardante maltrankvilmiene la fendiĝintajn kampojn kaj la mortintajn maizojn, jam preskaŭ cindrigitajn de la suno, la terkulturistoj estas deprimitaj, dancantaj kiel formikoj sur la rando de varmega pato. Ilia espero por la riĉa rikolto forvapiĝis.

4a, aŭgusto, 2025

En la 3-a de aŭgusto 2025 terura fortega tifono trafis la gubernian urbon Zhaodong en la provinco Heilongjiang. La tajfono furioze balais la teron kaj faris detruigon: la maizoj sterniĝis, la arboj aŭ rompiĝis en la mezo aŭ elŝiriĝis kune kun la radikoj ... Tio vere estas grandega natura katastrofo. Pro tio la koroj de la kamparanoj perlaborantaj sian nutraĵon per terkulturado sangas. Kial la ĉielo tiel molestis la kompatindajn terkulturistojn?

3a, aŭgusto, 2025

Hodiaŭ posttagmeze en Dalian abruptis pluvego. Pluvigis kvazaŭ per siteloj! Jen la veturiloj vadis en la akvo. La pluvo daŭris maksimume du horojn. Nun la pluvo cedis al la sporada zefiro. La pluvo malvarmetigis la aeron.

31a, julio, 2025

Shiyongxin, la eksa abato de la Templo Shaolin, freneze kuregis kaj histerie plorkriegis: "Mi volas esti monaĥo! Mi volas monaĥiĝi! Mia profesio estas legado kaj ĉantado de budhanaj psalmoj!"

Estante abato, li tuttage dronis en mono kaj belulinoj anstataŭ ĉanti sutrojn. Li prenis la Templon Shaolin kiel sian monerproduktan arbon kaj proprigis al si grandajn sumojn kaj ŝtelojn ĝuis virinojn. Li vivis en reĝa vivo. Liaopinie, "la herbo ne vivas pli ol unu jaron, la homo ne vivas pli ol unu vivon. Oni devas ĝui la volupton, eĉ se tio ruinigus la tutan havaĵon!" Kiel li povas tieli? Kiel li degeneris! Kia bedaŭro! Amitabo!

Li tute ne indas esti monaĥo. Antaŭ kelkaj tagoj li estis forŝlosita. Kaj justa juĝo atendas lin. Kion oni faros pri li? Ĉu oni povos forliberigi lin? Dependas! Ni atendu kaj vidu!

30a, julio, 2025

Li estas Wang Fugui, esperantisto, Shandong-provincano. Li estas belulo solide konstruita, kun larĝa vizaĝo, tufaj brovoj, grandaj okuloj kaj eburaj dentoj. Li havas blindige oran falsan dentegon, kiu povas plene montriĝi kaj glimi nur kiam li hahaas. Mi interesiĝas pri tiu ora dentego. Mi okule taksis ĝin kaj pesis ĝian valoron longan tempon. Mi maĉis kaj remaĉis tiujn demandojn: "Kiom ĝi kostas? Kiel mi povos forŝteli ĝin? Kiel mi povos elbati ĝin?" Tio estas treege tikla afero, tute simple egala al eliro de dento el la buŝo de tigro!

La tempo forflugis rapidege. La aĝo strekis lian vizaĝon. Li jam longe emeritiĝis. Nun li loĝas ĉe sia filino en Beijing. Li helpas sian filinon prizorgi la infanon, kio tre amuzis lin. Jen lia nepo estas bela kaj aminda. Li lalaas kaj petole kapobatas la avon kaj tiu manifestas feliĉan rideton.

27a, julio, 2025

Kun oreloj starigitaj, okuloj streĉitaj kaj lango pendanta, hundo nomata Guoba kuŝas surventre sur la tero. Lia mastro monologas en lia ĉeesto:

"Pri la afero, ĉu mia Guoba povas kompreni miajn vortojn efektive, vi prefere ne plu demandu min! Ĉar mi ankaŭ ne certas pri tio! Ni faru provon, sondu lin kaj vidu el liaj agoj. Se mi diras al li 'Guoba, iru alporti al mi botelon da akvo, mi havas soifon, mi volas trinki akvon! Iru rapide!', jen li restas senmova. Sed se mi diras 'Guoba, iru alporti al mi botelon da akvo. Post momento mi serĉos edzinon por vi.' , jen li tuj leviĝis kaj buŝe alportis botelon al mi. " Ĉu kompreni aŭ ne kompreni? Jen la pruvo! "

(Kvietiginte la soifon, la mastro ne iras serĉi edzinon por Guoba. Vidante, ke la mastro friponis kaj mistifikis lin, Guoba malpacientiĝas kaj flamiĝas. Li furioze aljelpas la mastron, kvazaŭ urĝante lin rapidi iri. Tamen la mastro diras, de kie li serĉos edzinon por li.)

**26a, julio, 2025**

Lastatempe, iu eksterlandulino dum sia turisma vojaĝo en Xi'an estis logita de ŝtona leono, ne pro tio, ke tiu estis majesta kaj vivovera, sed pro la ŝtona globeto en ties buŝo, kiu ekscitis ŝian interesiĝon. Estis la unua fojo por ŝi vidi ŝtonan leonon. Pro scivoleco ŝi etendis sian manon kaj karesis ĝian kapon. Ŝia rigardo estis kaptita de la ŝtona globeto en ĝia buŝo. Ŝi provis mane elpreni ĝin por esplori. Sed malgraŭ ŝia multfoja provo, la globeto nur turniĝis interne anstataŭ eliĝi, kio multe amuzis la apudstarantojn. Kiel la globeto estis enmetita internen kaj kiel ĝi povas esti elprenota? Ĉu vi scias tion? Se vi scias, do volu helpi ŝin elpreni ĝin! Multajn dankojn!

24a, julio, 2025

Ĉi-matene, kiam mi en la grupo vidis la bildon afiŝitan de s-ro instruisto Li Weilun, inspiro tuj glitis en mian menson. Mi estis inspirita verki ĵurnalon.

Antaŭ la domo de s-ro instruisto Li Weilun kreskas granda liĉiujo, kiu estas plenplena de tuberoj kaj truoj, dekmetre alta kaj dika je duhoma ĉirkaŭpreno, kun densa frondaro kiel baldakeno. S-ro Li ofte sidas en ĝia ombro por ĝui malvarmeton kaj legi libron. Jen la liĉio jam maturiĝis. Inter la verdaj foliaroj pendas grapoloj de malgrandaj ruĝaj fruktoj, kiuj estas ĝuo por la okuloj. Per nura etendo de la brako s-ro Li povas depreni kelkajn el ili por manĝi. Ili estas dolĉaj kaj sukoplenaj. S-ro Li tre ŝatas ilin.

S-ro Li estas tre aktiva, gaja, vigla kaj plena de energio, kaj por tiel diri, maljuna junulo.

Mi deziras al s-ro Li bonfarton kaj ĉion bonan! ♦


John Huang

GEORGO KAJ DODO: LA BATALO PRI LA KAŜITAJ GLANDOJ



Karikatur: Muso 2

Erika Godó



Fotografia rubriko

Fotado kaj klarigo:

John Huang



La Pac-himno en Graz

La 7-an de aŭgusto 2026, dum la **Internacia Arta Vespero de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz, Aŭstrio**, la Internacia Esperanto-Ĥoro sursceniĝis sub la gvido de la konata Esperanto-ĥordirektistino **Zdravka Boytcheva**. En tiu ĉi momento ŝi direktis la ĥoron en la kantado de **La Pac-himno**. La levitaj brakoj de la kantistoj, iliaj malfermitaj buŝoj kaj la energia gesto de la direktistino kunfandiĝis en unu vivoplenan momenton, kvazaŭ la ideo de paco mem ricevus voĉon kaj moviĝon sur la scenejo. La ĥoro prezentis tiun vesperon tri kantojn, kaj *La Pac-himno* estis la unua el ili.

Mi kaptis tiun momenton per **Nikon D850** kun objektivo **AF-S NIKKOR 70–200 mm f/2.8**. La fotaj parametroj estis **ISO 1000, 70 mm, f/2.8 kaj 1/200 s**. La relative granda aperturo kaj sufiĉe rapida obturatoro helpis konservi kaj la atmosferon de la sceneja lumo kaj la viglan movadon de la kantistoj kaj direktistino. La foto poste aperis en la **septembra numero de la revuo Esperanto** kaj ricevis favorajn reagojn. Por mi ĝi estas ne nur kongresa foto, sed ankaŭ bilda memoro pri momento, kiam muziko, Esperanto kaj la komuna deziro al paco kuniĝis sur unu scenejo.

La flago transiras al Melburno



Fotado kaj klarigo:

John Huang, Prezidanto de ILEF

La 8-an de aŭgusto 2026, dum la ferma solenaĵo de la **111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz, Aŭstrio**, okazis unu el la tradiciaj kaj simbolplenaj momentoj de ĉiu UK — la transdono de la kongresa flago. **Ewald Schick** (maldekstre), prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la ĉi-jara UK en Graz, transdonis la flagon al **Sandor Horvath**, prezidanto de la LKK de la venontjara Universala Kongreso en **Melburno, Aŭstralio**. La granda verda flago kun la Esperanto-stelo etendiĝis inter la du prezidantoj: unu kun levita pugno adiaŭis kongreson ĵus plenumitan, dum la alia jam tenis en siaj manoj la respondecon kaj esperon de la venonta UK. Tiu ĉi ĉiujara ceremonio estas pli ol simpla transdono de flago — ĝi simbolas la kontinuecon de la Universala Kongreso kaj la vojaĝon de Esperanto de unu urbo kaj kontinento al alia.

Mi kaptis la momenton per **Nikon D850** kun objektivo **AF-S NIKKOR 70–200 mm f/2.8**, uzante la parametrojn **ISO 1250, 70 mm, f/4.5 kaj 1/400 s**. La relative rapida obturatoro klare frostigis la gestojn de la du LKK-prezidantoj kaj la grandan flagon, dum la 70-mm-a fokusa distanco ebligis inkluzivi kaj la du ĉefajn protagonistojn kaj la tutan flagon en la kadron. Por mi, la foto konservas ne nur ceremonian momenton de la 111-a UK, sed ankaŭ la simblan sekundon, kiam **Graz adiaŭis kaj Melburno transprenis la stafeton**. ♦

La maljuna metiisto de la nemateria kultura heredaĵo — olepapera ombrelo

Fotado kaj klarigo: Huangcheng Wangshi

Trad.: John Huang

La foto kaptas momenton de la tradicia manfarado de olepaperaj ombreloj en malnova metiejo. Radio de Tyndall-lumo verŝiĝas tra ligna fenestro de la tegmento kaj dividas la malluman, modestan laborejon en tavolojn de lumo kaj ombro. La maljuna metiisto kliniĝas por ĝustigi flavan ombrelon pentritan per florbranĉoj. Liaj malglataj manoj kontrastas kun la delikata flora ombrelo, atestante pri jardekoj da sperto kaj sindediĉo al sia metio.

Ĉirkaŭ li estas dise aranĝitaj brilruĝaj olepaperaj ombreloj, ornamitaj per tradiciaj motivoj de peonioj kaj birdoj. La intensa ruĝo kaj varma flavo forte kontrastas kun la malvarmeta mallumo de la malnova laborejo, kreante okulfrapan vidan efikon.



La olepapera ombrelo estas tradicia metiarto de la **nemateria kultura heredaĵo de Ĉinio**, portanta en si la romantikan ĉarmon de la ĉina kulturo. La lumradio kvazaŭ prilumas manmetion heredatan tra jarcentoj. La makulitaj muroj kaj ligna tegmenta strukturo de la malnova domo formas modestan fonon, dum la ludo de lumo kaj ombro kreas trankvilan etoson. La foto ne nur dokumentas la ĉiutagan sindediĉon de maljuna metiisto al la konservado kaj transdono de tradicia metio, sed ankaŭ, per la kolorriĉaj ombreloj, montras la apartan orientan estetikon de la tradicia metiarto kaj rakontas pri la varmo de kultura heredaĵo transdonata de generacio al generacio.

Ekipaĵo kaj fotaj parametroj:
vivo X200 Pro

Aperturo: **f/2.0**

Obturatora rapido: **1/50 s**

Fokusa distanco: **47 mm**

ISO: **724**

Fotita: **2026-06-07, 09:51**

Loko: **Jingxian, Anhui, Ĉinio**

Huangcheng Wangshi (皇城往事) estas ŝtata oficisto kaj membro de la **Ĉina Asocio pri Fotografia Kopirajto**, la **Asocio de Fotistoj de Anhui-provinco** kaj la **Asocio de Entreprenistaj Fotistoj (Ŝenĵeno)**. Li okupiĝas pri poŝtelefona fotografado jam de sep jaroj kaj aparte lertas pri pejzaĝa, arkitektura, natura kaj homkultura fotografado.

Pli ol tridek el liaj verkoj estis elektitaj por ekspozicioj aŭ premiitaj, interalie ĉe la **Pingyao-a Internacia Fotografia Festivalo**, la tutlanda ekspozicio de filmaj kajografiaj verkoj **Kelei-Pokalo** (Ĉina Internacia Scienc-Eduka Fotografia Ekspozicio), retaj fotekspozicioj de la **Ĉina Asocio de Fotistoj**, kaj diversaj enlandaj fotografiaj konkursoj, en kiuj liaj verkoj ricevis unuajn, duajn kaj triajn premiojn kaj honorajn distingojn.

Metasekvoja arbaro en la matenruĝo



Fotado kaj klarigo: Huangcheng Wangshi

Trad.: John Huang

En frua mateno de la komenca vintro, ĉe la tagiĝo, oranĝ-oraj matenruĝaj radioj kovras la ĉielon, dum tavoloj da foraj montoj silente konturiĝas en malhelaj tonoj. Maldika nebulo, kvazaŭ malpeza vualo, glitas super la lago kaj envolvas la montojn kaj akvon en svaga, poezia etoso.

Apud la akvo, la metasekvoja arbaro estas plene kolorita de la sezono, kaj la malhelaj arbosiluetoj speguliĝas en la kvieta, speguleca lago. Varmaj kaj malvarmaj koloroj milde kunfandiĝas. Malgranda boato malrapide glitas sur la akvo, postlasante delikatajn ondetojn. Kelke da vizitantoj boatas tra la nebulo, aldonante iom da moviĝo kaj vivo al la silenta pejzaĝo.

La varma oranĝa ĉiela lumo kontrastas kun la malvarmaj tonoj de la nebulaj montoj, dum la klaraj tavoloj de proksimo kaj malproksimo kunigas la eteran trankvilon de la pejzaĝo de suda Anhui kun la varmo de homa ĉeesto. La foto kaptas la kvietigan belecon de la matena nebulo kaj montras la vastan, mildan ĉarmon de la pejzaĝo de Jiangnan, kvazaŭ en tradicia ĉina tuĉpentraĵo. Ĝi transdonas la poezian senton de libera kaj senzorga vivo en la naturo, for de la bruo de la mondo.

Ekipaĵo kaj fotaj parametroj:

vivo X200 Pro

Aperturo: **f/2.67**. Obturatora rapido: **1/100 s**. Fokusa distanco: **47 mm**.

ISO: **192**. Fotita: **2026-07-07, 19:53**. Loko: **Ningguo, Anhui, Ĉinio**

INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO

— *Julian Modest*



“HRISTO GOROV-HRIMA” – 2026

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por eseo. La temo de la eseo estas:


“MIA PLEJ BELA ESPERANTO-REMEMORO”

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La verko estu tajpita komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman – 12-punktaj

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2026 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso:

e-mail: modest.mihalkov@gmail.com



ESPERANTO — ALVOKO POR POETOJ KAJ PASIULOJ

Tiberio Madonna

La Internacia Premio Luigi Vanvitelli organizas retan legadon de poemoj en Esperanto, programitan por la 9a de oktobro je la 19a (itala horo!), respondanta al la 17a UTC-horo.

Ĝi estas internacia renkonto malfermita al poetinoj, poetoj kaj pasiuloj de poezio devenantaj el la tuta mondo, por kunpartigi la poezion per la lingvo Esperanto.

Eblas proponi tekstojn proprajn kaj ne, aŭ traduki en Esperanton poemojn de aliaj aŭtoroj.

 Kunordiganto kaj respondekanto de la renkonto:

Tiberio Madonna
poeto, esperantisto kaj interpretulo

kun la valora kunlaborado de

Debora Rossetti

Nacia Konsilianino de IEF

(Itala Esperanto-Federacio)

 SENPAGA PARTOPRENO

Ĉiu interesato devas sendi maksimume 3 poemojn po maksimume 50 versoj al:

 premioluigivanvitelli@gmail.com

antaŭ la fino de la 25a de septembro 2026, kaj poste atendi la konfirmon de la organizantoj.

 La legado okazos:

 9an de oktobro 2026

 19.00 (itala horo, respondanta al 17.00 UTC)

 en ZOOM

La ligilo por partopreni estos komunikata rekte al la elektitoj kaj al la aliĝintoj.

 La publiko estas bonvenanta!

Eblas partopreni eĉ kiel simplaj spektantoj, sen deklami, per rezervigo sendante retmesaĝon al la adreso de la organizantoj (la sama kiel supere). ♦

Premio Internazionale Luigi Vanvitelli
alla memoria di Angelo Calabrese

invita poeti e appassionati

Reading poetico in Esperanto

9 ottobre ore 19.00 (Italia)
 Iscrizione e partecipazione gratuita
online sulla piattaforma **Zoom**



In collaborazione con:



Tiberio Madonna
 esperantista, poeta e performer
 Coordinatore e referente dell'incontro



Debora Rossetti
 Consigliera Nazionale FEI
 (Federazione Esperantista Italiana)

premioluigivanvitelli@gmail.com
www.premioluigivanvitelli.it

10-a TRADUKKONKURSO „LUCIJA BORČIĆ“

Honore al Lucija Borčić (26.07.1921-14.11.2015) Kroata Esperantista Unuiĝo lanĉas la 10-an literaturan traduk-konkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto.

La konkursaj branĉoj estas jenaj:

- poezio: maksimuma longo ne fiksita
- prozo - rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj)

La rezultojn oni publike anoncos la 14-an de novembro en Zagrebo, okaze de la 11-a Memorkunveno al Lucija Borčić.

La organizantoj disdonos ĝis tri premioj po branĉo. La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu Esperantisto, kiu rajtas parto-preni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj kiuj antaŭe ne estis publikigitaj ĉu en la presa, reta, bloga, fejsbuka formoj.

Al la konkursaĵo oni nepre aldonu jenajn informojn:

- nomon kaj familian nomon, poŝtan adreson, retadreson de la konkursanto;
- titolon de la originalo, nomon kaj familian nomon kaj la bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso: hes.keu@gmail.com ĝis la 10-a de oktobro 2026.

La premioj konsistas el diplomo.

La organizanto pretigos bit-libron kun la premiitaj verkoj.

www.hes-keu.hr



Alvoko por la Konkurso „Virina Aŭtoro de la Jaro”



Literatura Vivo redakcio

Kun granda ĝojo ni anoncas la konkurson „**Virina Aŭtoro de la Jaro**”, kies celo estas rekoni, honori kaj popularigi la literaturan verkadon de virinoj en Esperanto.

Rekomendo de legantoj

La opinio de la legantoj estas tre grava por ni!

Kiun vi proponas por la titolo „Virina Aŭtoro de la Jaro”?

Se vi konas talentan verkistinon, kiu laŭ via opinio meritas tiun ĉi honoran titolon, bonvolu sendi al ni vian rekomendon.

Konkursa periodo

1-a de aŭgusto 2026 – 30-a de novembro 2026

Bonvolu aldoni al via rekomendo:

- la nomon de la aŭtorino;
- mallongan klarigon, kial vi rekomendas ŝin;
- kaj, se eble, ŝiajn kontaktinformojn aŭ ligilon al ŝia retejo aŭ socia paĝo.

Bonvolu sendi viajn rekomendojn al:

 **info@literaturavivo.com**

Ni elkore invitas vin partopreni en ĉi tiu iniciato kaj helpi nin malkovri kaj honori elstarajn verkistinojn de la Esperanta literaturo.

Ne maltrafu ĉi tiun ŝancon rekomendi verkistinon, kies talento kaj literatura kontribuo meritas la titolon „Virina Aŭtoro de la Jaro”. ♦

LITERATURA KONKURSO KÁLMÁN KALOCSAY 2027



LITERATURA KONKURSO KÁLMÁN KALOCSAY

Temoj:

Partoprenantoj estas invitataj sendi siajn verkojn en la sekvaj kategorioj:

- poemo
- prozo
- traduko

Terminaj datoj:

Akcepto de verkoj: De la 1-a de Oktobro 2026 ĝis la 31-a de Marto 2027

Anoncado de gajnintoj: en la 112-a UK en Melburno en 2027

Reguloj:

La verkoj devas esti originalaj kaj ne publikigitaj antaŭe.

Limigo de longo:

Poemo: maksimuma longo ne fiksita

Prozo: maksimumaj 3 paĝoj

Traduko: maksimuma longo ne fiksita

Partoprenantoj povas sendi maksimume du verkojn en ĉiu kategorio!

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj duaj jaroj!

 Juĝado:

La juĝkomisiono konsistas el spertaj verkistoj. La kriterioj por juĝo inkluzivas:

- Kreivo
- Stilo
- Enhavo

 Premioj:

- Unua premio en ĉiu kategorio: Libro-premio kaj atestilo
- Dua premio en ĉiu kategorio: atestilo
- Tria premio en ĉiu kategorio: atestilo

Ĉiuj premiitaj verkoj estos publikigitaj en Literatura Vivo.

La gajnintoj de la unua loko estos intervjuitaj!

 Sendu viajn verkojn al kalocsayliteraturakonkurso@gmail.com retpoŝtadreso.

 Pliaj Informoj

Por pli da informoj, vizitu nian retejon <https://www.literaturavivo.com>

(aŭ <https://www.sinoatlantic.com/vivo/index.html>)

